
Dr. Jan HERBEN (1857-1936)

# MALRIĈA KNABO, KIU GLORIĜIS

*El la ĉeĥlingva originalo "Chudý chlapec, který se proslavil" (1928) tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc (Ĉeĥoslovakio) en la jaro 1930.*

*La biografia libro estis eldonita okaze de la 80a naskiĝtago de d-ro* ***T. G. MASARYK****, la unua prezidento de Ĉeĥoslovaka respubliko.*
*Aperis kun permeso de la aŭtoro.*
*Ciferecigis Miroslav Malovec.*



## JUNAJ JAROJ DE TOMÁŠ MASARYK

Tomáš MASARYK naskiĝis en la moravia urbo Hodonín[1)] la 7-an de marto l850. Pri riĉaj infanoj oni diras kutime, ke ili scipovis bone elekti siajn gepatrojn. Tomáš Masaryk ankaŭ bone elektis siajn gepatrojn, kvankam ili estis malriĉaj. Revenante jam kiel prezidanto[2)] el Ameriko la patujon - li estis jam 68jara - dumvoje sur la maro li meditis pri tio, kio utilis lin en la vivo. Li skribis: ". . . ĉar mi naskiĝis malriĉa kaj neniam riĉiĝis." Ĉu tio utilis lin? Al multaj eble estos tio nekomprenebla.

La patro de Tomáš estis nobelula veturigisto en la imperiestra bieno en Hodonín. Laŭnaske li estis hungarlanda[3)] Slovako el Kopčany,[4)] lia patrino estis el la moravia tiam germanigita urbo Hustopeče[5)] kaj ŝia knabina nomo estis Terezie Kropáčková. Ŝi estis jam Germanino, kvankam ŝiaj gepatroj transloĝiĝis al Hustopeče el Hana.[6)] Post Tomáš havis ĉi tiuj malriĉuloj ankoraŭ du knabojn, Ludovikon kaj Martinon, kaj knabineton, kiu baldaŭ mortis.

Ofte sendadis la administrantoj la patron de Tomáš al aliaj imperiestraj bienoj kiel inspektiston de kamparanaj laboristoj. Tiamaniere li ektroviĝis en Mutěnice,[5)] kelkfoje de Čejč al Čejkovice kaj denove reen en Hodonín. Ofta ŝanĝo de restado multe helpis al infanoj de Masaryk al pligrandigo de iliaj spertoj kompare kun infanoj de kamparanoj.

La vivo en la familio de Masaryk estis laŭ miaj scioj tre laŭorda. La edukado de la infanoj kompreneble estis tasko de la patrino, ĉar la patro estis la tutan tagon okupita per laboro aŭ en la bieno aŭ sur la kampoj. Kiam ajn profesoro Masaryk en sia pli matura kaj plej matura aĝo rememoris sian hejmon, li diris malkaŝe: "Mi estis en la frua junaĝo zorgeme edukata kaj flegata de mia bona patrino, al kies oferema amo mi dankas ĉion: la dolĉaj horoj de la hejma amo kaj paco estos al mi ĉiam la plej agrablaj rememoroj; la amo al miaj gepatroj

kaj samfamilianoj - du fratoj - estis al mi ofte dum malgajaj horoj la sola, sed riĉa fonto de interna kontenteco." Per kio la patro influis la knabon, oni povas diveni. Lia deĵoro estis tia, ke povis plenumi ĝin sole viro preciza je la horo, viro akurata kaj konscienca. La unua sur la korto, la lasta de la kampo, se li estis inspektonta laboristaron kaj volis havi ordon ĉe laboro, ĉar - dirite laŭ la biblio - li estis homo starigita sub la potenco. Ĉi tiujn ecojn heredis Tomáš de sia patro.

Pri sia patrino rimarkigis Tomáš Masaryk en gazeto de slovakaj legianoj en Rusujo, ke lia patrino influis lin de lia infaneco religie, ĉar ŝi estis tre pia virino. Kvankam li ne parolis pri la patro, tamen mi kredas, ke ankaŭ li influis lin religie. Mi komprenas tion tiel: de post la komenco, kiam Tomáš Masaryk aperis en la publika vivo, ni rimarkas ĉe li profundajn religiajn fundamentojn. Li esprimis ilin en la viva praktiko per vera pieco, per abomeno je malvero kaj mensogo, persone per kuraĝa verdiremo kaj sincereco kaj entute per ĉio, laŭ kio oni ekkonas pian kaj religian homon. Mi rakontos ja pli poste pri tio.

Tiajn principojn instruas al la knabo nek la "Patroniaj" nek "Rozarioj" deklamataj kun la patrino, nek kateĥismo lernita parkere en la lernejo; tiajn principojn instruas al knabo la gepatroj per sia konduto. Iliaj agoj estas la religia instruo. Kiel la gepatroj agas, tia estas la religio de la knabo. Se la gepatroj ne nur ne mensogas kaj ŝpareme uzas fremdan havaĵon, ne kalumnias la najbarojn, ne estas flatservemaj al la estroj kaj ne estas kruelaj je tiuj, al kiuj ili estas estroj, se la gepatroj estas bonfaremaj kaj indulgemaj al la homoj, afablaj eĉ al bestoj, simple dirite, se la gepatroj ne faras al aliaj, kion ili ne volas, ke aliaj faru al ili - tio estas la vera instruo de la religio; kaj tiel ankaŭ estis en familio Masaryk.

La familio Masaryk vivante aŭ en Hodonín, aŭ en Mutěnice, aŭ en Čejč, aŭ en Čejkovice estis ĉiam en la samaj

servutaj cirkonstancoj. Ĉie okazadis la sama tiranado kaj subpremado de homoj per la nobelaro. La hodiaŭaj homoj ne kapablas eĉ imagi, kio estis tio, kion oni nomis la epokon de Bach.7) Tio estis la epoko, kiam la aŭstra imperiestro Francisko Josefo, tiam dudekjara, komisiis la regadon de siaj popoloj al la soldatoj, ĝendarmoj kaj al la pastraro. La popoloj estis punataj tial, ĉar ili revoluciis en la jaro 1848. Tiel direktis la aferojn la imperiestra patrino. Ĉi tiu persekuto kaj regado de venĝo estis donita en la manojn de la ministro Bach. En la aŭstria imperio ekestis sufoko kvazaŭ en turmentejo. Ĉe ĉiu pordo, kaj sur ĉiu vojdisiĝo estis postenita ĝendarmo. Li aŭskultadis post la pordo, kion la instruistoj instruas, li notadis al si predikojn de la pastro, kiun oni denuncis nefidinda, li spionadis sur foirejoj kaj esploradis en gastejoj, kion homoj babilas inter si. La homoj iradis palaj kaj malgajaj, silentemaj kaj terurigitaj, ĉar neniu sciis, kio estas bona kaj malbona. La junuloj estis rekrutigataj al longtempa soldata servo. Kaj kiam minacis milito inter Aŭstrio kaj Italujo, la kleraj homoj preĝis kaŝe, ke la malamiko venku. Ili kredis, ke sole tiel povus pliboniĝi la stato de la popolo koncerne la polican registaron kaj ankaŭ koncerne la nobelulan tiranadon.

La nobelaro en Hodonín estis pli malbona ol alia. La bienego Hodonín-Pavlovice5) estis propraĵo de la imperiestra familio kaj la oficistoj de ĉi tiu imperiestra bienego estis skurĝo por la servutularo. Jes, por la servutularo. Laŭleĝe oni forigis la servuton, en la jaro 1848, sed ĉar la realeco estis pli inerta ol la leĝoj, la servuto daŭris sur la imperiestra bienego ankoraŭ ĉiam kaj longtempe. En ĉi tiu mondo kreskis la knabo de Masaryk kaj ekkonadis, kiel lia patro kaj aliaj kamplaboristoj kaj nobelulaj dungitoj estis sklavigataj, kiel ili tremas pri sia okupo, el kiu oni povis esti maldungataj pro bagatelo kaj kiel la patro malŝatas sian deĵoron kaj sian sklavecon. Se la patro, do ankaŭ la knabo malamis la

nobelaron. Kelkfoje la malamo, kelkfoje la bedaŭro eksplodis en li.

En Hodonín okazadis grandiozaj imperiestraj ĉasadoj. Alveturadis arĥidukoj, multaj fremdaj nobeluloj de la kortego, fine de la kvindekaj jaroj eĉ la imperiestrino mem, sovaĝa kaj freneza ĉasistino precipe se okazis parforsa ĉaso de iu kapreola viktimo. Unufoje demetis la ĉasistaro siajn peltojn ĉe Masaryk kaj Tomáš devis gardi ilin. La knabo eksentis kontraŭ tiuj peltoj tian abomenon, ke li forkuris de la hejmo kaj ne gardis ilin. Alifoje li ne kapablis rezisti pro la knaba scivolemo kaj alrigardis la ĉasadon, la pafistojn kaj ĉashelpantojn. Kiam la ĉasado finiĝis, la nobelaro eksidis en arbara imperiestra kasteleto al bonega festmanĝo. La restojn de la manĝaĵoj oni disdonis al la arego da helpantoj kaj pelantoj. Inter aliaj estis makaronoj8), kiujn Slovakoj nomis "lumbrikoj". Tamen, kiel ili luktaĉis pri ĉiu peco! La malgranda Tomáš ne povis rigardi tion, li forkuris kaj ploris pro kolero kaj pro bedaŭro, kiel la homoj sin humiligas. Kiam unufoje la knabo ĉeestis, dum nobelula oficisto Hejsek brute insultis la patron tute maljuste pro nenio, ekbolis en li venĝemo kaj li pripensis malklare planojn, kiel li repagos iam la brutecon kaj perforton al Hejsek.

Al ni estas klare, ke Tomáš Masaryk ne bezonis instrui sin pri socialismo el libroj! Ne sciante ankoraŭ pri socialismo li estis jam nekonscia socialisto.

Sed ne nur socialisto, li fariĝis ankaŭ jam Ĉeĥo, kvankam same ankaŭ nekonscia. Ofte estis nekompreneble al maturaj homoj, se Tomáš Masaryk estante profesoro kaj politikisto diris pri si, ke li neniam estis kaj estas naciulo, ĉar la naciecon li neniam sentis laŭ la lingvo, sed ĉiam kaj de post sia juna aĝo laŭ la sociala kaj morala vidpunktoj - subpremi popolon per nacieco estis al li la samo, tio estis laŭ lia opinio peko kai malhonorigo de la humaneco. Ekkompreni tion ne estas tro

malfacile. Ĉe Masaryk estis la patro Slovako, la patrino Germanino. La geedzoj interparolis komence germane; ĉar Josef Masaryk estis en sia juna aĝo interŝanĝe ĉe Germanoj kaj ellernis paroli germane. Sed kiam kreskis la infanoj, oni parolis jam en la familio slovake "moravie".9)

Malgranda Tomáŝ ne sciante pri la luktado inter Ĉeĥoj kaj Germanoj akceptis dulingvecon kvazaŭ ion naturan kaj kutiman. Despli, ĉar ĉeĥe kaj germane parolis plimulto de homoj kaj precipe de la geparencoj en Hodonín. Sed la germana estis la nobelula lingvo kaj la ĉeĥa la lingvo de servistoj, de malriĉaj laboristoj, de la homoj sur la foirejo kaj de kamparanoj venantaj al la urbo. Tomáŝ malŝatis la nobelaron ne tial, ĉar ili parolis germane, sed tial, ĉar ili turmentis la subulojn. Ĉi tiu sociala kaj klasa diferenco devigis lin esti kaj senti kun la popolo kontraŭ la nobelaro. Ĉi tio estis lia nekonscia ĉeĥa sentado. Mi opinias, ke simila vojo por atingi nacian senton per socia sento ekzistas nur ĉe malgrandaj kaj subpremitaj popoloj, kiam ili komencas vekiĝi.

La homoj de grandaj kaj kompaktaj nacioj ne havas tiajn admirindajn tipojn en sia nacio kaj tial apenaŭ ili ne kapablas kompreni ilin. Sed ni kapablas kompreni ilin. Despli ni komprenas Tomáŝon Masaryk, ĉar ĉu lia ĉeĥa sentado kaj lia laboro por la nacio rezultis el lia sociala sento de lia infana aĝo ĉu el lia literatura kaj historia konscio, lia ĉeĥa sentado kaj lia laboro por la nacio ekzistas kaj estas tiom grandaj, ke li ne havas konkuranton en nia epoko.

*

Tomáŝ Masaryk komencis viziti la lernejon en Hodonín. Sed apenaŭ li iomete alkutimiĝis al la lernejo, de nove jam li estis devigata transloĝiĝi: en la jaro 1856 la patro estis translokita al la bieno en Čejkovice. Tie daŭrigis Tomáŝ la

lernadon, sed ankaŭ el la nova hejmo li ne finis la vizitadon sen interrompo, ĉar en la jaro 1858 la gepafroj transloĝiĝis al Čejč. Nur post unu jaro ili revenis al Čejkovice kaj restis tie de la jaro 1859 ĝis 1862.

Ĉi tiuj tri jaroj estis en la lerneja vivo de la malrgranda knabo tre gravaj. En la unua periodo de la lernado en Čejkovice havis Tomáš bonŝancon esti instruata private dum kelka tempo. La kastelestro, eminentulo en la urbeto, havis samaĝan knabon, por kiu li dungis hejman instruiston, por ke la nobelula knabo ne devu frekventi la lernejon kun la kamparanaj infanoj. Li kunprenis Tomáŝon al la lernado, por ke lia knabo havu modelon en Tomáš. En la jaro 1859 perdis Tomáš ĉi tiun nobelulan kamaradon kaj migris denove en la lernejon inter la kamparanajn knabojn.

Kiam finiĝis la deka jaro de la vivo de Tomáš, okazis en la lernejo solena ekzameno: venis sinjoro dekano por inspekti la paroĥejon kaj la lernejon. Dum la lasta ekzameno legis la lernantoj artikolon "Super la steloj" kaj Tomáš devis rakonti ĝin. Li rakontis bone, sed la rememoro pri la fratinjo, kiu antaŭ nelonge mortis, eldevigis larmojn el liajn okulojn, ke li ne kapablis fini. Al sinjoro inspektanto tio plaĉis. Post la ekzameno li invitis la gepatrojn de Tomáš kaj diris al ili, ke la knabo havas talenton; li konsilis al ili lasi lin studi, ĉar li povus fariĝi instruisto. Ne pli, sole instruisto; esti pastro, tio estis privilegio de riĉaj knaboj.

Tial okazis, ke antaŭ la 1. oktobro l861 forveturigis nobelula veturilo Tomáŝon al la duklasa reala lernejo germana en Hustopeče. Tomáš fariĝis studento kaj eminente prosperis, kvankam komence la germana lingvo estis al li malfacila. Ankaŭ la duan klason de la reala lernejo li absolvis kun premio. El ĉi tiuj du studojaroj estas konataj diversaj interesaj malgravaĵoj kaj spertoj. Unu lia sperto precipe estas menciinda. Li estis al la kunstudantoj neagrabla ĉagrenulo.

Tial li havis preskaŭ neniujn kamaradojn. Li mem estis kulpa pri tio. De sia instruisto el Čejkovice li elpetis al si libron, kiun li prunteprenis iam de li kaj kiun li funde ekstudis tiom, ke li sciis ĝin preskaŭ parkere. Ĝi estis "La vizaĝscienco" por instruistoj, laŭ la fama kaj populara libro de K. Levater, laŭ kiu el la fizionomio oni povas ekkoni karakteron de homo, ĉu honestan aŭ malhonestan. Masaryk laŭ la instruo esploris mentonon kaj fingrojn de ĉiu kunulo, por diveni iliaj karakteroj. La rezulto estis, ke la kunuloj evitis lin, pro lia stranga agado.

Kiam Tomáš Masaryk finstudis du klasojn de reala lernejo (pli multe ne estis en Hustopeče), kaj ne estis ankoraŭ sufiĉe matura, por ke li estu akceptata en instruista lernejo, la patrino forkondukis lin Vienon, kie li devus lerni seruristan metion. Al Tomáš ne plaĉis fabrikeja meĥanismo kaj li estis ofte korpremata. Li penadis perforti tiun staton per legado, per vojaĝado en lerneja atlaso, li vane disponigis sin kiel skribisto en librovendejo, kaj fine, kiam al li iu kunlernanto ŝtelis kaj forvendis ĉiujn liajn amatajn librojn, li forkuris el Wien hejmen. Akceptita de gepatroj li ne estis afable kaj kamparanoj mokridis lin kiel "forkurintan studenton", ankaŭ tiam, kiam li preparante sin al veterinara studado lernis ĉe hufumisto en Čejč. Tiun malagrablan vivon (li ankaŭ ricevis batojn de veturigistoj, kiam li malbone hufumis ĉevalojn), finigis lia iama profesoro en Hustopeče, kiu renkontis lin, lernanton portanta sitelon da akvo. Li vizitis gepatrojn de Tomáš kaj plej akcente admonis ilin, ke ili lasu talentan knabon studi almenaŭ instruiston. Tiel Tomáš Masaryk transloĝiĝis en la lernejon en Čejkovice (kie estis instruisto la patro de menciita profesoro), por ke li praktike preparu sin al instruisto, ĝis kiam li povos viziti instruistan lernejon. La patrino portadis al li ĉiutage tagmanĝon de Čejč al Čejkovice, bonan horon malproksime.

Sed Tomáš Masaryk ne estis destinita esti instruisto. 15jara (1865) li estis akceptita en la duan klason de germana gimnazio en Brno. Ĉeĥaj gimnazioj tiam ankoraŭ ne estis. Eĉ Masaryk fariĝis fine profesoro kaj polikitisto, eĉ li pliriĉigis sian sciadon per memedukado kaj siajn moralajn principojn per disciplino kaj finpensado, tamen impresoj de junaj jaroj lasis profundajn postsignojn en lia vivo. Jam la pejzaĝo havis signifon en lia juneco.

Ĝi estas ebenaĵo montete ondigita, en okcidento de Hodonín sen arbaro. Vojoj kaj kampoj de suda Moravio estas sune ardaj. Masaryk por ĉiam enamiĝis en ebenaĵon, eĉ kun beto kulturigitan, en pejzaĝon sen romantiko, sed kun vastaj ĉirkaŭrigardoj, kie oni povas ĉion klare vidi.

Profunde en li restis precipe tio, kio ni nomus: sociala sentado. Kiu lernadis seruristan kaj forĝistan metion, tiu ne povas forgesi, kio signifas esti laboristo, ne atentante, ke li ankaŭ vidis socialan diferencadon de la loĝantaro en sia propra hejmo. - En Čejkovice li travivis kiel instruista praktikanto ankoraŭ aliajn impresojn. Li vivis kiel junulo en proksimeco de kapelano Satorie. Kapelano estis viro de fortega staturo, sana kaj bela homo. Li estis amata kaj ŝatata oratoro hejme kaj en najbaraj vilaĝoj. La vivo de tiu homo estis tipa vivo de junaj viroj, ligitaj de kontraŭnatura celibato. Li volis vivi kiel vera pastro kaj li ne povis vivi kiel vera homo. Li fordonadis sin al asketismo, sed li pekadis, havis pastrajn infanojn, ĉar junaj virinoj lin ne lasis kviete. Li konfesadis siajn pekojn de sur la predikejo kiel rusa muĵiko, sed denove li estis kaptita en embusko. Dum en Čejkovice la paroĥestro kaj instruisto estis germane orientitaj, Satorie estis konvinkita Ĉeĥo kaj malamiko de nobeluloj en Hodonín, kiuj samtempe estis paroĥaj patronoj, de kiuj dependis lia kariero. Li ankaŭ ne ricevis paroĥestran postenon en imperiestraj bienoj, kvankam liaj haroj jam griziĝis. Li poste ricevis malgrandan paroĥejon

en Uherčice,[5] komencis trinkadi, por ke li forgesu sian venenigitan vivon. Ĉu povis juna Masaryk ne pripensi tiajn aperaĵojn, ne pensi pri religio kaj eklezio?

Se ni simile ripetas tiujn impresojn, multaj agoj en pliposta vivo de Masaryk klariĝos al ni. Juna Masaryk estis frapante pensema kaj jam tiam scipovis rigardi kaj homojn kaj objektojn per siaj propraj okuloj. Junulo, vidanta slovakajn servutulojn, kiuj eble eĉ ne konis sian servutecon kaj agadis pli eble por malforteco ol por senmoraleco, ekintencis esti forta viro, antaŭe mem esti forta, sentima kaj verama: Surprize kiel gimnaziano en Brno deksesjara Masaryk estas konvinkita Ĉeĥo. En la klaso li estas komandanto de Ĉeĥoj. Se ni volas tion kompreni, ni reiru al tio, ke tiel nomataj "nobelulistoj" en la bienoj estis por ni, kamparanaj infanoj, ĉiam nobeluloj. Ankaŭ la gepatroj de Masaryk estis tiaj "nobelulistoj". Tiuj servistoj en imperiestraj bienoj imitis ĉie nobelulojn. Infanoj de tiaj familioj fariĝis renegatoj, ili kvazaŭ meĥanike kaj evidente germaniĝis. Tomáš Masaryk estas speciale en nia regiono escepto.

Kelkfoje li tion rakontis al mi kaj skribis en sia milita memuaro: "Mi estis neniam ŝovinisto, mi eĉ ne estis nacionalisto, mi ofte certigis, ke nia nacia penso allogas min per sia ideo sociala kaj morala - supremado de nacioj estas peko kontraŭ humaneco." Tial li de post la junaj jaroj ĝis nun subtenis tiujn, kiuj estis persekutataj.

Ĉio, kion ni scias de studado de Masaryk en gimnazio montras, ke li estis studanto eminenta kaj necedema. Krom lernobjektoj, en kiuj li eminentiĝis, ellernis lingvojn polan kaj francan. Kun profesoroj li ofte havis scenojn, sed ĉiam por aferoj, en kiuj li ne volis silente suferi maljustaĵojn. Kiam li pripensis religiajn demandojn kaj rifuzadis konfesadi pekojn, havis konflikton eĉ kun gimnazia direktoro, al kiu li defendis sin per vortoj: "Kiu agas kontraŭ sia konvinko, estas fripono".

Li estis eksigota, sed en tiu tempo havis Masaryk protektanton en la familio de polica prezidanto en Brno, Lemonier. Masaryk estis instruisto de malsana knabo de prezidanto kaj al sinjorino Lemonier plaĉis lia delikata kaj kompleza konduto. Hazarde en la sama tempo oni ofice postenis Lemonieron en Wien, Masaryk kiel hejma instruisto de la filo iris kune kaj ekfrekventis la faman akademian gimnazion, kiu estis la unua inter la vienaj lernejoj.

Religia meditado ne forlasis plu Masarykon. Male, ĝi plifortiĝis pro la tiamaj okazaĵoj. Tiamaj jaroj estis riĉaj je brulantaj demandoj religiaj kaj ekleziaj. En Romo kreskis nova dogmo pri papa neeraremo,1870 komencis milito franca-germana, kiun la katolika Francujo perdis kaj la dogmo estis proklamita en lasta momento pli frue ol la armeo de Mazzini okupis Romon. "Mi ne povas mallonge diri, kiom mi suferis kiel katoliko" remoradis profesoro Masaryk en Hradec Králové okaze de prireligia diskuto. - Tiam Masaryk efektivigis sian unuan partan disiĝon de la katolika eklezio. Li diris al la kateĥisto: "Mi ne akceptos la novan dogmon, mi estas malnovkatoliko. Laŭ la lernejaj reguloj mi vizitos preĝejon, sed ne la vian, ĉar vi estas por la dogmo pri la neeraremo. Tiukaŭze mi ne povos ankaŭ kontraŭ mia konvinko frekventi viajn lernejajn predikojn." Kaj li vizitadis la grekritan preĝejon. Sed ŝajnas, ke Masaryk ne estis kun ĉi tiu eklezio ankaŭ kontenta. En la dua semestro li havis jam en la lerneja atesto noton de la kateĥisto. En la atesto pri la matureco ja eĉ eminentan noton. Kaj tiel Masaryk absolvis la akademian gimnazion en la jaro 1872.

*

Kiam malfermiĝis al Masaryk la akademia mondo kaj la libereco de la altlernejaj studantoj, li restis idela al sia plano fariĝi filozofo, sed samtempe je la fino de siaj gimnaziaj studoj li decidiĝis dediĉi sin al diplomatio. Tio estis lia idealo.

Krom la universitataj prelegoj li komencis frekventi ankaŭ la orientalan akademion kaj lernis la araban kaj aliajn lingvojn. Li faris ankaŭ ekzamenon el tiuj lingvoj, sed baldaŭ li ekkonis, ke lia plano fariĝi diplomato ne efekfiviĝos. Tio estis rezervita al filoj de nobeluloj kaj de altrangaj ŝtataj oficistoj. La idealo pereis.

La universitata studado de Masaryk estis komence malsamcela kaj multflanka. Estis multaj aferoj, kiujn li volis lerni kaj finlerni. Li studis latinan kaj grekan lingvojn, li studis filozofojn, sed ankaŭ kelkajn objektojn de la medicina scienco kaj li pliperfektiĝadis en fremdaj lingvoj. Ni scias, ke krom la franca kaj angla lingvoj li scipovis tiom la rusan lingvon, ke li povis prepari rusan studanton al ekzameno pri matureco. Laŭ la materia vidpunkto estis zorgite pri li, kiam li edukadis du filojn en la familio de ĝenerala konsilanto de la anglosaksa banko Schlesinger. De siaj enspezoj li eĉ povis subteni sian pli junan fraton Ludvikon dum liaj studoj. Ĉiam ankoraŭ li havis tiom da libera tempo, ke li povis fariĝi prezidanto de la ĉeĥa Akademia asocio, vigligi ĝin kaj organizi paroladojn de ĝiaj anoj por ĉeĥaj laboristoj en kelkaj kvartaloj de Wien.

En la jaro 1816 Tomáš Masaryk faris ambaŭ rigorajn ekzamenojn rapide unu post la alia kaj fariĝis la l5an de marto 1876 doktoro de filozofio. Per tio li absolvis la plej gravan parton de sia vivo - la preparon al la praktika vivo.

# TOMÁŠ MASARYK PROFESORO

Li ne volis esti profesoro. Li estis jam profesoro kaj ankoraŭ ĉiam li estis preta elekti profesion, kiu garantius al li, ke li estu ĉiuflanken libera kaj sendependa, por ke la cirkonstancoj ne ordonu al li, al kio li devas subigi sin; por ke iuj estroj ne gardu liajn konvinkon kaj agadon.

Tomáš Masaryk jam estis mema, kiam li akiris doktoran rangon. Li estis entute viro de tiel maloftaj kvalitoj kaj precipe en niaj tiamaj cirkonstancoj, ke ĝojige estis rigardi lin, la dudeksesjaran.

Li pasis dufoje tra danĝera sfero: tra malriĉaĵo kaj tra bonstato. La malriĉaĵo kaj mizero, kiujn li travivis komence de siaj studoj en Brno ne lasis postsignojn en li. Okazas ofte, ke junaj homoj fariĝas amarsentaj kai plenaj da malamo al la societo, ke ili fariĝas eĉ malnoblanimaj. Male, bonstato kun riĉaĵo, kiujn la juna homo ekposedas, havas kutime aliain delogaĵojn; kelkfoje sopiron je brilo kaj mono, kiu en la junaj jaroj kapablas sufoki ĝerrnojn de belega junaĝa idealismo; alifoje avidon je facilanima vivo, abomenon al regula enuiga okupo. Se Masaryk savis sin en Brno de malnobleco kaj en Wien de facilanima vivo, oni devas supozi, ke li estis jam de post sia juna aĝo harmonia kapo.

Sed Tomáš Masaryk restis fidela al la diligenta studado kaj al principoj de laŭorda kaj laŭdisciplina vivo. Masaryk forlasis la studon de latina kaj greka lingvoj, kiuj estis gvidontaj lin al la instruista profesio en gimnazio kaj li dediĉis sin sole al la flozofio. En la societa konduto li sendube multon profitis en la familio de la polica prezidanto Lemonier, kaj la konsilanto Schlesinger sciis verŝajne, kial li elektis Masarykon edukanto de siaj filoj.

En ĉi tiu aĝo estis plej grava tio, kion juna viro faras, kiam li ripozas post studado kaj havas por si kelkajn horojn da

libera tempo. Tomáš Masaryk dediĉis la liberan tempon al la ĉeĥa Akademia asocio. En Wien studis jam de longe en altaj lernejoj junuloj el Bohemujo, Moravio kaj el Slovakujo. Ĉi tiuj studantoj fondis asocion en la jaro l870, por havi centron en sia izoleco en fremda tero. La germana Wien estis por ili ne nur fremda lando malĝentila, sed fremdlando fierega pro supereco de la germana kulturo super Ĉeĥoj kaj Slavoj entute, ofendanta la naciajn sentojn de nia junularo kaj malŝatanta ĝian lingvon kaj ĝiajn naciajn idealojn. Masaryk venadis inter siajn samnacianojn en ĉi tiun asocion, dum kiam li estis ankoraŭ gimnazia studanto. En la jaroj l874 kaj 1875 oni elektis lin prezidanto de la asocio kaj li inokulis novan spiriton al ĝi. Li organizis la membrojn en kelke da fakoj, por ke ili distribuu laboron al si eĉ por sia persona klerigo ekster la lernejo, eĉ por laboro ekster la asocio. Studantoj el la moravia Slovakujo fondis kantistan rondeton kaj Masaryk kantadis fervore kun ili. Laŭ instigo de Masaryk okazigis la akademia asocio en la jaro 1874 belan solenon de Jan Kollár, la fama kantisto de "Slávy dcera" (la filino de Slavoj). En la retorika-literatura fako prelegis Masaryk mem pri la historio de filozofio kaj pri la filozofio de Hartmann. (Hartmann estis germana filozofo, predikanta germanan krudecon kontraŭ Slavoj, precipe li konsilis ekstermi Polojn.) Masaryk proponis ankaŭ, ke la ĉeĥaj studantoj en Wien estu perantoj inter la ĉeĥaj laboristoj kaj la ĉeĥa inteligentularo. Miloj da ĉeĥaj laboristoj laboris en Wien, sed pri ilia spirita vivo zorgis neniu. Viglaj membroj de la Akademia asocio vizitadis vienajn distriktojn kaj paroladis al la laboristoj. Ili paroladis ankaŭ en la societaj ejoj eĉ en la salonego de "Slovanská beseda" (Slava klubejo), kiu estis la centro de la slava inteligentularo. Masaryk mem parolis pri la sinmortigo, pri la problemo, kiu jam tiam interesis lin.

Du okazoj en la jaro 1875 kaj 1876 ebligas al ni enrigardi la animon de Masaryk. La unua: Estante kandidato de

filozofio li anoncis sin al doktoraj rigoraj ekzamenoj kaj la 25an de aŭgusto 1875 li priskribis en sia petskribo sian ĝisnunan vivon. Li deklaris en ĝi, ke li volas paŝi en la vivo laŭ la devizo: "Nenio estas granda, kio ne estas vera". Li estis promovita al doktoro de filozofio la l5an de marto 1876. La saman jaron, antaŭ disiro de amika universitata rondeto (ĉiuj Ĉeĥoj kaj unu Germano), oni devoligis sin interalie laŭ instigo de Masaryk, ke ili en la vivo laboros por bono, por prospero de propra nacio kaj tial por la tuta homaro. La rondeto kunvenis en ekskursa loko apud Wien. Ĉiu ano ricevis de Masaryk slipon, kiun oni subskribinte interŝanĝis reciproke. "Mi devoligas min, ke mi alvenos la 1-an de septembro 1890 je la 12a horo al la loko, kiu de mi kaj miaj kamaradoj estis destinita, tio estas al la universitato de Wien; mi volas priskribi poste al miaj amikoj mian vivon kaj raporti, kiagrade mi plenumis per mia agado, per mia influo kaj klopodo niajn devizojn: ‚Knowledge is power` (scio estas potenco) kaj "Per vero al rajto." Morto kaj malsano liberigas min de ĉi tiu devo."

Tio estis romantika aventuro. Eble. Sed sub tia juna romantismo sin kaŝis profunda seriozeco, kiel montris la estonteco. Kaj certe, ni trovas postsignojn de tiuj devizoj ĉe ĉiu pli posta paŝo de Masaryk.

La jaron 1877 travivis Masaryk kun sia zorgato Alfred Schlesinger en la universitato en Leipzig. Tie li fianĉiĝis kun amerika fraŭlino Charlotte Garrique el Brooklyn. En la jaro 1878 li laboris en Wien kaj en printempo li veturis al Ameriko por sia fianĉino. Preparinte seriozan fiozofian verkon li akiris docentrajton ĉe la universitato en Wien en la jaro 1881. De ĉi tie li estis vokita al Praha al la ĉeĥa universitato aŭtune 1882 kaj per tio li fariĝis, kio li ne volis fariĝi: profesoro.

*

La universitato en Praha estis fondita en la jaro 1348 de la ĉeĥa reĝo Karolo I. (kiel imperiestro de la roma regno li estis Karolo IV.). Ĝi estis la unua universitato en Meza Eŭropo. Italoj kaj Francoj havis jam de longe universitatojn. Same kiel ĉi tiuj ankaŭ la universitato en Praha estis latinlingva, ĉar tiam la lingvo latina estis la lingvo de scienculoj. La reĝo Karolo volis, ke en lia regno estu hejme preparita la tablo de sciencoj por la sciencema junularo, ke Ĉeĥoj ne plu estu devigataj turni sin al fremdlando por kleriĝi. Nur la imperiestro Josefo II. de Habsburg enkondukis en la universitaton en Praha la germanan instrulingvon. La morta latina lingvo ne sufiĉis tiam al la progreso de la sciencoj, male la germana, kvankam ĝi ne estis en Bohemujo nacia lingvo, tamen ĝi estis almenaŭ viva lingvo. La ĉeĥan enkonduki en la universitaton li ne povis, ĉar la ĉeĥa lingvo post la batalo sur Bílá Hora10) (Blanka Monto) estis en degenero: Ĝi estis nur la lingvo de kamparanoj kaj de malgrandurbanoj. La jezuita instruo eksigis la ĉeĥan lingvon el la lernejoj, ĉar ĝi estis herezula lingvo laŭ la opinio de jezuitoj kaj de ĉiuj ekleziaj potencoj. De post la jaro 1848 oni prelegis en la universitato ĉiujn sciencojn ankaŭ en la ĉeĥa lingvo, la instituto estis dulingva, sed havis grandan plimulton da germanaj profesoroj, kiuj decidis pri tio, kiu estas akceptota en la profesoraron. Germanoj deklaris universitaton germana instituto kaj sia posedaĵo.

Tiel restis longe, kvankam en la lando estis malplimulto da Germanoj kaj kvankam male la ĉeĥa nacio de post la fino de la dekoka jarcento belege estis atinginta sian artistan kaj sciencan evoluon. Nur en la jaro 1882 efektiviĝis tuta divido de la Praha universitato en du partojn, en ĉeĥan kaj en germanan, kiam la ĉeĥaj deputitoj eldevigis en la regna parlamento en Wien novan leĝon pri la universitato. Kaj nun komencis la nacio zorgi, kiel instali profesorojn sur la

katedrojn de ĉiuj sciencoj, kiuj estas prelegataj en altaj lernejoj. La kompetentaj faktoroj turnis sian atenton ankaŭ al T. G. Masaryk. Prave. Doktoro kaj docento de filozofio, kvankam li komencis prelegi en Wien, tamen li atentigis pri si per kelkaj ĉeĥaj studaĵoj. Krom la verko "Pri la sinmortigo", kiun laŭdeve li verkis en la germana lingvo, volante fariĝi instruisto ĉe germana instituto, ĉion ceteran verkis T. Masaryk en la ĉeĥa lingvo. En la jaro 1882 havis Masaryk jam sciencistan reputacion, precipe la verko "Pri la sinmortigo" rezultigis grandan impreson en la sciencistaj rondoj. Kiel li estis ankaŭ persone estimata, pri tio donis ateston unu el liaj maljunaj profesoroj en Wien, profesoro Zimmermann. Li skribis al la komisiono en Praha, kiu esploris la sciencistan laboron de Masaryk, por ke ĝi povu postuli de la ministerio por lernejaj aferoj aprobon de nova profesoro por Praha:

"Mi konas profesoron Masaryk jam multajn jarojn, laŭ mia ofico mi recenzis lian doktoran disertacion pri la doktrino de Plato "Pri la animo" kaj ankaŭ lian verkon skribitan pro akiri docentan rajton "Pri la sinmortigo kiel amasa aperaĵo" kaj mi observis lian akademian agadon de plej proksime. Masaryk ebligis al si la vojon al studoj el plej malfacilaj cirkonstancoj kaj el plej mizera situacio per firma persistemo kaj malofte forta karaktero kaj krom ampleksaj lingvaj scioj li akiris ĝeneralan klasikan, matematikan, kaj natursciencan klerecon. Estante docento li akiris rapide tre rimarkindan influon al la ĉi tieaj aferoj. La studantoj precipe ŝatis frekventadi liajn diskutekzercojn kaj interparolojn. Lia karaktero estigas plej grandan respekton pro lia prudento kaj firmeco kaj li havas ĉiujn ecojn, kiujn nepre devas posedi reprezentanto de la scienco, kia estas la fiozofio. Mi deziras sincere al ĉi tiu perfekta viro, ke akirinte rangon de profesoro li havigu al si fine sekuran postenon kaj povu ĉesigi privatan instruadon, per kiu li estas devigata laborenspezi vivrimedojn, kaj mi opinias,

ke por la dua katedro de filozofio ĉe la nova universitato ekfunkcionta en mia naskiĝurbo - kiel alta lernejo celanta reputacion - mi ne povas proponi en ĝia propra intereso iun pli taŭgan kaj pli bonan laŭ la scienca kaj karaktera vidpunktoj ol lin, kiu krom tio estas en la plena vivoforto kaj en florstato de siaj klopodoj."

Kion aludis profesoro Zimmermann menciante, ke dro. Masaryk malfacile havigis al si vivrimedojn, tion oni scias de multaj flankoj de la tiamaj personaj amikoj de Masaryk. Estas necese paroli pri tio. Dro.
Masaryk fianĉiĝis kun Charlotte Garrigue en Leipzig 1877. La amo evoluis inter ili, kiam ili legis kune Byron, la verkon de J. St. Mill "Pri subuleco de virinoj" kaj la "Historion de civilizacio en Anglujo" de Buckle. Fraŭlino Charlotte estis absolvinta pli frue la konservatorion de muziko en Leipzig kaj venis en la jaro 1877 viziti Leipzigon. Masaryk intencis jam akiri la rajton de flozofia docento en Leipzig, sed malsano malhelpis tion. Nome li saltis en akvon por savi dronantan sinjorinon, sed li mem malvarmumiĝis kal malsanis longan tempon. En aŭtuno disiris la gefianĉoj. Fraŭlino Charlotte reveturis hejmen al la Unuiĝintaj Ŝtatoj kaj Masaryk rapidis al Wien por prepari sin al la universitato. Sed denove li interrompis la preparojn. Li vivis tiam en malkara loĝejo je unu ĉambro en Leopoldkvartalo kaj akceptis postenon ĉe la gimnazio je pomonata salajro da 60 guldenoj. Li instruis latinan kaj grekan lingvojn. Sed li instruis sole la unuan semestron. Por la somera semestro li rezignis je la posteno. Parte, por ke li povu dediĉi sin al la filozofio, parte ĉar la mezlerneja instruado naŭzis lin. Ĝenis lin la glormanio de profesoroj rilate studantoj kaj aliflanke la filistreco kaj ŝablono en la tuta eduko de la lernantaro. Li men instruis siajn lernant-ojn pli liberanime kaj estis amata de ili. Anstataŭ la gimnazia instruado li preferis fari al la lernantoj universitatajn kursojn

pri filozofio. Sed ankaŭ ilin li subite ĉesigis. Li ricevis leteron de Brooklyn, ke lia fianĉino vundiĝis falinte de sur veturilo. Masaryk lasis ĉion, enŝipigis sin kaj veturis al Ameriko. Sian fianĉinon trovis Masaryk jam ekster danĝero. Ili solenis la edziĝfeston la l5an de marto 1878. La junaj geedzoj venis al Wien kaj ekmastrumis kiel eble plej modeste.

Poste naskiĝis al la geedzoj en la jaro 1879 filino kaj en la jaro 1880 filo. Estis do necese zorgi pri vivtena okupo.

Kaj tiel venis dro. Masaryk al Praha. Li subskribadis sin tiam Tomáš Garrigue Masaryk, ĉar al sia nomo li aligis la nomon de sia edzino, sia kunlaborantino. Sinjorino Masaryk lernis la ĉeĥan lingvon de sia edzo kaj de liaj amikoj kaj ŝi partoprenis eĉ sciencajn diskutojn, al kiuj venadis en ilian loĝejon la unuaj lernantoj de Masaryk.

Apenaŭ T. G. Masaryk komencis prelegi ĉe la ĉeĥa universitato en Praha, li turnegis viglan atenton al si. Lia tuta instruista agado estis nova, estis alia ol Ia ĝisnunaj kutimaj metodoj de la malnovaj profesoroj.

*

Ne estis hazardo, per kio profesoro Masaryk komencis siajn prelegojn en Praha. Li ekparolis kontraŭ la skeptikeco, kontraŭ dubemo, kiuj faras la vivon malserena, malkontenta kaj malkonfida. Se ni laŭ tiu doktrino ne havas eblecon ekkoni la mondon, tiam estas nia vivo hazarda, nebula kaj ni ne scias, kion fari. Jam en Wien rimarkis profesoro Masaryk, ke inter la ĉeĥaj scienculoj ekplaĉas la filozofio de la germana pesimista filozofo Schoppenhauer. La patro de ĉiu dubemo ne estis Schoppenhauer, sed angla filozofo David Hume el la 18a jarcento; liajn ideojn akceptis multaj Germanoj kaj Schoppenhauer plaĉis pcecipe pro tio, ke li estis viro sprita kaj talentoriĉa. Masaryk parolis kontraŭ la skeptikeco kaj per sciencaj argumentoj li forturnis siajn lernantojn de malkonfido al la homa intelekto. Li instruis al ili la serenan kaj gajan

opinion pri la vivo. La homa prudento, kvankam malforta, tamen havas konsiderindan intelektan certecon, kiu vekas konfidon al la vivo. Kaj tial posedas la homo remilon, per kiu li kapablas direkti la ŝipeton de sia vivo.

La plej rimarkindaj prelegoj de profesoro Masaryk estis nomataj "Praktika filozofio". Ĉar al ĉi tiuj prelegoj venis ne nur filozofoj, sed ankaŭ juristoj, baldaŭ ne sufiĉis jam la aŭskultejo en la Clementinum.[11)] Praktika filozofio: Masaryk parolis al la studantoj kiel al junaj viroj, ne al knaboj. Kaj li prelegis, kiel oni diras, el la plena vivo. Li sekvis la homan vivon de post la naskiĝo ĝis la matureco, li parolis pri la edzeco kaj la familio, pri publikaj interesoj de la civitanoj, pri religio kaj moroj, pri organizaĵo de la homaro. Kaj ĉar al ĉi tiuj temoj memkompceneble konvenis la ĉiutagaj okazintaĵoj, kiujn oni povis uzi kiel ekzemplojn kaj dokumentojn, la scivolema kaj sciencema junularo sekvis ĉiun ekmovon de lipoj de la instruisto. Masaryk ne timis paroli pri aktualaĵoj, pri delikataj, moralaj, same kiel pri politikaj ĝis nun en lernejoj ekskludataj problemoj. Ĉio tio estis nova.

Masaryk estis antaŭ ĉio instruisto verama. Li ne preparis vervoplenajn parolojn al si, kelkfoje li ordigis nur ankaŭ la studantoj siajn pensojn kaj devigis per tio la aŭskultantojn labori kun li. Alian fojon li instigis senpere la studantojn, ke ili mem provu solvi malfacilajn kaj disputindajn problemojn. Li neniam ŝajnigis esti neerarema kaj kvazaŭ li mem jam scius la aksiomojn de la tuta mondo. Li diradis: "Mi ŝatus, ke vi nenion akceptu senpripense, sed vi studu kaj konkludu memstare." Tiaj paroladoj plialtigis memfidon de la junaj homoj. La studantoj ekscitite lin ankaŭ demandadis, kiam li renversadis iliajn ŝatatajn problemojn kaj pruvis ilian eraron. Kaj Masaryk toleris trankvile iliajn demandojn, li eĉ postulis, ke la studantoj disputu kaj prijuĝu sin reciproke, ĉar komparante kontraŭajn opiniojn oni lernas kompreni la aferojn kaj

trovi la veron. Li toleris eĉ stultajn kaj malsaĝajn opiniojn. Unusola homo estis ĉiam al Masaryk abomena kaj malsimpatia kaj tio estis homo apatia, indiferenta. Estu abomena kaj eĉ freneza tio, kion la homoj opinias: apatia homo, kiun interesas nek bono nek malbono estas putranta kadavro, senspirita estaĵo, kiu neniam utilas la homan societon. Masaryk volis vidi ĉirkaŭ si viglajn animojn, kvankam serĉantajn kaj erarantajn.

La studantoj sentis, ke ili havas antaŭ si spiritan viron, ne laikan, instruiston kaj scienculon konscian pri sia respondeco, ne profesoron, kiu instruas sole tion, kion li lernis mem. Kelkaj studantoj tamen skribis la prelegojn al si sole por la ekzameno. Sed la plimulto estis de tiuj, por kiuj la prelegoj de Masaryk estis forta ekpuŝo je ŝancelema koro kaj nevekiĝinta intelekto, konsilo kaj instigo al vivodona laboro: ekkoni sian celon, serĉi kredon je dia deveno de la homo kaj de lia misio: ĝi estis atako al la ĝisnuna indiferentemo je grandaj problemoj de la vivo kaj je sekreto de monda historio. Sed ne nur la parolo, mi devus diri, ke jam la rigardo al la parolanto mem efikis. Ĉar la juna profesoro prelegante parolis ofte kvazaŭ al si, li estis enprofundiĝinta en si mem, kvazaŭ li konfesus siajn pensojn kaj forgesus, ke li havas aŭskultantojn antaŭ si. Tio estis pli ol prelegoj kaj tio pli maltrankviligis la junajn virojn. Ili foriradis kaj ekdisputadis jam en la korto de la universitato aŭ solece en angulo de siaj loĝejoj kelkiu kaŭris en pensoj, kiujn li aŭdis la unuan fojon en sia vivo. Unu el la lernantoj de Masaryk skribis pli poste en siaj memuaroj: "Masaryk estas ja ne nur scienculo kaj profesoro, li estas ankaŭ artisto kaj pedagogo, kiu estras sian aferon kaj estas konscia pri sia granda kaj malfacila tasko: modeli homojn kaj ilian animojn. Li vidas la vivon en ĝia tuta amplekso, komplikeco kaj graveco, kaj tial la filozofio ne estis al li nur lerneja objekto, sed esprimo kaj ŝlosilo de la vivo, la vivo mem.

El Clementinum baldaŭ disvastiĝis la famo pri ĉi tiu nova profesoro. Al liaj prelegoj enskribigis sin poste ankaŭ studantoj de la medicina fakultato, studantoj, kiuj jam esfis finontaj siajn devigajn prelegojn en la universitato, plilongigis sian studadon je pluaj semestroj, venis ankaŭ tiaj studantoj el teknika altlernejo, kiuj serioze traktis sian klerigon.

Vere, tian profesoron mi ne havis en la universitato. Li - universitata profesoro! - vizitadis gimnastikajn ekzercojn de Sokol12) en Praha kaj gimnastikis en la junula kamaradaro: Li aspektis pli eble kiel vivoplena studanto, juna, elasta kaj eleganta. Li estis belega homo. Oni iras kun li en la strato, oni diskutas pri la ĉeĥa historio, pri beletristiko - jen subite fosaĵo transverse la straton. . . oni serĉas transirejon, kaj la universitata profesoro - hop! - saltas trans la fosaĵon. Dum mia vivo mi aŭdis malmultajn homojn tiel sincere ridi kiel li kutime ridis. Kiun li invitis promeni, tiun li ege lacigis. Longdaŭre promenadi per rapidaj, longaj, elastaj paŝoj estis al li facile. Kaj dum tio alternis seriozaj paroloj kaj ŝercoj - do ĉiam homo kaj neniam profesoro. - Se li almenaŭ estus havinta iajn malbonajn inklinojn kiel ni, sed Masaryk de post siaj vizitoj ĉe Leo Nikolajeviĉ Tolstoj en la jaro 1881 kaj 1889 ĉesis trinki vinon; li ne fumis; ne ludis kartojn, li ne vizitis gastejon - ĉiam li estis nur ĉe la skribtablo hejme aŭ en la freŝa aero.

Apenaŭ ĉirkaŭrigardinte en la universitato de Praha ekkonis Masaryk multajn mankojn eĉ ĉe la profesoroj eĉ ĉe la aŭskultantoj kaj en la tuta lerneja sistemo. Ekkoni kaj laŭ tio agi, estis ĉe Masaryk regulo.

Tial li fondis jam en la jaro 1883 sciencan monatan revuon "Athenaeum" kaj elserĉis rondon da kunlaborantoj inter siaj kolegoj nome el ĉiuj kvar universitataj fakultatoj kaj el la teknika altlernejo. Li mem estis ĉefredaktoro. En ĉi tiu revuo estis studotaj progresoj de la sciencoj en fremdaj landoj,

por ke nia juna universitato - kiel *pure ĉeĥa* ĝi estis juna - restu samvalora kiel la fremdaj. En ĉi tiu revuo estis konstatota tio, kion ĝis nun la malnovaj sciencistaj generacioj postlasis al ni science bonan kaj valoran kaj estis severe kritikota tio, kio aperis nova. Ĉi tiu kritika laboro estis danĝera pro malgranda rondo de niaj sciencistoj ĉe unusola universitato; Masaryk mem antaŭvidis, ke en tiu ĉi rondo estos homoj, kiuj ne havos sufiĉe da morala forto, por akcepti kritikon, eĉ se ĝi estus esprimata en la plej pura intenco, nome pro utili sciencan nivelon. Athenaeum influis sanige kaj morale, kvankam ĝi ektimigis kompreneble tiujn, kiuj en pli frua tempo estis honorigataj senmerite. Athenaeum estis destinita por profesoroj kaj scienculoj.

Por studantoj faris Masaryk alian laboron. Ni havis ĉeĥan altan lernejon, ĉeĥajn studantojn, sed ni ne havis ĉeĥajn librojn por ili. Juna homo, forlasinte mezan lernejon, devas subite dediĉi sin al faka studado kaj al scienca laboro. Li staras kvazaŭ antaŭ granda monto, tra kiu li devas tramordi sin. Li ne scias, kie kaj kiel komenci. Profesoro Masaryk insistis siajn kolegojn, ke ĉiu en sia fako helpu la kandidatojn de scienco, li mem verkis kaj eldonis per siaj aŭskultantoj en la jaro 1884 *Fundamenton de la konkreta logiko* - disspecigon kaj sistemon de sciencoj. La libro estis provo pri unu formo kaj natura sistemo, por ke studanto kaj faka filozofo elserĉu al si, kie komenci, kiel kleriĝi per la koncernaj sciencoj kaj laŭ kiuj metodoj ili laboras. La libro estis orientiĝo kaj gvidilo al la juna homo, same kiel oni serĉas gvidanton en granda urbo plena da babela ĥaoso, da strata bruo kaj da krucvojoj.

Sed profesoro Masaryk estis vidata ankaŭ ekster la universitato kaj scienca mondo. Li donis ekzemplon al siaj kolegoj, kiel estas eble disvastigi ilian influon ankaŭ en la tiel nomatajn pli vastajn rondojn. El la universitataj fenestroj oni

ne povas paroli en la straton. Sed estis kaj estas asocioj, kiujn oni povas apliki al disvastigo de utilaj scioj. Profesoro Masaryk parolis jam en la jaro 1882 en studanto-klubo pri Blais Pascal; tio estis lia unua parolado pri religiaj aferoj entute, kun atentigo je nia ĉeĥa religia estinteco. En tiel nomata "amerika sinjorina rondo" li parolis en la jaro 1884, kiel estu legataj poeziaj verkoj, por ke la leganto trovu en ili instruon kaj entuziasmon. En la jaro 1885 profesoro Masaryk sugestis al la publiko la postulojn de la ĉeĥa scienco, por ke ĝi ne kripliĝu sur unu centro. Ni bezonas duan universitaton, li estis deklaranta, ni bezonas sciencan akademion kaj ni ne povas rezigni je nova konversacia leksikono, ĉar tiu de Rieger13) estis jam superita de la monda progreso. De post tiu tempo enradikiĝis la proverba citaĵo de Masaryk: "Se ni havas unu universitaton, ni bezonas ankaŭ la duan".

## KION INSTRUIS MASARYK

Profesoro Masaryk instruadis studantojn de filozofio, kiuj preparis sin por fariĝi instruistoj en mezaj lernejoj. Ĉiuj frekventantoj de la filozofia fakultato intencantaj fariĝi historiistoj, filologoj, naturscienculoj, matematikistoj, fizikistoj, pedagogoj ktp. devas havi ankaŭ filozofian klerecon. Sed profesoro Masaryk instruadis ankaŭ juristojn, ĉar ĉiu jurostudanto devis lerni praktikan filozofion. La prelegoj de Masaryk pri praktika filozofio estis por la studantoj de ambaŭ fakultatoj la plej interesaj kaj la preleganto laŭŝajne klopodis fari ilin peecipe interesaj.

Pri kio do prelegis profesoro Masaryk? Lian atenton allogis la efektiva vivo, malpli logis lin meditado pri metafizikaj aferoj. Estis do la homo, la familio, la popolo, la homaro, pri kiuj li meditis kaj prelegis. Ne ekzistas ordono, pri kio filozofo devas aŭ rajtas okupi sin. La tuta mondo estas

malfermita al li, en tiu regno li estas suverena estro. Sed ĉar profesoro Masaryk enprofundiĝis krom la ĝenerala filozofio en unu certan sciencon, nome en sociologion, li plej multe ŝatis labori en tiu ĉi fako. Sed kiam li meditis pri la homo, la familio, la popolo kaj la homaro, tiam ĝuste estis oportune konsideri ĉiujn ĝeneralajn filozofiajn sistemojn, por apliki ilin al kontrolo ĉe sia propra objekto.

Eĉ se ni ne estus filozofoj kaj profesoroj de filozofio, la fina celo de la pensado de ni ĉiuj estas, ke ni faru al ni nian propran konvinkon, propran opinion pri la mondo laŭ ĉiuj mondaj konvinkoj kaj opinioj. Oni povas scii la tutan filozofion de post la grekaj saĝuloj Aristoteles kai Plato trans la mezepokaj filozofoj Tomas de Aquino, Duns Scotus kaj Bacon ĝis Kant, Hegel kaj eble eĉ Nietzsche, tio ne valoras por la vivo, se oni ne faris al si propran konvinkon pri la vivo laŭ la instruoj de la pasintaĵo kaj laŭ sia propra sperto. Kaj profesoro Masaryk-kondukis precipe al ĉi tiu celo la junulojn de la altaj lernejoj: Ĉiu homo devas havi ian porvivan filozofion.

Ĉiu epoko havas siajn urĝajn bezonojn. En ĉiu epoko homoj postulas esti instruataj pri la cirkonstancoj, kiuj ĝenas ilin kaj ĉe ili estas senkonsilaj. El tiaj bezonoj devenas religiaj problemoj. Oni scias, kio antaŭiris en la vivo de Izraelidoj, kiam venis Kristo, por - laŭ sia doktrino pri Dio kaj pri la amo al la proksimulo - elŝiri Hebreojn el la farizea religia doktrino, kiu rigidiĝis sur la litero, kaj el la atentado de Mesio t. e. de politika savonto, kiu liberigus Hebreojn de la roma suvereneco. Ni scias, kial en la 15a jarcento naskiĝis en la ĉeĥa nacio ardanta klopoda celado, por ke oni morale plibonigu la homan vivon de la eklezia malmoraleco - de post Milič[14] ĝis Hus.[15] Oni konas bone la epokon, kiu devigis la germanan filozofon Kant mediti pri tio, kion la homo kapablas ekscii per sia intelekto kaj kion ne. Franciskon Palacký devigis

la studo de la ĉeĥa historio esplori kaj serĉi, kian sencon havas la ĉeĥa historio, kien la nacio celu kaj kiajn principojn ni sekvu. Karlon Havlíček[17)] turmentis la problemo, kian ekvilibron trovi inter nia herezula estinteco kaj la roma estanteco. Profesoron Masaryk devigis en la okdekaj jaroj mediti pri la posteno de nia nacio en Aŭstrio kaj Eŭropo. Oni diras, ke interesis lin la sorto, *la problemo de malgranda nacio*. Temis pri objekto same meritplena por filozofo, kiel necesega por la tuta nacio. Ne temis pri pli facila afero ol daŭrigi la filozofion laŭ Kant, Hegel, Spencer, Comte kaj kiel estis nomataj la gravaj filozofoj de la pasinta tempo. La bezonoj de la vivo estas pli proksimaj kaj pli urĝaj.

Kaj tiuokaze frapis la studantojn, ke meze de la praktika filozofio profesoro Masaryk surprizadis ilin per problemoj, kiuj de longe ne estis aŭdataj en nia publika vivo. Profesoro Masaryk tre ofte akcentis la religion kaj la moralecon.

La religio - tiel proksimume ili aŭdis - donas al la homo konsolon en ĉiuj cirkonstancoj de la vivo; ĝi plifortigas lian amon al la homaro. Tial religia homo kutime estas gaja dum ĉiuj cirkonstancoj de sia vivo. Lia kredo, lia konvinko kaj lia certeco ligas lin ne nur al la ĉielo, sed samtempe al la tero, al la vivo.

La ĉeĥa problemo - ili aŭdis alian fojon - estas religia problemo. Kial do? ili miras. Kaj profesoro Masaryk klarigis, ke la ĉeĥa nacio havis religian mision inter la popoloj. Ĝi ekpartoprenis la mondan historion per tio, ke ĝi prenis sur sin la taskon tramediti la kristanecon kaj transdoni al ĉiuj popoloj kristanecon purigitan de homaj aldonoj. La religio ne estis privata afero de Hus, la ĉeĥa nacio kvazaŭ tutaĵo akceptis la ideon de Hus kaj ekbatalis entuziasmege por ĝi. La ĉeĥa nacio trameditis dum kelke da jarcentoj la religian problemon kaj laŭ la vortoj de Palacký ĝi kreis la ĝis nun plej belan eklezion - la frataran Unuiĝon.[18)] - Ni daŭrigu: ni sekvu la epokon de nia

estinteco, sed ne malzorgu la progreson de la nuna epoko. Ankaŭ la religio evoluas. Ni ne povas reveni en la 15an aŭ 16an jarcenton al husanismo kaj fratarismo, sed en ilia spirito ni serĉu pli bonan religian doktrinon kaj pli altajn moralajn regulojn por nia vivo. Nia reformacio estas ĉiam viva.

Tio estas parolo, per kiu Masaryk senpere estis reviviganta la religian pensmanieron kaj respekton al la reformacio meze de la nacio, kiu estis iam de longe religie indiferenta kaj eklezie nur laŭmatrikula.

Kaj oni aŭdis en prelegoj instruon:

La religio estu fundamento de moraleco. La moraleco mem ne estas religio kaj religio ne estas moraleco. La religio devenis el la rilato de homo al la tuta mondo, precipe al Dio. Moraleco estas interrilato de homo al homo; ni bezonas moralecon en nia rilato al proksimuloj. Jezuo parolas klare pri la amo al proksimulo kaj instruas ami eĉ malamikojn: La historio instruas nin, ke en la eklezio estis tro malmulte da ĉi tiu efika amo kaj ĝis nun ne estas multe da ĝi. Jezuo prezentis al ni modelon, kiel ami la malamikon. L. N. Tolstoj ankaŭ predikas amon al la malamiko kaj opinias, ke la homo povas ami sian proksimulon nur tiam, kiam li amas la malamikon. Mi diras: Ami la malamikon estas eble. Mi ne volus paroli kontraŭ tio: Sed mi mem sekvas la regulon, ke ni estu al la malamiko justaj! Se ni ne kapablas ami la malamikon, tiam ni ne mensogu al ni kaj al aliaj, ke ni amas lin.

Sed se religion, do kian? Masaryk troviĝis ofte, ekster la eklezioj, pli bone dirite super la eklezioj. Li alproprigis al si la regulon de Hus, la regulon ne nur de veremo, sed ankaŭ de progreso. Hus konfesis: "De komenco de miaj studoj mi akceptis la regulon, mi rezignas volonte kaj humile je mia opinio, kiam ajn mi trovus pli bonan instruon en kiu ajn fako, ĉar mi scias, ke kion oni scias, estas tro malgranda parto de tio, kion oni ne scias."

Kleriĝo kaj moraleco estas kondiĉoj, por ke la ĥaraktero de la nacio pliboniĝu.

Ni ĉiuj estas devigataj akceli tion. Kultura nacio estas tiu, en kiu ne estas kleraj nur unuopuloj, sed tiu, en kiu ne estas analfabetoj, ĉar per kulturo akiras la homo memkonscion kaj maturiĝas al tio, ke li volas memvole direkti sian vivon. Morala nacio estas tiu, kiu malŝatas malbonon kaj ŝatas bonon; veron kaj rajton. Moraleco estas saneco de la nacio. Kaj la nacio ne povas: havi duspecan mezurilon por moralaj principoj, laŭ kiuj ĝi pardonus ĉe la riĉuloj kaj potenculoj tion, kion ĝi kondamnus ĉe simplaj homoj, la moraleco vendas ĉion je la sama prezo. La homoj estas kutime tiel malforfaj, ke ili permesas malmoralecon al eminentuloj, kiel estas Goethe aŭ Napoleon kaj eble ankaŭ ĝiaj naciaj gvidantoj.

Profesoro Masaryk malakceptis sentencon de la franca filozofo Voltair pri la religio, laŭ kiu li, Voltair, ne bezonas religion; sed bezonas ĝin lia kudristo, por ke li ne priŝtelu lin. Kio ne estas bona por mi, diris Masaryk, tio ne estas bona ankaŭ por simplaj homoj. Kaj same li malakceptis la esceptojn pri moraleco de eminentuloj; se la popolo bezonas moralecon, bezonas ĝin ankaŭ Napoleon kaj Goethe,
ankaŭ la ĉeĥa verkisto kaj deputito.

La lernejo esfis la plej konvena loko, por ke la profesoro parolu al animoj de homoj ankoraŭ junaj. Kaj li parolis:

Se la studanto volas labori por la nacio, li faros plej bone, se li laboros por si, t. e. se li studos; por prepari sin ekzakte al sia profesio. Ne estas necese cerbumi, per kio vi utilos la nacion, se vi studas medicinan sciencon, vi utilos plej bone la nacion, kiam vi estos bona kaj konscienca kuracisto. Vi utilos la nacion, kiam vi estos bona kaj konscienca instruisto. Estas sensence diri pri iu, ke li estas patrioto aŭ bona Ĉeĥo, se tiu homo ne estas bona homo en sia profesio. La patriotismo mem preskribas por la vivo neniujn regulojn, laŭ kiu ni vivus kaj

laborus. La simpla regulo "Ne mensogu!" instruas miloble pli multe ol ĉiuj paroloj pri ta patrujo kaj pri la nacio.

Neniu pensu, ke profesoro Masaryk karesis siajn aŭskultantojn, por akiri ilian favoron. Li estis kutime severa kaj en sia veramo li estis prefere senkompata ol karesema.

Masaryk diris ekzemple: Tiu aŭ alia juristo, medicinisto, teknikisto, filozofo ktp. - estis politike aktiva. Li veturadis tra la lando kaj agitadis. Li sukcesis en kelkaj sensignifaj vilaĝaĉoj gajni por sia ideo cent homojn, balotantojn aŭ nebalotantojn - ĉu tio valoras la klopodon? Ĉu tiuj homoj estas efektive gajnitaj por lia ideo daŭre, ne nur por momento? Mi dubas. Sed mi ne dubas, ke la sama akademiano estus gajnanta komplete kaj daŭre por sia ideo la tutajn menciitajn vilaĝaĉojn, se li estus pli frue diligente studinta kaj samtempe kleriginta sin laŭ ĝenerala kaj politika vidpunktoj, se li estus bone farinta siajn ekzamenojn kaj en iu el la vilaĝaĉoj ekloĝinta kiel kuracisto kaj laborinta kiel konscienca civitano. Kaj nun ni kalkulu ankoraŭ. Nia akademiano dum sia agitado perdis unu, du, tri, kvar jarojn - li ekkonis fine, ke li devas fari ekzamenojn, li devas kompreni ĉiam denove, sed tio estas mtalfacila, tre malfacila. . . Lia kolego kaj amiko, kiu tiel ne agitis kun li, sed kiu studis diligente, estas jam nun oficisto aŭ kuracisto kaj laboras por siaj kaj por liaj ideoj.

Profesoro Masaryk ne malpermesis al la studantoj okupi sin pri politiko. Estus stultaĵo malpermesi ion, kio ne estas malpermesebla. La junularo okupos sin pri politiko, sed kiel! Tiel, kiel decas al juna inteligentulo. Studi politikaln librojn, obcervi politikajn partiojn, la agadon en parlamento ktp., por ke li povu kritike ekkoni la principojn kaj la taktikon. En la politika partio povas la studanto ĉeesti kiel gasto: Same kiel la juna viro studas sian sciencon, same li studu ankaŭ politikon, por ke li diferencigu veron de malvero kaj oron de brilaĵeto.

Super ĉio valoras - labori. Nur per laboro oni fariĝas homo, karaktero, oni fariĝas memstaraj. Nelaboranta homo ne estas memsiara. Ankaŭ nelaboranta nacio ne estas memstara. Sen laboro oni neniam havas sufiĉe da memkonfido. Per laboro oni nur ekkonas sian forton. Laboro estas ekkono de si mem. Kiu ne laboras, tiu estas superstriĉulo, almozulo, vagulo, atendanta miraklojn; li volas vivi per miraklo. Kaj, ĉar ne estas eble vivi sen laboro, restas nur sklavigi alian. Tial per laboro oni senigas sin de instinkta perforfeco. La amo al la proksimulo estas laboro. La amo estas laboro. . .

Sed se oni devas labori, oni pensu pri tio, ke la plejmulto da homoj preferas ekscitiĝi ol labori. Al oni plaĉas paroli pri revolucio, ekscitiĝi per grandaj devizoj: La efektiva laboro estas malgranda, ĉiutaga; kaj efektiva laboranto estas tiu; kiu scias fari malgrandajn, ĉiutagajn kaj necesajn aferojn. Oni volas esti herooj: Tiuj grandaj heroaĵoj ekzistas kutime nur en la fantazio. La homoj preferas oferi la vivon, ol labori: La homo efektive moderna estas spirita laboristo, manlaboristo. Oni estas ankoraŭ romantikuloj. Ĉiu havas sufiĉe da tiu romantiko en si. La ago, ne laboro. Sed kiom da generaloj kaj herooj ekzistas kaj kiom da homoj sukcesos grandan agon? Kelkfoje necesas grandaj oferoj, sed malofte. Certe estas mal-multe da homoj, kiuj havis okazon oferi sian vivon, sed tamen ĉiuj - en sia fantazio - imagas situacion, en kiu oni estus pretaj oferi la vivon por afero. La homaro, la nacio, la familio, la partio, la kamarado bezonas nian laboron.

Oni ne ŝatu martiriĝon kaj morton. Kion diris Havlíček pri tio? "Pli frue la viroj mortadis pro homaro, pro bonfarto de ilia popolo: sed ni vivos kaj laboros pro la sama kialo." Kaj oni rememoru la romanon "Novina" (Nekulturigita lando) de Turgenev. Tie simpatia knabino Marina votas oferi la vivon por Rusujo. Ŝi atendas ĉiam, kiam venos la okazo, kiam la popolo diros: Nun vian kapon sur eŝafodon! Sed tiu momento

ne venis. Tamen venis praktika homo Solomin, direktoro de uzino, kaj li diris al ŝi: Rusujo ne atendas oferon de la vivo, sed al tiu malpura knabo kombu la harojn, lavu malpuran nazon. . . tio estas necesa.

*

Kien celis la paroloj de la instruisto? Kial li parolis tiom insiste pri la religio kaj moraleco kaj kial li tiom akcentis la karakteron de homoj?

Profesoro Masaryk bone ekkonis, kio mankas al ni. La ĉeĥa nacio, iam la unua inter la nacioj, ĉar ĝi estis la plej antaŭa koncerne klerecon kaj koncerne klopodon pri la ĉeĥa religio, la nacio kovrita per gloro eĉ milita, estis en la 19a jarcento senenergia kaj matforta laŭ la karaktero. La multjara subpremado sub la habsburga regado kaj la eduko en jezuitaj lernejoj daŭrinta preskaŭ tri cent jarojn difektis nian karakteron, rezultigis multe da malvirtoj ekzemple malicon kaj mensogemon, timemon antaŭ la potenculoj de ĉi tiu mondo kaj koruptemon de la spirito. De post la malfeliĉa malvenko sur "Bílá Hora"[10] (Blanka monto), ĉiu malbonigis kaj malmoraligis nin. La jezuitoj ne celis puran religion, sed potencon super la homoj. Por la kortega favoro la ĉeĥa nobelaro germaniĝis kaj forturnis sin de la nacio. Masaryk komencis sian klerigan laboron sur tiu regeneriga kampo. Nia lingvo estis jam sekurigita, la arta kaj scienca literaturoj estis bonaj, ankaŭ nia nacia konscio estis preskaŭ komuna: sed la nacia animo, nacia karaktero malsanis, ili bezonis kuracadon. Tial Masaryk kolektante ĉion, kio estis formonta nian karakteron, unue klopodis plibonigi la moralecon kaj la religian konscion. Modelo estu Hus kaj Komenský,[19] por memorigi nin pri la tradicio, kiun la nacio sekvu. Hus kaj la tuta nacio kun li ne timis konfliktojn kun Romo, ĉar la plej granda aŭtoritato ne estis al ili homoj, la monda kaj spirita potenco, sed la konscienco kune kun intelekto, kiuj estis

fundamento al la porviva konvinko. Ili ne timis, ĉar ili pli multe kredis al Dio al al homoj.

*

La lernejo ne estas loko por ŝercado. Kaj tamen la lernejo de Masaryk estis ĝojiga. Por la instruisto kaj por la lernantoj. Okazas tiel ĉie, kie la lernantoj estimas la instruiston, observante lian sincerecon, seriozecon kaj justecon egalan al ĉiuj, al riĉaj kaj malriĉaj, al talentaj kaj mezkvalitaj lernantoj. Kiam la ideoj de profesoro Masaryk fariĝis publikaj el liaj prelegoj en universitato kaj el liaj unuaj verkoj, da kiuj li kelkajn eldonis en la 80aj jaroj, oni komencis diri, ke Masaryk sufokas entuziasmon en la junularo. Tio ne estis vero, la studentoj foriris el la lernejoj entuziasmigitaj por la ideo de la instruisto. Masaryk pelis la junularon al studo de la afero, al observado kaj praktika uzado de akiritaj scioj. La malnova metodo antaŭ li estis plena da entuziasmaj devizoj pri gloro de la nacio, oni deklamis la poemon de Jablonský[20)] "Tři doby země české" (Tri epokoj de la ĉeĥa lando) la efektiva stato estis bedaŭrinde malgaja. La programo de Masaryk estis belega kaj rava, sed de alia enhavo. Se iu postulas de ni entuziasmon, estas necese postuli de li argumentojn, per kiaj aĵoj oni devas esti entuziasmigitaj. Nacio, kiun oni ĉiam rememorigas nur pri idealoj, kiel glora ĝi estis iam kaj kiel ĝi havis propran ŝtaton, ekdormas fine pro enuo. Sole degenerita nacio ne havas idealon. Masaryk havis la saman idealon kiel la pli aĝa generacio, sed li donis praktikajn kai priaferajn konsilojn kiel proksimiĝi al la idealo.

Aĵo estas latine nomata *res*. Kiu celas aferon, kiu serĉas kernon, kiu ĝisfunde esploras la aferon, tiu estas realisto. La direkto de la metodoj de Masaryk kaj la maniero de la opinio pri la vivo estis nomataj realismo. Tuj kiam li venis al Praha nomis lin liaj amikoj pro lia spirita vivdirekto "*spirita paŝtisto*" aŭ nur "*paŝtisto*" kaj ĉi tiu nomo estis konvena por li.

En aliaj lernejoj oni prelegas la sciencoj, en altaj lernejoj oni ne edukas. Profesoro Masaryk edukadis. Li konsciis, ke scienco kaj arto estas nepre necesaj. Estis ja lia devizo jam dum lia juna aĝo, ke scio estas potenco. Sed scio ne estas la lasta celo de la homo, ĝi estas sole helpilo al tiu, kiu kiel homo estas plena da moralaj ordonoj kaj havas honestan karakteron. Tial li klopodis eduki la junajn virojn al moralaj, honestaj karakteroj. Kaj tio estis novaĵo.

Li inokulis al siaj aŭskultantoj la ideojn, pri kiuj la profesoroj ne zorgis kaj ne zorgas ankaŭ nun. Li mem zorgis same pri la korpo kiel pri la animo. Li estis hardita, sobra, sana. Tial li instigis siajn aŭskultantoj al saniga flegado de korpo. Li invitis ilin al gimnastikado en Sokol, al bela sporto, al fondado de kantistaj rondetoj. Sed kiu volas esti juna kaj sana, ne trinku, ne fumu, ne vagadu en kafejoj kaj
noktaj amuzejoj. Pura animo ne povas esti sen pura korpo. Li mem edukis en si tian harmonian homon, ke li rajtis paroli, kiel li parolis. Unu el liaj iamaj lernantoj skribis en la jaro 1910: "Mi konsciigis al mi mian apartan rilaton al Masaryk, senton, kiun mi kutime havis en la rilato al mia patro, fariĝinte matura, senton konscian pri dependeco, kiu premus vin en rilato al iu alia, sed kiu en la rilato al la patro tute perdiĝas en la sentoj de respekto, dankemo, amo."

Profesoro Masaryk kreskis en katolika familio, en sfero de katolika kamparana pieco kaj ĝis la 28a jaro de sia aĝo li estis vera katoliko. Sed efektive vivis en li protestanto. Lia ĉiama spirita streĉeco, serĉanta sian rilaton al Dio kaj al homoj, lia arda, neestingiĝanta "sankta malkontenteco" ne estis katolikaj. Tio estis influo de historio kaj de la lando, en kiu ne ĉesis bruleti cindro de la Husanoj? Ĉi tiu persona protestantismo estis fonto de lia sopiro pri spirita alteco, amo al libera konvinko, al sendependeco rilate aŭtoritatojn. Li konfidis al la propra intelekto kaj apogis sin ĉe sia agado je

konsento de sia konscienco. De tie lia nekoruptebleco kaj pureco de la karaktero.

## MASARYK DUM LA POLITIKA LABORO

Ni aŭdis, kion diris Masaryk pri la religio - laŭ lia konvinko ĝi ligas la homon ne nur al la ĉielo, sed samtempe al la tero kaj vivo. Per tio li diris, ke la religio ne estas io, kio ŝvebas super la mondo, ne estas ĉiela baldakeno super la peka tero, al kiu la pia homo pie rigardas, tio ne estas ankaŭ citaĵoj el la paroloj de Kristo kaj evangelioj: la religio estas esprimo de nia vivo, fonto de impulsoj kaj celoj. Religia homo ne devas eĉ paroli pri sia religio kaj oni ekkonas lian religion laŭ ĉiu paŝo, kiun li faras. Religio estas ĉiutaga laboro inter la homoj kaj por la homoj. Ĉi tiu laboro estas vera diservo, pli rimarkinda ol ĉeestado solenan meson, de pilgrimoj al virgino Maria kaj de procesioj akompanataj de muzikistaro al plej proksima kruco en la kamparo.

Profesoro Masaryk donis al Dio, kio apartenas al Dio, kaj destininte siajn homajn devojn li meditis ankaŭ pri tio, kion li devas fari kiel filo de sia nacio. Masarykon premis nia malgrandeco kaj nia malprogreso inter la popoloj. Tial li ekdeziris okupi la lokojn, kie precipe estis decidate pri la bezonoj de la nacio, li deziris fariĝi deputito en la regna konsilantaro en Wien kaj ano de la ĉeĥa landa konsilantaro en Praha. Li kredis, ke la turmentaj mankoj de nia nacia vivo estas nur dumtempaj kaj ĉesos, se ili estos honeste kuracataj.

Sed pli frue ol Masaryk venis sur la politikan scenejon, li devis travivi malfacilan ekzamenon el siaj realismaj principoj. Li invitis al duelo la publikan opinion de la tuta nacio - pro la vero. Tio estis en la jaro 1886, kiam li komencis la batalon pri tiel nomataj "ĉeĥaj Manuskriptoj".

Nia nacia vekiĝado komenciĝis en la romantika epoko. La romantiko estis aparta eŭropa animstato de kleraj, precipe de artistaj rondoj. La fino de la 18a jarcento nomiĝis kaj estis "epoko de intelekto". Post la epoko de la intelekto - ĉiuj homaj problemoj: la religio, la regado de ŝtatoj, la scienco kaj la arto estis solvataj per intelekto - sekvis epoko de sento. Tial kontrastoj, tiaj balancadoj de la animstato ofte aperas en la historio de la homo. Post plej granda ekscitiĝo dekadenco, post dekadenco ekscitiĝo. Dum la epoko de romantiko, de tiu senta emocio, komencis la poetoj kaj la historiistoj kaj filozofoj enprofundiĝi en plej malnovajn tempojn de paganismo kaj de misteraj diaroj, en la mezepokon, plenan da kavaliroj kun flirtantaj plumtufoj kaj plenan da belaj princinoj. Ili ekŝatis pikantajn kaj sovaĝajn, konfuzajn kaj misterajn okazaĵojn. Krom aliaj aferoj ĉiuj nacioj serĉis siajn originajn radikojn por fieri pro sia antikveco.

En Bohemio estis malkaŝitaj en la jaroj 1817 kaj 1818 du pergamenaj manuskriptoj, poemoj pri Libuše, pri Záboj kaj Slavoj pri Neklan, pri Jaroslav de Šternberk kaj Tataroj.[21]) Unu estis malkaŝita en Dvůr Králové, la alia sur Zelená Hora[22]) ambaŭ rezultigis grandegan entuziasmon, ĉar laŭ ili oni povis konkludi, ke la ĉeĥa nacio estis jam en la 13a kaj 14a jarcentoj tiel klera kiel neniu nacio en Eŭropo, kaj precipe ne Germanoj. La Manuskriptoj estis nomataj juveloj kaj gemoj de la ĉeĥa klereco. Sed en fremdlando (precipe ankaŭ inter Slavoj) laŭtiĝis duboj, ĉu niaj juveloj kaj gemoj estas malfalsaj. El la hejmaj scienculoj deklaris Dobrovský, ke ili estas falsaj. Suspekto pri falseco kreskis kun la kreskanta ĉeĥa lingva kaj historia scienco.

En la jaro 1886 la profesoroj Gebauer[24]) kaj Masaryk publikigis, ke niaj juveloj estas falsaj kaj ke ili ne estis malkaŝitaj en Dvůr Králové kaj sur Zelená Hora, sed verkitaj en Praha de naiva patriota grupo de verkistoj, kiuj intencis

glorigi per ili sian patrujon. Per la menciita publikigo de Gebauer kaj Masaryk estis la tuta nacio ekscitita, kiam la ĝisnuna rondo de maljunaj scienculoj kaj profesoroj ekstaris por defendi malfalsecon de la Manuskriptoj. Masaryk gajnis serion da junaj scienculoj por sia ideo. Montriĝis, ke en la Manuskriptoj sur 16 paĝoj estas pli ol mil gramatikaj eraroj kompare al la ĝusta malnova lingvo, ke en la poemoj estas historiaj malveraĵoj kaj ke la malnovĉeĥa vivo estas tie priskribata laŭ la opinioj, kiujn havis pri la estinteco la homoj el la jaroj 1817-1818. La gvidanto de la disputa batalo estis Masaryk kaj li gvidis ĝin kuraĝe, eĉ kiam liaj kunhelpantoj malkuraĝiĝis. Tial koncentriĝis al Masaryk la malamo de maljunaj scienculoj, de ĉiuj ĉeĥaj gazetoj kaj de ĉiuspecaj naciaj asocioj. Masaryk estis tiu, kiu forprenis de la nacio la sanktan postlasaĵon de la antaŭuloj, kiu forĵetis juvelojn kaj naciajn 70jarajn dogmojn. La dogmojn oni ne esploras, oni kredas ilin.

Ĝuste ĉi tiu batalo estis argumento al profesoro Masaryk, ke ni havas difektojn en nia karaktero. Ĉar multaj eminentuloj, eĉ kiam ili ekkonis, ke Masaryk kaj liaj amikoj estas pravaj, riproĉis lin, ke prefere li estus nenion dironta. Ili ne jesis la konvinkon, ke la scienca vero postulas de scienculoj, ke ili diru la veron kaj ekbatalu persone por ĝia venko. Tio estis neegala batalo de la komenciĝanta realismo kun la malnova romantika mondo. Ĉar ĉi tiu malnova mondo havis en la mano potencon, per kiu ĝi punis la kontraŭulojn de la Manuskriptoj. Ĝi malutilis ilin materie ja eĉ ruinigis ilin. Ĝi estus pardoninta eĉ Gebaueron, se li estus rezigninta je Masaryk, kiu laŭ ĝia opinio estis la malbona spirito. La tuta batalo koncentriĝis al tio, kiel skribis unu ano de la maljunaj, ke Masaryk estu eksigita el la universitato. Profesoro Gebauer defendis Masarykon kaj skribis senpere al Rieger, la gvidanto de la nacio, ke li ne rajtas prijuĝi profesoron Masaryk laŭ tio, ke li

havas multajn malamikojn; "li havas ilin tial, ĉar li estas pli bona ol ili."

La manuskripta batalo estis komenco de revolucio, dume literatura, kiun havis profesoro Masaryk en si; ĝi estis batalo kontraŭ la nemorala nacia karaktero. Kiam mi komencis eldonadi kun rondo de plej junaj samideanoj de Masaryk malgrandan gazeton "Čas" (La tempo) kaj kiam en ĉi tiu gazeto ni demandis nin, ĉu la nacio estas sekurigita por la estonteco, la ĵurnalo "Národní Listy" (Naciaj Folioj) konkludis, ke la artikolon verkis profesoro Masaryk, eksigis lin el la nacio kvazaŭ perfidulon.

## MASARYK DEPUTITO KAJ POLITIKA VERKISTO

Ho, kiel mensogema estis nia tiama vivo! Kvar jarojn post la supre menciita manuskripta luktado intertraktis jam la maljunĉeĥa politika partio kun profesoro Masaryk, ke li, profesoro Kaizl kaj dro. Kramář kun la grupo de realistoj aliĝu al la maljunĉeĥa partio. Post kiam la intertraktado kun dro. Rieger ne sukcesis, komencis intertrakti dro. Julius Grégr, ĉefo de la junĉeĥa partio kaj ankoraŭ en novembro 1890 oni bonvenigis Masarykon kun lia grupo en la partio, kies ĵurnalo antaŭ tri jaroj malbenis lin kaj ĵetis nacian interdikton sur lian kapon.

La 4an de marto 1891 Masaryk en la junĉeĥa partio estis elektita deputito en la regnan konsilantaron por la urboj de la Šumava[26]-regiono. En la viena parlamento li fariĝis baldaŭ atentinda. Precipe la l8an de novembro 1892 dum la grava parolado pri la vidpunkto, kiun nia nacio okupis rilate Aŭstrion. Li parolis, ke ni postulas, ke la ĉeĥaj landoj fariĝu sendependaj, por ke ni povu decidi pri ni mem, ke ni ne estas malgranda nacio, ke la posteno de la ĉeĥa nacio estas

tuteŭropa kaj tutmonda kaj ke la juna generacio rigardas Aŭstrion laŭ tute alia vidpunkto ol la pli maljuna. La parolado de Masaryk tiom ekscitis Germanojn, ke la deputito Menger ekkriis al Masaryk: "Patrujperfidulo!" Same ekscitadis Masaryk la registarajn rondojn kaj la imperiestron mem, kiam en la t. n. delegacioj[27] li kondamnis aŭstrian ŝtatan administradon pro tio, ĉar ĝi malutilas Bosnion kaj Hercegovinon, kiujn Aŭstrio administras sole provizore. Nome prof. Masaryk vizitis en la jaro 1891 Bosnion kaj kolektis de la loĝantaro kaj de eminentuloj plendojn pri la mastrumaĉo de Madjaroj, de la eklezio kaj de ĉiuspecaj oficistoj.

Sed tiam plenumis Masaryk siajn deputitajn mandatojn en Wien kaj ankaŭ en Praha netutajn 3 jarojn. Li rezignis je ambaŭ mandatoj en somero 1893. Li havis kelke da kaŭzoj, sed la ĉefa (krom personaj ĉagrenoj) estis tiu, ke li ne estis kontenta pri la junĉeĥaj kolegoj, kies agado estis hazarda kaj senprograma. Liaj propraj opinioj estis komprenataj nek de la deputitoj nek en la nacio. Ĉio estis sekvo de la hejma malbonstata politika klereco. Profesoro Masaryk vidis, ke lia laboro devas komenci hejme.

En la jaro 1893 komenciĝas la memorindaj konsciigaj laboroj, per kiuj dum kelke da jaroj li emociis kaj vekis la ĉeĥan societon. Unue li ekprelegis en la universitato kaj samtempe li faris nacie misiistajn vojaĝojn tra ĉeĥaj urboj por paroladi al la popolo. La aŭskultantaro en la universitato akceptis Masarykon kun ovacioj. Li komencis redakti monatan gazeton "Naše Doba" (Nia Tempo), kiu ne estis plu gazeto nur scienca kiel "Athenaeum" el la jaro 1883. En "Naše Doba" destinita al la tuta inteligentularo li prezentis al si la ĉefan demandon: kiu kaj kia estas la loko de nia nacio en la vico de la eŭropaj nacioj, kia estas nia posteno en la evoluo de la homaro? La revuo intencis kalkuli, kio estas propra al ni kiel

nacio, kion ni donis al aliaj kaj kion ni akceptis de aliaj. Ni volas nin laŭcele ekkonadi, ĉar ni devas scii, kiel daŭrigi nian evoluon. Tria vekiga laboro de Masaryk estis konservita en kvin libroj, kiujn li eldonis rapide unu post la alia, nome: "Česká otázka" (La ĉeĥa problemo), "Naše nynější krise" (Nia nuntempa krizo), kaj "Jan Hus", kiuj ĉiuj aperis en la jaro 1895. La jaron poste sekvis pli granda verko: "Karel Havlíček",[17)] kiun adoris Masaryk de sia junaĝo, kaj en la jaro 1898 "Otázka sociální" (Socia problemo).

Per la ideoj de ĉi tiuj libroj komenciĝis bolado en la nacio. Oni legis la librojn de Masaryk, oni aŭskultis la paroladojn, en Bohemujo kaj Moravio ekkreiĝadis rondetoj de liaj partianoj. En la menciitaj kvin libroj estas deponita nia nacia kateĥismo kaj, eĉ se la nacio dankon al Dio kaj al Masaryk liberiĝis de la habsburga subuleco, la plejmulto de liaj tiamaj instruoj validas ankoraŭ nun. La senco de ĉio estas: se vi diras, ke vi estas Ĉeĥo, vi devas scii, kion vi estas faronta kaj kion ne. Vi unuopulo kaj ni ĉiuj, kiuj ni konsistigas la nacion, devas havi ĉeĥan porvivan programon. Se la vivo de pensantaj homoj ne fariĝu nur ĉeno de unuopaj hazardaĵoj, ilia tuta idea laboro kaj iliaj praktikaj agoj devas havi iun bazon, ian filozofian fonton, el kiu nia agado elfluas.

## GLORAJ NAŬDEKAJ JAROJ

Kiuj travivis la naŭdekajn jarojn de la pasinta jarcento ĉu junuloj ĉu maljunuloj, ĉiuj rememoras ilin kun entuziasmo aŭ almenaŭ kun admiro. De post la jaro 1848 okazis en nia nacio nenio, kio similus ilin. "Novaj tendencoj" oni nomis tiun movadon, kiu amase penetradis en la literaturon kaj teatron, kiu sopiris ekkoni idean eŭropan mondon kaj tial tradukis el ĉiuj literaturoj, kiu donis pli alian direkton al la politika meditado, kiu entute plialtigadis postulojn de la vivo kaj

vigligadis la sangon en la vejnoj. Oni fondadis novajn gazetojn, novajn asociojn. Unuavice la junularo akceptis la novan spiriton; oni nomis tiujn junulojn "progresemuloj." Ni maljunuloj enviis la junulojn pro la feliĉa, emocia, riĉa epoko, dum kiu ili kreskis. La poeto J. S. Machar[28)] skribis en la jaro 1894 al juna amiko: "Progresemuloj - estas junaj viroj, ili estas partio, kiu en Bohemio ĝis nun entute ne ekzistis. Kiaj ni estus povintaj fariĝi, se ni estus kreskintaj kaj maturiĝantaj laŭ tiaj tendencoj!"

Tiu, kiu malfermis la fenestrojn kaj la pordojn al la novaj tendencoj, estis T. G. Masaryk. Rilate la ideojn de Masaryk neniu povis resti indiferenta. Oni devis paŝi kun li aŭ kontraŭ li, sed ne vidi lin, preterpasi lin ne estis eble. "La ĉeĥa problemo" aperis antaŭ la okuloj de pensantaj homoj kvazaŭ fonto, kiu elŝprucis el roko, kvazaŭ dia rivelo. Masaryk, kiu starigadis ĝin antaŭ la okulojn, ne parolis plu pri la ĉeĥa lingvo, sed pri la veroj, kiujn ni devas deklari per la ĉeĥa lingvo.

La naŭdekajn jarojn rememoras ne nur ni Ĉeĥoj, sed ankaŭ aliaj Slavoj. La aferon helpis iomete hazardo. En Praha studis de post la aŭtuno 1895 ankaŭ kroataj studantoj. Ili estis forbruligintaj madjaran standardon en Zagreb, dum kiam estis en la urbo la imperiestro Francisko Josefo, ili estis eksigitaj el la zagreba universitato kaj la famo pri Masaryk, kiu disvastiĝis en la slava sudo de post lia bosnia vizito en ta jaro 1891, irigis ilin al Praha. Ĉi tiuj studantoj ekaperis kvazaŭ salte en la prelegejo de Masaryk. Tie oni renkontis ankaŭ studantojn slovenajn kaj fratiĝis kun ili. Ili komencis eldoni en Praha gazeton "Hrvatska misao" (Kroata penso), kiu propagandis la tendencojn de Masaryk. Kroatoj influis ankaŭ serbajn studantojn en Zagreb. Ili interŝanĝadis siajn ideojn kaj alproksimiĝis reciproke, la serba junularo fondis ankaŭ gazeton progreseman, realistan.[29)] Kiam pli poste en la

zagreba parlamento kreiĝis politika unuiĝo de Serboj kaj Kroatoj, kiu venkis la ĝistiaman ĵaluzemon kaj precipe la religian kolizion - Kroatoj estis katolikoj, Serboj grekrituloj - tio estis verko de Masaryk, verko feliĉa kaj venka, ĉar ĝi havigis al la lando rezisteman plimulton kontraŭ la madjara registaro.

Feliĉokaze estis alkondukitaj al Praha ukrainaj studantoj el Galicio. Kelkaj ankaŭ estis eksigitaj el la pola universitado en Lwów. Ili serĉis azilon en Praha.

Ĉi tiun sukcesplenan agadon de profesoro Masaryk interrompis bedaŭrinda afero - la Hilsneriado, kiel oni nomas ĝin de post tiu tempo. En marto 1899 estis mortigita knabino en arbaro apud Polná 30) Ŝia kolo estis tranĉita. Ĉar rabenoj kaj laŭritaj hebreaj buĉistoj tiel tranĉas la kolojn al bestoj laŭ la ordono de Moseo, famiĝis, ke hebreoj tranĉis la kolon al la malfeliĉa knabino por elĉerpi el ŝi kristanan sangon, kiun ili laŭdire uzas dum siaj laŭritaj ceremonioj aŭ enigas ĝin en siajn manĝaĵojn. Suspekta pri la mortigo fariĝis vagema almozpetanta hebreeto Leopold Hilsner kun iuj siaj nekonataj kunuloj. La asiza tribunalo en Kutná Hora kondamnis Hilsneron al la morto evidente pro rita mortigo. Kontraŭ la verdikto de la asiza tribunalo ekbatalis profesoro Masaryk kun granda indigno. Li pruvis en du verketoj, ke nenio atestas la hebrean mortigon, ke la kuracista prijuĝo kaj la tuta esploro de la mortigo estis maldetala kaj partia. La efiko estis, ke ta plej alta tribunalo en Wien ordonis novan esploron kaj novan asizan procedon en Písek.30)

Kontraŭ profesoro Masaryk komencis incitegi du partioj: la klerikala, gvidata de la pastraro, kaj la radikala, kiu malŝatis Masarykon pro lia opinio pri la revolucio. Profesoro Masaryk ne estis malaprobanta revolucion senescepte, sed li avertis la nacion ludeti per revolucio, kion ĝuste faradis radikaluloj.

Gazetoj de ambaŭ partioj kriadis, ke Masaryk defendas hebreon, por kio sendube li ricevis multe da mono, ke denove montriĝis, ke li ne posedas patriotan senton. Ambaŭ partioj sukcesis en novembro 1899 amasigi en la prelegejon de Masaryk en la universitato multe da nematuraj studantoj el tuta Praha kaj eĉ nestudantoj, kiuj atakis Masarykon, malhelpadis la prelegojn per kriegoj kaj per insultoj je la instruisto. Kaj tamen profesoro Masaryk ne havis eĉ nur intencon defendi hebreon; li defendis la ĉeĥajn kristanojn, avertis ilin pri absurda superstiĉemo. Hebreoj ne havas tian superstiĉon, nur la kristanoj imputas ĝin al ili kaj, kio estas plej malĝojiga ĉe la tuta afero, ĝuste la klerikaloj kaj la pastroj. Temas pri antisemita, pure klerikala superstiĉo. La malhonoro pro ĝi falas sur la tutan nacion, ĉar en la jaro 1899 eĉ akademiaj kleruloj, juristoj kaj kuracistoj elmetis sian nacion al skandalo antaŭ la tuta mondo. "Nacio - skribis tiam Masaryk - kiu tiel senpense kredas al klerikala rita superstiĉo, kredas nature al ĉiuj superstiĉoj. . . Dum mia laboro estis al mi ĉiam pli kaj pli klare: La rita superstiĉo terure akuzas la ĉeĥan nacion."

Tiu, kiu meritis estimon tial, ĉar li defendis la bonfamon de sia nacio, estis turmentata kaj trenata sur la nacian pilorion same, kiel la unuan fojon dum la luktado kontraŭ la kreda superstiĉo al la falsaj manuskriptoj.

Post tiuj ĉi malhonorigoj kaj ofendoj, ĝuste de la junularo, kiujn li ĝisvivis dum aplaŭdo de la nacio kaj dum pasiva (eble ie ankaŭ malica) asistenco de la plejmulto de la universitataj kolegoj, post ĉio ĉi Masaryk estis tiom emociita, ke li komencis dubi pri sukceso de sia laboro en la nacio. Li amis fidele la nacion; li servis al ĝi dudek jarojn dum persona abnegacio, li rajtis diri kun Dobrovský:[23] "De kie mia amo al la nacio? Sur akceptitaj bonfaroj ĝi certe ne baziĝas!" Tiam li decidiĝis paki la valizojn kaj transloĝiĝi eksterlanden. Tiun ĉi

intencon ekkontraŭstaris sinjorino Masaryk. Ŝi sentis sin Ĉeĥino kaj estante Ĉeĥino ŝi ne volis forlasi la nacion, kies filino ŝi fariĝis.

Sed la civitanaro de Masaryk ne estis plu malgranda. Ni estis kelkaj, kiuj ni diris al ni, ke ni ŝanĝos ĉi tiun nevideblan eklezion en videblan. Per tio oni komprenis fondi videblan partion de Masaryk. Ni sukcesis gajni profesoron Masaryk por tiu ĉi ideo, eĉ por alia, nome fari ĵurnalon el la ĝisnuna semajna gazeto "Čas". Ĵurnalo estis necesa eĉ por defensivo eĉ por ofensivo kaj baldaŭ akiris inter ĉeĥaj gazetoj rimarkindan lokon. Dum la kvin unuaj jaroj de nia jarcento profesoro Masaryk laboris per vorto kai plumo por veki la ĉeĥan intelekton kaj la ĉeĥan konsciencon. La homan malicon li ne atentis kaj baldaŭ li forgesadis ĝin.

Eble la Providenco sendas kruelajn ekzamenojn al homoj kiujn ĝi elektis por grandaj celoj. Ĝi amasigas malhelpojn sur ilian vojon por veki en ili forton kaj prepari ilin por la lasta verko, en kiu fine ili estas venkontaj. Ĝi ne konsentas al ili facilan venkon, des-malpli ripozon. Ĝi ne konsentas! Profesoro Masaryk iam mem diris tion pri si. Oni povis esperi, ke lia partio akiros multe da samcelanoj. Sed la vojon baris la Hilsneriado! Tiam li diris al profesoro en Kroměříž[6)] al unu sia iama studanto: "Mi volus bategi min, kiam ajn mi rememoras, kiel mi siatempe ekatakis en tiu afero de Hilsner, sed mi ne kapablis agi alimaniere, io instigis min, mi devis." Tiel influas maljustaĵo la senton de justa homo - li ne kapablas silenti, eĉ se li fordonas sin al la pereo.

*

En la jaro 1907 eniris profesoro Masaryk la duan fojon la aŭstrian parlamenton en Wien. La unuan fojon en la jaro 1891 li estis elektita deputito en urboj de la Šumava-regiono, nun la

duan fojon en urboj de la moravia Valaĥio.31) Aŭstrio akceptis universalan voĉdonrajton al la parlamento, por kiu profesoro Masaryk ĉiam fervore laboris kaj ĉi tiu voĉdonrajto alportis al li deputitan mandaton.

Dum la tempo de post la fondo de la propra partio ĝis la valaĥia elekto travivis profesoro Masaryk multajn malfacilajn luktojn. Li devis defendi sin kontraŭ kalumnioj de dro. Rieger; li devis defendi sin kontraŭ junĉeĥa ĵurnalo, kiu kulpigis lin, ke li disvastigas la devizon: "For de Romo!", per kiu li laboras por la prusa reĝo; li staris antaŭ la tribunalo en Praha unue, ĉar li estis kulpigita de 308 kateĥistoj tial, ĉar li diris en iu kunveno: "Tia kateĥisto ne estas gardanto de la religio, li estas de la ŝtato pagata denuncianto"; poste li estis akuzata de la prokuroro pro ofendo de la religio. En ambaŭ procesoj li estis malkondamnita. La akuzo de la prokuroro vekis atenton ankaŭ en Germanujo. En la gazeto: "Die christliche Welt" (La kristana mondo) priskribis germana pastro Masarykon viro religia kaj demandis la legantojn: "Ĉu vi povas imagi, ke Eucken (germana religia filozofo) estus persekutata pro ofendo de la religio? En Aŭstrio estus tio ebla. Homo, kiu ne havas religion, estas tie konsiderata kristano, dum kiam li subiĝados al la eklezio. Sed havi religion, mediti pri ĝi kaj defendi ĝin - povas en Aŭstrio konduki en malliberejon".

La malamo de la katolikaj rondoj kontraŭ Masaryk estis tiom granda, ke la pastroj antaŭ la voĉdonado en la valaĥiaj urboj elmontris eŭkaristion, kion oni faras kutime por forigi peston aŭ ĥoleron, ja eĉ eldonis kontraŭ Masaryk specialan litanion, en kiu ili nomis lin kandidato de la hebreoj.

Nek la eŭkaristio, nek la litanio helpis. Masaryk estis elektita - kaj tio estas rimarkinda - de katolikoj. Ni estas nacio eble je 80% katolika, sed iel nekonsekventa, por fremduloj mirinda. La nacio estas

katolika kaj en siaj landoj ĝi konstruas monumentojn al Hus kaj Komenský. Kiam oni metis fundamentan ŝtonon al la monumento de Hus sur Staroměstské náměstí (malnovurba placo) en Praha, la domoj de ĉiuj katolikoj estis ornamitaj per standardoj. Sole tiu parto de la romaj katolikoj, kiu estas gvidata de la pastraro, konsistigas apartan politikan partion kaj tiu ĉi partio kompreneble neniam interpaciĝos kun Masaryk kaj kun neniu viro, kiu posedas progresemajn opiniojn.
Post la elekto forveturis profesoro Masaryk je kelke da monatoj Amerikon por partopreni religian kongreson en Boston. Post la kongreso li vizitis urbojn, en kiuj loĝas niaj samnacianoj kaj faris al ili serion da paroladoj pri religio, politiko, demokratio, progresemo kaj entute pri niaj kulturaj bezonoj.

*

En la regna konsilantaro en Wien de post la unua kunsido ĝis la jaro 1914 ludis profesoro Masaryk rolon, kian tie ankoraŭ neniu Ĉeĥo ludis. Li eniris la aŭstrian parlamenton kun alia konvinko ol en la jaro 1891. Tiam li ankoraŭ kredis ie la estonteco de Aŭstrio kaj je ebleco, ke la ĉeĥa nacio atingos en ĝi kontentigon. Li kredis tiam, ke estos eble ŝanĝi Aŭstrion en ŝtaton justan al ĉiuj siaj nacioj, en ŝtaton progreseman, neregatan de Romo. Tial oni diras, ke Masaryk tiam estis orientita aŭstrie same kiel la junĉeĥa partio. Sed inter ili ambaŭ estis diferenco. Dum la plimulto de la ĉeĥa deputitaro akceptis la principon, ke ĝi servos al la habsburga dinastio kaj al la aŭstria monarkio por eldevigi rekompencon al sia nacio per la servo, dum ĉi tiu plimulto evitis tial ĉiujn naciajn deklarojn, kiuj estis malagrablaj al imperiestro kaj al la registaro (oni nomis tion oportunismo): profesoro Masaryk neniel moderigis sian ĉeĥan vidpunkton kaj postulis, ke la

dinastio kaj Aŭstrio akceptu kaj agnosku nin tiaj, kiaj ni estas - ni estas popolo adoranta Huson kaj la ĉeĥan reformacion, ni estas popolo slava amanta ankaŭ Rusujon, malamatan de Aŭstrio kaj ni estas popolo de post nia revekiĝo progresema, malamanta mallumon kaj malprogresemon en la lernejoj kaj en la tuta vivo. En la jaro 1907 havis jam Masaryk en si la reziston kontraŭ la dinastio kaj la monarkio. La ĉeĥa ideo ne akordiĝis kun la aŭstria ideo.

Ĉiu padamenta ago de Masaryk en Wien estis okazaĵo. Dufoje li ekdefendis civitanan liberecon. La urbestro de Wien dro. Lueger eldonis devizon dum la klerikala kongreso en la jaro 1907, ke lia partio devas venkakiri la universitatojn, kiuj estas kovejoj de malbono, kampo por renversaj ideoj, por revolucio, por senreligieco kaj nepatriotismo. Profesoro Masaryk ribeligis kontraŭ I.ueger progresemajn deputitojn de ĉiuj partioj kaj invitis la registaron, ke ĝi diru, kion ĝi opinias pri la plano de Lueger. Per du paroladoj pri la rilato inter la religio kaj scienco, pri la dekadenco de la katolikismo kaj pri la klerikala perforteco li ekinteresis la tutan partamenton. La ministro por la lernejaj aferoj deklaris, ke la libereco de altaj lernejoj kaj de la scienco estos protektata. La klerikaloj por ne esti venkitaj voĉdonis por la urĝa propono de Masaryk. Ĉi tiu parlamenta ago de Masaryk estis ne nur lia persona sukceso, sed ankaŭ sukceso, kiu honorigis nian nacion antaŭ la fremdlando, ĉar montriĝis, ke Ĉeĥoj estas en Aŭstrio gvidantoj de la progreso kaj liberalismo. La saman sukceson akiris profesoro Masaryk en la jaro 1908, kiam li ekprotektis Wahrmundon, la profesoron de la eklezia juro en Innsbruck, kiu nepre ekstariĝis kontraŭ la opinioj de la papo Pio X.

La plej grava ago de Masaryk dum lia tiutempa plenumo de la deputita mandato estis lia atako kontraŭ la aŭstria ministerio por eksterlandaj aferoj. En la jaro 1909 oni preparis en Zagreb 53 pendigilojn por supozataj perfiduloj de la

patrujo. Estis akuzataj tie 53 instruistoj, pastroj, komercistoj kaj agrikulturistoj kroataj kaj serbaj, ke ili en sekreta societo laboris al renverso de aŭstria-hungara ŝtato per tio, ke ili intencis forŝiri Bosnion kaj Hercegovinon de la monarĥio. La aŭstria imperiestra kaj reĝa registaro interŝovis fiktivulon, kiu denuncis tiujn kompatindajn homojn. Profesoro Masaryk vizitis Zagrebon kaj Beogradon kaj malkaŝis antaŭ la regna konsilantaro la diablan planon de la registaro, kiu per fiktiva asocio intencis postpravigi, kial ĝi en la jaro 1908 aligis al la regno Bosnion kaj Hercegovinon, kiujn ĝi sole administris de post la jaro 1878, dum kiam la suvereneco al ambaŭ landoj restis al Turkujo.

Profesoro Masaryk savis tiujn 53 kulpigitojn. En dua proceso en Wien, kie Jugoslavoj akuzis la historiografon Friedjung, kiu kontraŭ Jugoslavoj aperigis skribajn dokumentojn pri ilia patrujperfido, profesoro Masaryk kiel atestanto pruvis kulpon de Friedjung pri tio, ke liaj dokumentoj estas aferoj senhonte falsitaj 1aŭ instrukcio de Aehrental, la ministro por eksterlandaj aferoj, kaj ke falsis ilin la aŭstria ambasadorejo en Beograd, precipe la grafo Forgách, helpata de obskura agento Vasiĉ. La viena proceso estis ĉesigita laŭ ordono de la imperiestro kaj Friedjung estis venkita. La kortego ektimis skandalon, ĉar malsekretiĝis, ke la falsitajn dokumentojn oni montris ankaŭ al la tronheredonto Francisko Ferdinando, kiu volis gajni per ili kontraŭ Serbujo la germanan imperiestron Wilhelm lI.

Tio estis grandioza duelo, al kiu Masaryk invitis la ministron Aehrental. Li venkis lin en la delegacioj ankoraŭ en la jaroj 1910 kaj 1911 kaj per germana verko, en kiu li publikigis kaj klarigis la falsitajn dokumentojn. Post ĉi tiuj okazaĵoj la nomo de Masaryk fariĝis konata en la tuta Eŭropo. En la historio de aŭstria politiko estis tio tre malofta okazaĵo, ke deputito venkis la ministron por eksterlandaj aferoj. Sed

samtempe estis tio batego por la tuta monarĥio, kiam evidentiĝis al la mondo, per kiaj armiloj laboras ministro de la habsburga imperiestra domo. Profesoro Masaryk memkompreneble fariĝis favorato de ĉiuj Jugoslavoj, lian nomon konis tie ĉiu homo, kiu sciis legi. Nia franca amiko Denis32) skribis tiam pri Masaryk: "Pro lia merito malgranda ĉeĥa nacio staris granda kaj nobla antaŭ la tuta mondo. Oni vidis, ke la gento de Hus, Komenský, Palacký, kaj de Havlíček ĝis nun ne pereis."

Post kiam profesoro Masaryk finis ĉi tiujn venkajn batalojn, li revenis al sia longtempa laboro kaj pretigis al preso du grandajn volumojn "Russland und Europa" (Rusujo kaj Eŭropo) en la germana eldonejo ĉe Diederichs en Jena. Ĉi tiu verko diskonigis la nomon de Masaryk en la mondo ne nur inter la scienculoj, sed ankaŭ inter la politikistoj. En ĝi estis deponita detala kaj profunda kono de Rusujo kaj tiel dirite antaŭdiro, ke la cara Rusujo staras antaŭ grandega revolucio. La rusa revolucio post la perdita rusa-japana milito en la jaroj 1905-1906 estis nur antaŭludo de teruraj renversoj. La caro estis devigita doni al la popolo parlamenton (dumaon), sed tuj poste li malhelpis ĝian agadon. "Ni pripensu nur - skribis Masaryk - la registaro de la caro-papo, kiu derivas siajn rajtojn de Dio kaj por Dio, kiu ne volas esti responda pro siaj agoj al la dumao, sed sole al Dio, uzis dum longa tempo murdiston Azevon por sekurigi la personon de la caro, kiam la murdoj de Azev estis jam malkaŝitaj kaj publikigitaj!..... La absolutismo estas morale kaj tial ankaŭ laŭjure danĝera al la societo kaj al la ŝtato kaj estas neeble devigi ĝin al ŝanĝo per moderaj rimedoj. . ."

Masaryk parolis pri la rusa absolutismo, sed li certe celis ĉiun absolutismon, ankaŭ la habsburgan!

En la tempo, antaŭ kiam estis eksplodinta la mondmilito, Masaryk ŝanĝis jam la pensmanieron de granda parto de la

nacio en la senco de siaj opinioj. En Bohemujo, Moravio, Silezio eĉ en Slovakujo li havis sindonajn disĉiplojn.

## T. G. MASARYK REVOLUCIULO

La 28an de junio 1914 estis murdita en Sarajevo la heredonto de la habsburga trono Francisko Ferdinando. La murdon efektivigis serbaj junuloj pro malamo al la Aŭstria-Hungaria imperio, kiu senĉese turmentis Serbujon kaj klopodegis finfine pereigi ĝin. Procesoj kontraŭ la jugoslavaj ŝtatperfiduloj estis sole provo por ekinciti Serbujon al iu nepripensita ago, por ke la aŭstria armeo povu ataki Serbujon, kvankam venkan, sed tamen malfortigitan de la milito kontraŭ Turkujo 1912-1913. Pri la murdo de la tronheredonto kulpigis la aŭstria registaro Serbujon. Ĉio estis sole preteksto. La serba registaro ne estis kulpa pri la ago de kelkaj patriotaj junuloj. Male Serbujo estis pacama kaj el Beograd oni provadis proksimigi Serbujon al Aŭstrio-Hungario, kies militistaj rondoj delonge estis preparitaj kontraŭ Serbujo. La serbaj pacemaj provoj estis rifuzataj en Wien kun malestimo. Unu el la perantoj de la paco estis ankaŭ profesoro Masaryk. Posedante same grandan estimon eĉ en Aŭstrio eĉ inter Jugoslavoj li estis elektita de la serba ministro-prezidanto Paŝiĉ, kiu donis al li plenpovon, por ke li prezentu al la aŭstria registaro serbajn proponojn, kiuj ĉe bona intenco de Aŭstrio estus devintaj okazigi bonan najbarecon de Serbujo al la habsburga imperio. Supermezure estis de tio, de kio Serbujo cedis al Aŭstrio la plej grandajn avantaĝojn. Profesoro Masaryk prezentis la serbajn proponojn al la grafo Berchtold, la aŭstria ministro por eksterlandaj aferoj. Sed Berchtold rifuzis profesoron Masaryk malvarme kaj embarase. Tute male venigis poste Berchtold en sian ministerion al Wien la ambasadoron Forgách, kies kulpo pri la falsado de la

dokumentoj en Beograd estis antaŭe pruvita kaj kiu estis malamikego de Serbujo. La atenco en Sarajevo estis preteksto por militiro de aŭstria-hungaria armeo kontraŭ Serbujo kaj per tio ekfuriozis la terura mondmilito en aŭgusto 1914. Profesoro Masaryk antaŭvidis la militon. Antaŭvidante la militon li supozis, ke la pulvo eksplodos sur Balkano. Tial printempe en la jaro 1914 antaŭ la murdo en Sarajevo kaj ankaŭ somere post la murdo li serĉis vojojn, kiel interpacigi Serbujon kaj Bulgarujon, inter kiuj ekzistis mortiga malamikeco. La milito trafis profesoron Masaryk en Germanujo. Ĵus tiam li celis al Paris kaj London por instigi la du grandpotencojn, ke ili provu per diplomataj rimedoj interpacigi la du balkanajn naciojn. La milito estis iam proklamita kaj li esperis ĉiam ankoraŭ, ke restos ĉe nura armado kaj tintado per sabro. Sed la majesta nobelaro ektimegis pro nenio kaj detrueme ĝi intermetis sin en la sorton de ĉiuj nacioj, kiuj estis tuŝitaj de la milito.

Kie estis la posteno de la ĉeĥa nacio en la mondmilito? Ĉie, kie ne estis Aŭstrio; ordonis tion la sento de la nacio subpremata de Aŭstrio dum tricent jaroj. Kompreneble la sento, sed ĉu ankaŭ la prudento? Prezidanto Masaryk rakontis kaj ankaŭ skribis kelkfoje; kio bruegis en lia koro. Kiam la milito trafis lin en Germanujo kaj li ne povis reveni, ĉar ĉiuj trajnoj estis rezervitaj por la armeo, li observadis la germanan mobilizadon. Lia impreso pri la germana ordo, preteco kaj batalemo ne nur de la soldatoj, sed ankaŭ de la civitanaro estis tre afliktanta. Li vidis, kiel grandega, frakasa potenco estas tiu Germanujo. Sed kiam li revenis al Praha, alia impreso estis pli forta kaj devigis lin mediti. Tio estis la impreso pri niaj soldatoj. Ili estis forirantaj al ta batalkampo malvolonte. Profesoro Masaryk observis kelkajn regimentojn kaj taĉmentojn, dum kiam oni kondukis ilin al stacidomoj en Praha. Ili havis slavajn aŭ ĉeĥajn standardetojn kaj unu regimento marŝis eĉ sub grandega standardo. La oficiroj,

kvankam furiozantaj, tamen ne kuraĝis en Praha interveni kontraŭ la soldatojn. Profesoro Masaryk ankaŭ legis aŭ aŭdis, kiel niaj soldatoj skribis per kreto en la vagonoj la ekkriojn: "Eksporto de freŝa ĉeĥa vianda al Serbujo" aŭ "al Rusujo". Jam dum la marŝo tra Praha ili laŭte kantis adaptitan popolan kanton: "Turniĝu ĉirkaŭen, ho ruĝa tuket', ni Ruson atakas, sed sen kialet'". Kaj baldaŭ poste oni aŭdis, ke en la fronto ili rifuzis batali, ke ili kapitulaciadis al Rusoj aŭ estis pro malobeemo punataj. Profesoro Masaryk skribis: "Mi ekhontis, ke ni politikaj gvidantoj estis senkonsilaj ankoraŭ en la momento, kiam niaj soldatoj jam ekrevoluciis. Tiu movado naskiĝis efektive el la popolo. Mi sentis, ke niaj soldatoj faras tion, kion ni - gvidantoj - predikis. Slavan programon havis ja ĉiuj niaj partioj kaj aprobis ĝin, sed niaj soldataj komencis efektivigi tiun programon dum novaj penigaj momentoj; respektante nek la vivon, nek la morton. . . Kiam mi aŭdis, kiel agas miaj balotintoj, tiam mi diris al mi mem: Ankaŭ vi devas nun plenumi vian devon!"

Tiu devo estis - revolucio kontraŭ Aŭstrio, sed ne devo pro ekscitiĝo aŭ kolero, blinda devo. Profesoro Masaryk volis esti informifa de ĉiuj flankoj pli frue, ol li decidiĝos koncerne la revolucian procedon: Li kolektis sciigojn el ĉiuj militantaj ŝtatoj kaj komparis ilian forton, persone li veturis al Wien kaj Berlin por ekscii, kian planon havas la kompetentuloj pri nia nacio post la milito. Li aŭdis de aŭstriaj kaj germanaj politikistoj, ke ni fartos ankoraŭ pli malbone, se Aŭstrio kaj Germanujo venkos. Persone 1i veturis Nederlandon, kien li ricevis respondojn, kion opinias Anglujo kaj Francujo pri la milito kaj kiajn planojn havas la Kvaralianco.

Tiam decidiĝis profesoro Masaryk komenci la revolucion. Cetere en Praha li vidis la komencojn de tio, kial la kortego kaj la militista kaj civila registaroj traktas nin. La polico fermis la buŝojn al ĉiuj partioj. Pli frue ol la milito estis

proklamita oni sendis hejmen la deputitojn el la regna konsilantaro kaj per tio oni forprenis de ili la deputitan netuŝeblecon (imunecon). Kaj hejme ili ne povis kunveni, por ke oni ne suspektu konspiron en iliaj kunvenoj. La gazetoj estis tiom perfortataj, ke ili rajtis skribi pri la milito nur tion, kion la polico liveris al ili. Aliokaze estis ĉio konfiskata kaj punata. Multaj seriozaj gazetoj estis entute ĉesigitaj unu post la alia.

La l7an de decembro profesoro Masaryk fuĝis eksterlanden, la filino Olga kun li. Plej frue li fuĝis ltalujon por en Romo kunveni kun la tieaj kaj jugoslavaj politikistoj kaj akiri informojn en fremdaj ambasadorejoj. Dum la kristnasko 1914 li estis jam en Svisujo kaj inter glacimontoj tuŝantaj la ĉielon li pripensis la revolucian planon. En nia nacio estis ja sufiĉe da revoluciema konvinko, sed la konvinko ne sufiĉas. Revolucio komenciĝas tiam, kiam iu komencas fari ĝin. En la lito neniu ellernos naĝi. Hejme la revolucio ne komencis kaj ne povis komenci. Niaj soldatoj, eĉ se ili opiniis des pli obstine pri la milito, lasis konduki sin al la fronto, ĉar en la kortoj de la kazernoj staris pendigiloj. La politikistoj ne povis moviĝi kaj al ribelo povis konsili sole aventurulo aŭ provokanto. Tiu silento en niaj landoj embarasis ankaŭ kelkajn niajn amikojn en Francujo; ili supozis, ke la ĉeĥa nacio rezigne kontentiĝis je la milito.

Se la revolucio ne povis aperiĝi hejme, ĝi devis aperiĝi ekster la limoj. Profesoro Masaryk restis en Svisujo ĝis aŭtuno 1915. Ĉiun momenton li febre uzis por veki niajn eksterlandajn ĉeĥajn koloniojn. Tie en Ameriko, en Rusujo, en Francujo kaj Anglujo estis montrote, kiel opinias la ĉeĥa nacio. Profesoro Masaryk sukcesis unuigi je unu plano la ĉeĥajn koloniojn, kiuj havis jam revolucieman konvinkon, aliajn ĉeĥajn koloniojn li sukcesis veki al agado. En marto 1915 li dissendis cirkuleron al ĉiuj kolonioj, al gravaj

organizaĵoj kaj al prezidantoj de ĉeĥoslovakaj asocioj en fremdlando. La cirkulero efikis prosperige. La kolonioj deklaris, ke ili rigardas Masarykon unusola gvidanto. En aprilo 1915 veturis profesoro Masaryk al Paris kaj London por ekscii la vidpunkton de la militantaj potencoj. Jam en Svisujo intertraktis profesoro Masaryk kun la franca scienculo A. Denis[32)] la verkinto de la ĉeĥa historio pri la tempo de Hus kaj de Georgo el Poděbrady,[33)] de "Bohemio post la Blanka Monto ĝis la nunaj tagoj", kaj en Paris li fintraktis kun Denis la aferon, li transprenis la taskon eldonadi por la ĉeĥa revolucio la gazeton "La nation tchéque" en Paris. Samtempe li fondis ĉeĥan revolucian gazeton "Československá Samostatnost" (Ĉeĥoslovaka sendependeco) en Svisujo, kiun gvidis dro. Ladislav Sychrava. Por nia ideo li gajnis ankaŭ kelkajn svisajn gazetojn.

Por publike proklami la revolucion uzis profesoro Masaryk la tagon de la 6a julio 1915. (La kvincentjara datreveno de la morto de Hus). Li invitis al Genčve la profesoron Denis kaj mem li okazigis paroladon pli frue en Zürich. La parolado de la profesoro Denis en la reformacia halo en Genčve estis raviga. Post la parolado deklaris profesoro Masaryk: "Ĉiu Ĉeĥo, konscia pri sia nacio devas decidi sin por la reformacio aŭ por la kontraŭreformacio, por la ĉeĥa ideo aŭ por la ideo de Aŭstrio, kiu estas organo de la konfraŭreformacio kaj de la eŭropa malprogresemo. Hus, Žižka, Chelčický, Komenský estas nia viva programo. . . Nia reformacio kondukis al la politika revolucio. Ĉiu konsekvenca kaj honora morala klopodo kondukas laŭlogike al reformo kaj pluen al politika kaj socia revolucio. Per la ĉeĥa reformacio la tuta nacio la unuan fojon starigis kaj provis solvi la problemon de la aŭtoritato en moderna senco, *ankaŭ hodiaŭ temas pri la sama problemo, ne estas eble tiun problemon prokrasti kaj estas necese nepre solvi ĝin*. La ideo de la plej pura humaneco

ne malpermesas, ne povas malpermesi defendon. Nia reformacio proklamis kun plej granda cerfeco, ke la defendo ne estas perforto. Nia reformacio rezultigas ĉi tiun regulon. Ni kondamnas perforton, ni ne volas apliki kaj ne aplikos ĝin. Sed kontraŭ perforto ni defendos nin eĉ per fero".

Tio estis publika deklaro. Kiam gazetoj diskonigis la sentencojn de Masaryk, vienaj ĵurnaloj bone kompremis, ke tiuj sentecoj signifas la ĉeĥan proklamon de la milito. La kvincentjaran detrevenon de la morto de Hus oni festis en ĉiuj okcidentaj landoj en gazetoj, en Anglujo en ĉiuj preĝejoj, la nomo de Hus laboris por ni ankaŭ en la komenco de la revolucio.

Profesoro Masaryk restis en Svisujo, ĝis kiam alveturis el Praha dro. Eduard Beneš[34]), profesoro ĉe la komerca akademio kaj docento de filozofio, kiu sukcesis fuĝi trans la limojn la 1an de septembro 1915. Okazis divido de la taskoj. Profesoro Masaryk decidiĝis, ke li ekloĝos en London, dro. Beneš li destinis al Paris kaj en Svisujo restis dro. Sychrava. Dro. Beneš alportis el Praha ankaŭ la tekston de la publika deklaro de Masaryk, kiun aprobis en Praha la anoj de sekreta konspira societo, kiun oni nun nomas Maffia[35]). Ĉi tiu deklaro estis publikigota, ĝis kiam estos konvena tempo. Tiutempe restadis jam en Svisujo ankaŭ Josef Dürich, deputito de la nia agrara partio, kiun sendis dro. Kramář kaj Anf. Švehla[36]) poc ke li helpu Masarykon.

Profesoro Masaryk forlasis Ĝenevon la 5an septembron 1915.

*

Profesoro Masaryk ne estis nekonata en eksterlando. Antaŭ ĉio li havis multe de konatuloj inter la germanaj sciencistoj en Germanujo kaj Aŭstrio. Li vivis en Wien de post 1869 ĝis 1882, inter siaj kunlernintoj li havis 2 pli postajn ministroprezidantojn Beck kaj Klein, el la altlernejaj

profesoroj estis lia instruisto Franz Brentano, Hartl (la pli posta ministro por la lernejaj aferoj); sufiĉe da personaj amikoj. Dum kiam Masaryk kreskis science, multiĝis liaj konatuloj: en Lepzig estis tio profesoroj Čermák, Wundt kaj aliaj eminentaj verkistoj. Cetere dum pli postaj jaroj prof. Masaryk entreprenis kelkajn vojaĝojn al Germanujo. Ekzemple en jaro 1910 li prelegis en Berlin ĉe la kongreso por la libera kristaneco kaj la religia progreso. En la jaro 1913 oni invitis lin al München, por ke li prelegu en la ciklo "Balkano kaj Aŭstrio". En Rusujo estis profesoro Masaryk trifoje; en la jaro 1887, 1888 kaj lastfoje 1910. Ĉiufoje li vizitis Tolstojon. La celo de lia lasta vojaĝo estis, ke li en la loko mem kolektis gazetojn kaj presaĵojn revoluciajn t.n. subterajn, por sia verko "Rusujo kaj Eŭropo". Kun Italujo li konatiĝis la unuan fojon en la jaro 1877 kaj interesis lin la renesanco; en la jaro 1911 li restadis tie prefere por refortiĝi post longa malsano. Same en Capri 1913.

Al Anglujo entreprenis profesoro Masaryk studan vojaĝon en la jaro 1901; en Nederlando li estis dum la milito dufoje dum la jaro 1914, en aŭgusto kaj novembro. En Ameriko li edziĝis 1818, en la jaro 1902 li prelegis en la universitato en Chicago kaj 1907 ĉe la kongreso de la Internacia ligo de liberaj religioj en Boston. Kaj krom tio li paroladis en kelkaj urboj por Ĉeĥoj.

En Jugoslavio estis profesoro Masaryk, kiel ni jam scias, persono amata. En Bosnio li estis 1891, poste en aprilo 1909 en Beograd kaj Zagreb (dum la fama patrujperfida proceso) kaj denove en julio. En aŭgusto l906 li traveturis parton de Dalmacio kaj trans Cetinje al Sarajevo. En decembro 1912 li entreprenis politikan vojaĝon al Beograd (kun la deputito Tresiĉ-Paviĉiĉ) kaj dum la milito serba-turka li vizitis la lokojn, kie tiam la ĉeĥaj kuracistoj en malsanulejoj flegadis

vunditajn serbajn soldatojn. Fine la verko pri Rusujo kaj Eŭropo faris lin konata.

En Francujo restis profesoro Masaryk de la 6a ĝis la 24a septembro 1915. El Svisujo lia voĉo ne penetradis sufiĉe en la mondon, ĉar germanaj gazetoj silentigis lin. En Francujo kaj Anglujo laboris jam por si Jugoslavoj kaj Poloj. Du anglaj amikoj de la ĉeĥa
nacio, dro. Seton-Watson, profesoro ĉe la londona reĝina kolegio, kaj la fama ĵurnalisto H. Wikham Steed konsideris necese, ke profesoro Masaryk aperu sur la angla scenejo. Seton Watson uzis sian influon, por ke profesoro Masaryk estu vokita al la londona universitato kiel profesoro pri slavaj aferoj. Tio estis necesa, ĉar la arĥiduko Friedrich, ĉefkomandanto de la aŭstria armeo, ordonis en aŭgusto 1915, ke la registaraj oficejoj ekprocedu kontraŭ Masaryk kiel kontraŭ patrujperfidulo. En aŭgusto oni konfiskis la posedaĵon de Masaryk en Praha kaj ĉesigis lian salajron de universitata profesoro. Pri la familio perdinta tiel la enspezojn zorgis amikoj de la familio, li mem restis sen helpo.

En Paris estis fondita sub gvidado de dro. Beneš *Eksterlanda ĉeĥoslovaka komitato* por almenaŭ videbligi, ke ekzistas ĉeĥoslovakaj revoluciuloj. Ĉi tiu komitato publikigis la 14an de novembro 1915 memorindan *proklamon de la milito*, proklamon publikan kaj subskribitan. Ĉiuj ĉeĥaj partioj - oni diris en ĝi - klopodis ĝis nun havigi al la ĉeĥa nacio sendependecon en la kadro de Aŭstrio-Hungario. La milito proklamita kontraŭ la volo de la ĉeĥa nacio kaj diversaj perfortoj de Wien devigas postuli sendependecon ne konsiderante Aŭstrio-Hungarion. La ĉeĥa nacio konvinkiĝis, ke ĝi devas mem zorgi pri si. Post la profesoro Masaryk estis subskribitaj la deputito Dürich kaj la reprezentantoj de ĉiuj ĉeĥaj kaj slovakaj kolonioj el Svisujo, Francujo, Anglujo, Ameriko, Rusujo. Grandan impreson rezultigis la kuraĝo de ĉi

tiu proklamo, ĉar Ĉeĥoj aliĝis al la Kvaralianco, kiam ĝi fartis malbone sur la batalkampoj, kiam Bulgarujo fariĝis partiano de la Centraj Potencoj kaj kiam Rusujo proksimiĝis jam al la ruiniĝo post doloriga malvenko apud Gorlice en Galicio.

Dua okazaĵo estis feliĉa. Kiam profesoro Masaryk alveninte denove Parizon al konferencoj en januaro 1916 vizitis la ministroprezidanton Briand kaj klarigis al li, kial ni Ĉeĥoj ribelas kontraŭ Habsburgoj kaj kial la Kvaralianco frakasu la aŭstria-hungarian imperion, Briand lasis konvinki sin; li certigis profesoron Masaryk, ke li simpatias kun la ĉeĥa nacio kaj kuraĝigis lin al la plua laboro por naciaj celoj de la ĉeĥa popolo.

Briand plenumis sian promeson. La prezidanto de la Unuiĝintaj ŝtatoj amerikaj W. Wilson, al kiu rigardis ambaŭ militantaj tendaroj kun konfido, kiel al peranto, donis en decembro de la sama jaro al la ambaŭ tendaroj demandon: "Kial, pro kiaj interesoj vi militas?" Tiam la Kvaralianco sciigis la prezidanton Wilson per komuna noto, ke ĝi militas ankaŭ por liberigi Ĉeĥojn kaj Slovakojn el la habsburgo jugo. Jen la dato, kiun la ĉeĥaj generacioj por ĉiam memoru: la 10a de januaro 1917. Ĉi tiun artikolon pri la liberigo de Ĉeĥoj kaj Slovakoj enskribis en la noton inter aliajn postulojn Aristide Briand. Li havu eternan gloron! Kun Aristide Briand estu nomata ankaŭ eminenta franca ĵurnalisto Gauvain, kiu en multe legata franca ĵurnalo subtenis profesoron Masaryk. Rememorigante pri la publika Proklamo de la milito li laŭdis Ĉeĥojn, ke ili ne estas kiel rabaj bestoj, kiuj ĵetas sin sole sur kadavrojn. Dum horo de plej granda danĝero por la Kvaralianco anstataŭ sidi tute silente laŭ malbona ekzemplo de aliaj nacioj ili energie aligis sin al la defendatoj de la tuta libereco. Tio estas granda kuraĝo. La volo de Ĉeĥoj estas neskuebla kaj en tia okazo la volo dum tempo efektivigos ĉion. Kaj tiu sinjoro Gauvain estis post Denis la dua, kiu

komprenis, ke la ĉeĥa nacio povas utili ankaŭ Francujon. Li diris: "Por la fina sukceso ne estas indiferente, ke la volo de Ĉeĥoj estas unuigita kun nia volo."

*

Antaŭ sia reveno al London profesoro Masaryk en konferenco kun siaj helpantoj Beneĕ, Štefánik,37) Dürich, Sychrava, Božinov proponis, ke la revolucia organo ne estu nomata komitato, sed pli konvene: *Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro*. France: Conseil national des pays Tcheques. Dro. Štefánik estis tiu, kiu ne deziris, ke oni donu en la francan titolon elementon slovakan, ĉar en okcidentaj landoj oni scias pri Slovakoj ankoraŭ malpli multe, ol pri Ĉeĥoj kaj tial la nomo de la konsilantaro sole erarigus fremdlandon. Krom tio profesoro Masaryk laŭ konsilo de kelkaj francaj scienculoj paroladis la 22an de februaro en Paris pri "Slavoj kaj la mondo." Per tio li estis trankviligonta la francan politikan publikon, kiu de post la tempoj de Napoleon timis la panslavismon, kiun komence de la milito uzis kvazaŭ timigilon ankaŭ la germana kanceliero proklamante, ke la militon kaŭzis la rusa panslavismo.

Pli frue ol li forlasis Francujon, intertraktis Masaryk fervore, por ke ni havu nian propran armeon sur la batalkampoj. Tiun ideon li pripensis jam en Svisujo. Se ni starigos nian propran armeon, ni aperos antaŭ la okuloj de la mondo kaj per tio ni karakterizos la tendencon de nia nacio, kiu hejme estas devigata silenti. Tial profesoro Masaryk vokis eksterlanden dron. Scheiner, la estron de niaj Sokoloj, pri kiu li supozis, ke li povus organizi la ĉeĥan eksterlandan armeon. Nek Aŭstrio nek la Kvaralianco povos silente ignori nin, se ni havos nian armeon. Ĉi tiun laboron li postlasis en Francujo al dro. Beneš.

En Anglujo oni bonvenigis profesoron Masaryk solene. Kiel en Francujo Ernest Denis, tiel en Anglujo informadis antaŭ la milito la rondojn de inteligentuloj pri la ĉeĥa nacio la grafo Francisko Lützov, kiu estante iama aŭstria diplomato ne ŝatis Aŭstrion kaj el sia en Bohemujo restadejo li vizitadis Anglujon kaj skribis anglajn verkojn pri la ĉeĥa historio, precipe pri Hus, pri la ĉeĥa literaturo ktp. El la indiĝenaj vivantaj anglaj scienculoj konis nian historio W. R. Morfill, C. E. Maurice, el la pli junaj publicistoj H. W. Steed kaj dro. Seton-Watson; krom ili eble neniu plu. Feliĉo estis, ke Steed gvidis eksterlandan politikon de la plej fama angla ĵurnalo Times.

Oni bonvenigis profesoron Masaryk, kiam okazis lia malferma prelego en la reĝina kolegio. Li prelegis pri la problemo de malgrandaj nacioj en la eŭropa krizo. La okazaĵo estis en tio, ke dum la parolado estis prezidonta la tiama ministroprezidanto, lordo Asquith mem. Pro malsaniĝo anstataŭis lin lordo Cecil Rhodes, ano de la registaro, sed Asquith bonvenigis Masarykon almenaŭ per letero, kiu estis legata. Asquith skribis:

"Mi bondeziras la kolegion pro la elekto de Masaryk kaj certigas lin, ke ni bonvenigas lin alvenantan al London parte kiel instruiston, kies influon de la potenco kaj scienco oni sentas en la tuta slava mondo, parte kiel viron, kies personajn ecojn, honestecon, bravecon kaj forton ni volonte ovacias. Ni kredas, ke lia ĉeesto ĉi tie estos ligilo, kiu fortigos la simpatiojn, kiuj kunigas la rusan nacion kun Granda Britujo. Unuavice kaj super ĉio la Aliancanoj batalas por la sendependenco de malgrandaj nacioj al tiu celo, por ke en la estonteco ili estu liberigitaj de tiranado de pli potencaj najbaroj kaj povu disvolvi siajn naciajn vivon kaj instituciojn."

Malgraŭ ĉi tiu bonvenigo la laboro de Masaryk en Anglujo ne estis faciligita. Staris kontraŭ li tre multnombraj

pacifistoj, la parlamento mem tiutempe ne agis por la milito sufiĉe energie kaj precipe la aristokrataj kaj financaj rondoj. En neniu okcidenta lando havis Aŭstrio tiom da amikoj, kiom en Anglujo. Kvankam dum pasintaj tempoj estis en Anglujo eminentaj politikistoj, kiuj konis Aŭstrion kaj vicigis ĝin tuj apud Turkujo, la lordo Palmerston nomis Aŭstrion en la jaro 1849 besto kaj la fama Gladstone diris pri ĝi en la jaro 1886, ke ĝi faris en Eŭropo ĉiam sole krimojn kaj en la komenco de la milito parolis ja la ministro Loyd George pri Aŭstrio-Hungario kiel pri kaduka imperio, tamen tre multaj nobeluloj kaj influaj Angloj havis en Wien kai Budapest amikojn - "agrablajn homojn" - kun kiuj ili ŝatis rilati. Ĉi tiuj agrablaj homoj invitadis ilin al ĉasadoj kaj festenoj. Kaj eĉ se kelkaj politikistoj opiniis, ke la habsburga imperio mem ne multon valoras, ŝajnis al ili preferinde, ke ĝi restu, ol ke anstataŭ ĝi estu fondataj kelkaj malgrandaj sendependaj ŝtatoj. Oni diris: "Nun ni intertraktas kun unu, poste ni devos paroli kun dek."

Nekono de la aŭstria situacio estis granda en Anglujo, kiam profesoro Masaryk alvenis kaj komencis inter Angloj propagandi same, kiel iam Cato inier Romanoj pri Carthago: "Antaŭ ĉio estas necese, ke Aŭstrio-Hungario estu pereigita". La metodo de lia laboro estis pripensita tiel, ke plej bone estas gajni ne registaron kaj la ministrojn, sed la publikan opinion. Tiu ĉi publika opinio tio estas la konvinko de influaj viroj kaj de gravaj gazetoj kaj la konvinko de la plej vastaj rondoj devas mem influi la registaron. Ĉe Steed kaj Seton-Watson estis amika fokuso, de kiu oni elsendis radiojn tra Granda Britujo. Precipe en la familio de Steed kunvenis multaj politikistoj nome ne nur anglaj, sed ankaŭ francaj, italaj kai verdire el la tuta Eŭropo. Ĉe la viro tiom potenca en Times renkontiĝis homoj de ĉiuj fakoj - soldatoj, ĵurnalistoj, bankistoj, deputitoj, diplomatoj.

Kun ili konatiĝis profesoro Masaryk. Li skribis iom post iom proksimume en dek londonajn gazetojn. Kun ambaŭ amikoj li fondis en aŭtuno 1916 semajnan gazeton "The New Europe" kaj fine kiel spertulo ne nur pri Aŭstrio, sed ankaŭ pri Germanujo li liveris al la angla registaro de tempo al tempo memuarojn pri la situacio. En la memuaroj li taksis la militan potencon de ambaŭ partioj kaj ne hezitis eĉ riproĉi la mankon de kunlaboro kaj de unueco en la milita plano. Je propra risko batalis Francoj, je propra risko Angloj, la itala komando en Alpoj kaj la fronto apud Saloniki en Grekujo ne laboris en interkonsento kun ili. Profesoro Masaryk fariĝis en la jaro 1916 almenaŭ tiom konata, ke li povis paroladi al la angla popolo en popolaj kunvenoj - la unuan fojon la l2an de aŭgusto 1916 en London. Fine de la novembro 1916 li fondis en London ĉeĥan presan kancelarion, de kie oni kun febra klopodo liveris al la anglaj gazetoj longajn artikolojn, kaj mallongajn raportojn pri tio, kio okazas en Aŭstrio-Hungario kaj kio ĉe la nacioj subpremataj de ĉi tiu ŝtato.

Malgraŭ la videblaj sukcesoj en Anglujo travivis profesoro Masaryk momentojn de duboj. La milito daŭris iam du jarojn kaj nenie montriĝis ĉielruĝo de espero, ke la ĉeĥa nacio estos liberigita per ĉi tiu milito. Eble li devos resti por ĉiam elmigrinto penege sin vivtenanta en fremdlando same, kiel Jan Amos Komenský.

Krom tio premis lin sirangaj doloroj. Jam en Svisujo li ricevis sciigon pri malfeliĉo: en marto 1915 mortis je tifo lia filo Herbert, pentristo en Praha. Ĉi tien Anglujon venis en la somero 1916 gazetaj sciigoj, ke lia filino Alice malliberigata de post la aŭtuno 1915 estos ekzekutita. Profesoro Masaryk neniam parolis pri siaj doloroj, nur ĝis kiam li legis ĉe Steed la teruran sciigon pri la preparata ekzekuto de Alice, li diris: "Antaŭ kiam iu faras tion, kion mi faris, li devas pli frue pripensi, kian domaĝon li kaj aliaj suferos. Mi kunkalkulis la

domaĝojn kaj mi devas suferi ĉion, kio estas destinita al mi. Mi estas konvinkita, ke mia unua devo estas utili la nacion."

Sed profesoron Masaryk turmentis eĉ duboj pri tio, kiel utili la nacion. En aŭgusto 1916 veturante kun dro. Beneš el Oxford Londonon li ekmeditis pri la sorto de sia edzino, kies sano estis atakita, pri la sorto de sia filino, kies nervojn la aresto certe estis funde turmentintaj, sed li ekmeditis ankaŭ pri tio, ke lia tuta laboro rezultigis ĝis nun malmulte da sukcesoj. Li diris al dro. Beneš: "Kiam ajn mi ĉion ekpripensas, venas al mi ofte la ideo, ĉu mi ne reveturu hejmen. Se ni estas perdontaj ĉion kaj se la niaj hejme ekkuraĝos nenion, eble estus ĉi tiu mia ideo la plej bona. Min kompreneble oni certe pendigus, sed mi vidus ankoraŭfoje mian edzinon, pri kiu mi timas, ke ŝi ne ĝisvivos la finon de la milito, kaj Alice oni eble ne maltrankviligus plu. La niajn ĉi tio certe ekskuus kaj ili certe ribelus kontraŭ Wien. Vi estas juna, vi devus ankaŭ post la milito gvidi ĉion en fremdlando pluen."

Plej fortaj bataloj komenciĝis por profesoro Masaryk, kiam la 8an de januaro 1917 la noto de la Kvaralianco anoncis, ke la Kvaralianco intencas liberigi ankaŭ Ĉeĥoslovakojn. Precipe du viroj stariĝis kontraŭ Masaryk: la deputito Noel Buxton kaj la ĵurnalisto H. N. Brailsdorf. Buxton ŝatis Bulgarujon kaj estis en la parlamento prezidanto de t. n. balkana komitato. Ankaŭ Brailsdorf sciis sian aferon, li estis ano de la internacia komisiono de Carnegie sur Balkano kaj verkis libron pri Macedonio. Ili ambaŭ estis radikalaj liberaloj kaj asertis ankaŭ, ke la liberigo de Ĉeĥoj kaj la pereigo de Aŭstrio plilongigus nur la militon. Profesoron Masaryk ekhelpis eĉ anglaj sekundantoj en ĉi tiu duelo. Li silentigis siajn kontraŭulojn.

Sed li havis interbatalojn ankaŭ kun angla katolika pastro B. Vaughan, kiu okaze de la morto de Francisko Josefo estis skribinta, ke oni devus preĝi por li. Masaryk respondis: "Se iu

laŭdas reĝon aŭ brasikon, li devus pli frue scii ion pri ili. Tion devus ankaŭ pastro B. Vaughan konsciigi al si." Ne konsiderante la absurdecon preĝi por viro, kiu estis unu el la plej ĉefaj kulpuloj pri ĉi tiu milito, estas malprave aserti, ke la mortinta aŭstria imperiestro havis noblajn karakterajn ecojn. Li estis kolerikulo, senkompata, obstina absolutisto sen kiu ajn humaneco. Li pardonis neniam. Kolerigi lin estis - altiri sur sin lian dumvivan malfavoron. Li estis pedanta en la simpatioj kaj malprogresema en la opinioj, sen intereso por belaj idealoj de la vivo. En lia imperio oni ekzekutis de post komenco de la milito 60.000 virojn kaj virinojn sole tial, ĉar ili estis Slavoj, Italoj aŭ Rumanoj. Liaj subuloj, kiuj sopiris esti liberigitaj el la aŭstria jugo, vere ne havis kaŭzon estimi lin.

Profesoro Sarolea de la oxforda universitato lasis al ni ateston pri la laboro de Masaryk: "Monaton post monato vane li provis veki ĉe la anglaj politikistoj senton por la urĝa danĝero, kiu minacis la aferon de la Kvaralianco. Monaton post monato sonis lia serioza avertanta voĉo, li skribadis memorandumojn pri la milita kaj politika situacio. Sed monaton post monato ŝajnis, ke lia voĉo estas voĉo de la vokanto sur dezerto. Lia momento venis nur kun la rusa revolucio. . ." Sarolea ekrimarkis precipe unu kapablecon de profesoro Masaryk. Li skribis: Lia scio ĉiam kulminacias en la antaŭvido. Dum la milito ofte mi havis okazon paroli kun politikistoj kaj diplomatoj sur la kontinento pri la politika kaj milita situacio. Masaryk estis politikisto, kiu ĉiam vidis pli malproksimen en la malantaŭon de okazaĵoj kaj hazardaĵoj de la koncerna tago, kiu kalkulis kun ĉiuj faktoj, kiu komprenis la tutan grandecon de la taskoj, kiujn la Kvaralianco devis solvi. . ."

*

Bela sukceso estis tio, kion enhavis la noto de la Kvaralianco de la 8a januaro 1917. Des pli necese estis, ke sur la batalkampoj aperu ĉeĥa armeo, kio estis neforigebla ideo de profesoro Masaryk. En Rusujo kreis la loksidaj aŭ tiam ĝuste tie okupitaj Ĉeĥoj roton de volontuloj "Česká družina" (Ĉeĥa kamaradaro) tuj, post kiam la milito eksplodis. Amerikaj Ĉeĥoj sendadis trans Kanado al Francujo Ĉeĥojn kaj Slovakojn kaj niaj volontuloj malkaŝe starigadis sin sub amerikajn standardojn, post kiam Usono (en aprilo 1917) proklamis la militon kontraŭ la Centraj Potencoj. Sed tio ne kontentigis Masarykon. Ĉi tiuj niaj soldatoj fariĝis nevideblaj, tuj kiam oni envicigis ilin en la rusan aŭ amerikan armeojn. Li deziris videblan ĉeĥan armeon sur la batalkampoj.

Tial li forveturis la 5an de majo 1917 el Anglujo Rusujon. La restado en Rusujo estis ebligita al li per tio, ke la rusa revolucio forigis la caran tronon kaj tutan caran reĝimon. La caro mem ne havis kontraŭjuĝon kontraŭ profesoron Masaryk, male li salutigis lin en London per dro. Štefánik.[37)]

Petrogradon alvenis profesoro Masaryk la l6an de majo 1917. Forlasante la anglajn bordojn li estis jam aprobita gvidanto de la revolucio. Rigardis lin amerikaj kaj rusaj Ĉeĥoj, niaj plej grandaj kolonioj; memkompreneble ankaŭ la francaj, svisaj kaj anglaj, inter kiuj li persone laboris. Same rigardis lin la politikistoj de la kvaraliancaj potencoj; por ili li estis la reprezentanto de la ĉeĥa nacio. Ĉiuj fadenoj de la ribelo kuniĝadis en liaj manoj.

La kontraŭĉeĥan vidpunkton defendis en la rusa ministerio por eksterlandaj aferoj Priklonskij, oficisto de ĉi tiu ministerio, la iama rusa konsulo en Budapest ŝatanta Madjarojn. Kontraŭ Masaryk li laboris per lia verko Rusujo kaj Eŭropo, kiun li deklaris ofendo de la caro kaj de Rusujo. Li influis la deputiton Dürich kaj apartigis lin de la ĉeĥoslovaka Nacia konsilantaro en Paris. Li disvastigis

kalumniojn, ke Masaryk estas pagata por la servoj farataj al Anglujo kaj Francujo, kiuj havas kontraŭrusajn tendencojn, kaj ke li precipe klopodas eligi Ĉeĥojn el la rusa influo. Masaryk celas, ke angla princo fariĝu ĉeĥa reĝo. Fine oni profituzis eĉ la cirkonstancon, ke Masaryk tro longe ne estis alveninta Rusujon, per kio li vidigas, ke li ne zorgas pri rusaj Ĉeĥoj. Tial estis malebligota influo de Masaryk en Rusujo.

"Li alvenis. Ni tamen ĝisatendis lin. Plenumiĝis la plej ardaj deziroj de niaj animoj, silentiĝis la plej kaŝitat plendoj de niaj koroj. Profesoro Masaryk tiom de ĉiuj amata kaj tiom longe atendata estas inter ni. Paĉjo nia, kapo kara, falko nia. Sciigo pri lia alveno trakuras tutan Rusujon, flugas en la tranĉeojn al niaj bravaj batalantaj soldatoj, enflugas plej malproksimajn tendarojn de la militkaptitoj; kaj ĉie ĝi vekas certe senfinan neesprimeblan ĝojon kaj novajn esperojn." Tiel skribis unu redaktoro de "Čechoslovák", ĉeĥa semajna gazeto en Petrograd. Kaj alia redaktoro skribis: "Nia Masaryk alveturis al ni. Lia nomo plenigas la korojn de ni ĉiuj. Lia nomo, lia persono, liaj ideoj kaj lia laboro estas por ni programo kaj nia celo. Neniam kapablos iu klarigi al li, kiom da espero kaj refortigo eniĝis en nin el li."

Laŭ tiu ĉi entuziasma bonvenigo de Masaryk oni komprenos, kiel malbona estis la tiama situacio en Rusujo.

La niaj fartis malbone ĉe Rusoj, ĉe la registaro, eĉ en la societo. La caro Nikolao II. estis doninta belajn promesojn al Ĉeĥoj kaj Slovakoj. Li promesis al la ĉeĥa nacio liberigon kaj al la ĉeĥaj militkaptitoj avantaĝojn kompare al la germanaj kaj madjaraj militkaptitoj kaj li permesis, ke ili anoncu sin al la armeo el la tendaroj de militkaptitoj. Sed en absolutismaj ŝtatoj la oficistaro englutas fine la absolutan reganton mem. La militista komandanto en Tomsk ordonis dispeli en la tutan Siberion 200 ĉeĥajn militkaptitojn, kiam ili anoncis sin en la rusan armeon. En Omsk okazis, ke ĉeĥaj kaj serbaj

militkaptitoj estis jam akceptitaj en la armeon, sed la guberniestro ne liberlasis ilin kaj la germane orientitaj generaloj tenis ilin en malliberejoj. La caro promesis plimultigon de la ĉeĥa militistaro, sed li mem nuligis sian promeson permesinte fine de la jaro 1916, ke liberigo de la slavaj militkaptitoj ne estu praktikata. La cara registaro ne sciis entute, kiel trakti la ĉeĥan nacion, ĉar ĝi rigardis nin katolikoj kaj pri katolikoj - ankaŭ pri jugoslavaj katolikoj - ĝi ne havis planon, ĝi pensis nur pri Serboj, ĉar ili estis grekritaj. Kiam la caro eksigis Sazonovon, la ministron por la eksterlandaj aferoj, kiu ja ankaŭ ne promesis ian helpon al ni, sed almenaŭ li estis favora al nia nacio, sekvis lin du severaj homoj Stürmer kaj Trepov, kiuj posedis eĉ ne ereton da slava sento.

En la provizora registaro post la rusa revolucio estis ministro por eksterlandaj aferoj profesoro Miljukov, malnova amiko de profesoro Masaryk, kun kiu li ankaŭ dum la milito renkontiĝis en Anglujo. Li estis aprobanta la programon de Masaryk frakasi Aŭstrion-Hungarion, sed en majo 1917 li estis eksiĝonta el la registaro. Kiam Kerenskij, de pli radikala socialista tendenco, uzurpis la regadon, lia registaro vidigis antipation al Ĉeĥoj kaj Slovakoj, ĉar - laŭ lia opinio - ni estas malkvietaj ŝovinistoj, aliokaze ni povus esti kontentaj en Aŭstrio, kiu estas konstitucia kaj ordigita ŝtato.

Profesoro Masaryk ne turnis sin al la registaro, al la ministroj. Li entreprenis sian mision same kiel en Anglujo: klopodante gajni la publikan opinion. Tial li skribadis artikolojn, lasis intervjui sin, li paroladis en societoj, vizitadis scienculajn rondojn. La registaron li klopodis influi ankaŭ per influhavaj homoj el la aliancaj registaroj kaj landoj: vivis ja en Petrograd multaj liaj konatuloj el Francujo, Anglujo, Italujo, Serbujo, eĉ el Ameriko - ambasadoroj, iliaj sekretarioj, ĵurnalistaj ataŝeoj.

Sed ju pli longe profesoro Masaryk laboris, des malpli da espero li havis, ke li ricevos de Rusujo respondon je la demando; kion ni Ĉeĥoslovakoj povas ricevi de Rusujo? Finfine ankaŭ la registaro de bolŝevikoj, kiam en novembro 1917 ili estis efektivigintaj la duan proletarian revolucion, ne promesis ion al ni.

Grandajn zorgojn havis Masaryk pri la ĉeĥa armeo en Rusujo. La zorgoj estis urĝaj kaj neprokrasteblaj. Nome apenaŭ li estis iom rigardinta Rusujon, li sciis kaj vidis, ke la rusa armeo alproksimiĝas jam al disfalo kaj ke ĝi baldaŭ disiros de la batalkampo. La ministro Kerenskij ankoraŭ duonkontentige bridis la armeon, sed la "konsilantarojn de soldatoj" tedis jam la milito kaj ili volis fini ĝin per paco "sen aneksoj kaj kontribucioj", nome tiel, ke nenio ŝanĝiĝos en la stato, kia estis antaŭ la milito, ke neniu venkos kaj neniu estos venkita.

La energia laboro por la ĉeĥoslovaka armeo paŝon post paŝo tamen prosperis. Sukcesis la plano de profesoro Masaryk, ke ni posedu nian memstaran armeon, kiun komandus ni, ne Rusoj; ke tiu ĉi armeo ĵuru al la ĉeĥa ne al la rusa standardo, ke ni posedu armeon kiel eble plej grandan, kiu estus provizita per armiloj tiom, ke ĝi kapablus memstare batali, ke ni posedu armeon, kiu estus parto de la aliancaj armeoj kaj kiu eventuale povus esti parte aŭ tute kondukita Francujon.

Komence la diktatoro Kerenskij ne komprenis ĉi tiun ideon, tial estante ministro de milito li rekte ordonis, ke la ĉeĥoslovaka militistaro, da kiu tiam estis unu brigado, estu disigita. Tiu ĉi brigado feliĉokaze savis sin per la batalo apud Zborow[38)] la 2an de julio 1917. Apud Zborow estis destinita al la ĉehoslovaka brigado propra parto de la fronto kontraŭ la aŭstria armeo. Tiu ĉi brigado akiris grandan gloron en la batalo. Ĝi rompis la aŭstrian, laŭnombre pli fortan fronton (niaj 3500 bajonetoj kontraŭ 12,000 aŭstriaj), kaptis 4200

soldatojn kaj 62 oficirojn, 20 kanonojn kaj multajn maŝinpafilojn. Kiam la rusa armeo malgraŭ ĉio tamen ekmarŝis returnen apud Tarnopol[38]), la ĉeĥoslovaka armeo protektis kuraĝe la retiriĝon kaj estis oferanta siajn vivojn por Rusoj. La rusaj generaloj ekmiregis la atakemon kaj kapablecon de nia armeo, la generalo Brusilov diris, ke li riverencas ĉeĥoslovakajn soldatojn. Masaryk eksciinte la rezulton telegrafis la 3an de julio al la brigado: "Ni estas fieraj konsciante, ke la posteuloj de Husanoj, batalintaj en la nomo libececo, justeco kaj nacia memstareco, plenumis kaj plenumos sian devon rilate la nacion, demokracion kaj la homaron."

La ministro Kerenskij ŝanĝis sian vidpunkton pri la ĉeĥa militistaro. La generalo Duchonin, la ĉefa furiero, pli poste estro de la generala stabo de la rusa armeo, aprobis la plimultigon de nia brigado kaj fine la 9an de oktobco 1917 li permesis, ke Ĉeĥoj kaj Slovakoj formu tutan armean korpuson. Ĉi tiu korpuso estis memstara, destinita sole kontraŭ ekstera malamiko, ĉar dum partianaj bataloj de rusaj partioj ne estus dezirinde, ke ĝi staru en servoj de tiu aŭ de alia partio.

Dume profesoro Masaryk finis ankaŭ duan inter-traktadon. La franca ministro Tomas intertraktis en Petrograd, ke oni transportu la ĉeĥoslovakan armeon Francujon. Kiam la rusa generala stabo permesis tion, oni sendis senprokraste 3000 da niaj volontuloj trans Archangelsk al Francujo. Se oni sendu ilin al Francujo, estis solvota la problemo, tra kie nia armeo batale malfermu vojon al si. Profesoro Masaryk for-veturis en oktobro esplori la situon en Rumanujo. Li ekkonis, ke tra Rumanujo la vojo ne estas ebla.

Sed komenciĝis novaj malhelpoj, ardantaj tagoj, efektiva infero. Rezultigis ilin la bolŝevika revolucio, kiu profunde ŝanĝis ĉion. Profesoro Masaryk estis seninterrompe survoje inter Petrograd, Kiev kaj Moskva, inter la rusa ĉefa stabo kaj

la ĉeĥoslovakaj taĉmentoj. Kelkaj niaj militkaptitoj lasis delogi sin de la bolŝevikoj kaj estis disigantaj nian propran armeon. Fine eksplodis la batalo inter la bolŝevikoj kaj Ukraino, kie nia armeo estis dislokita. La danĝero por la armeo estis grandega, kiam Ukraino interkonsentis pacon kun Aŭstrio kaj Germanujo kaj la bolŝevika ĉefkomandanto Muravjev post dektaga sieĝo batalakiris Kievon. Profesoro Masaryk sukcesis la l0an de februaro 1918 interkonsenti kontrakton, ke oni certigos al nia armeo neŭtralecon kaj permesos al ĝi liberan formarŝon el Rusujo en la direkto al Vladivostok. Inter du furiozantaj partioj - jen Ukrainanoj, jen Rusoj - aspektis la foriro de la niaj kvazaŭ marŝo tra la Ruĝa Maro.

Ĉiuj niaj soldatoj, kiuj travivis teruron de la rusaj konfuzoj kaj renversoj, opinias pri profesoro Masaryk same, ke lia preskaŭ tutjara ĉeesto en Rusujo estis feliĉo, ĉar sole lia aŭtoritato, lia persista laboro, lia orientiĝo kaj antaŭvido sukcesis elkonduki el ĉi tiu ĥaoso la armeon viva kaj sana.

Nur kiam la unuaj trajnoj trankvile forveturigadis nian armeon el Ukraino, profesoro Masaryk forlasis Moskvan kaj veturis Amerikon. Tio okazis je lia 68a naskiĝtago. Tiam li estis jam "paĉjo" Masaryk amegata de siaj infanoj - la soldatoj - kaj la unusola gvidanto de la revolucio.

Pri ĉiuj li pensis, nur ne pri si mem.

En Rusujo li nenion atentis, li ne intecesis sin pri la arto, ekspozicioj, teatroj, nur pri la soldatoj. Kaj simple li vivis, li loĝis ĉe konataj ĉeĥaj familioj, iradis piede kaj vestita li estis tro simple. Oni altrudis al li ankaŭ serviston, por ke li havu iun, kiu ankaŭ gardus lin. Jes, estis necese gardi lin. Aŭstriaj agentoj sekvis lin ĉiam tuj post la kalkanoj, ĉu en Svisujo, ĉu en Francujo kaj Anglujo. Dufoje oni provis venenigi lin per tolaĵo, la unuan fojon en Genĉve, la duan fojon en Anglujo. La venenigo aperis per makuloj kaj ŝvelaĵoj sur la korpo. En

Anglujo devis profesoro Masaryk sanigi sin. En London oni provis perforte penetri en lian loĝejon, sed hazarde la rabistoj estis fortimigitaj. Versimile oni intencis proprigi al si paperojn kaj dokumentojn. Pluaj grandaj ĉagrenoj kaj danĝeroj embuskis profesoron Masaryk en Rusujo. Li loĝis en Petrograd ĉe strato, kie bolŝevikoj estis batalantaj kun soldatoj. Bronjeviko (kirasita aŭtomobilo) blekegis sub liaj fenestroj. La amikoj admonis lin, ke li forveturu al Moskva. Sed li venis tien ĝuste tiam, kiam batalis tie la cara militistaro kun bolŝevikoj. Penege li atingis la hotelon Metropol, kiu fariĝis fortikaĵo de junkeroj (nobeloj). La bolŝevikoj pafadis al la hotelo el la kontraŭe situantaj konstruaĵoj dum ses tagoj. Profesoro Masaryk suferis la tutan sieĝon en la hotelo kun ĉiuj teruroj ĝis la fino. Kugloj flugadis tra la fenestroj en la hotelon, oni dormis sur la planko. En la hotelo 600 personoj, viroj, virinoj kaj infanoj. Kiam la hotelo venis en la manojn de bolŝevikoj, lia vivo dependis de hazardo. Ruĝarmeano garde staranta kun pafilo kaj oficira sabro respondis je demando de Masaryk, kiam li liberlasos la publikon: "Se mi volos, mi liberlasos, se mi volos, mi mortbatos, nun mi estras..." Nenomata Ruso eldonis en Praha broŝuron pri tiu ĉi sieĝo, en kiu li rakontas, ke en la hotelo estis du danĝeraj aŭstriaj agentoj, Rumano kaj Polo, kiuj insidis profesoron Masaryk, feliĉokaze sen sukceso. Li ne fartis pli sekure, eĉ post kiam li estis forveturinta al Kiev. Kiam la bolŝevikoj komandataj de Muravjev sieĝis Kievon; la pafaĵoj flugis ankaŭ en la domon, en kiu havis sian sidejon filio de la ĉeĥoslovaka Konsilantaro, kien profesoro Masaryk venadis ĉiutage estante ĝia prezidanto. Sed oni pafadis ankaŭ al la hotelo sur Kreŝĉatik, ĉefa strato en Kiev, kie loĝis profesoro Masaryk. La apudan ĉambron enflugis grenado, kiu feliĉokaze ne eksplodis. Kiev estis plena da ĉiuspecaj spionoj, pri kiuj oni rakontis, ke ili

serĉas profesoron Masaryk. Oni rimarkis ilin jam pli frue en Petrograd.

Ĉu povus miri iu, ke la fortoj de profesoro Masaryk estis jam iom elĉerpitaj? Dum kiam en februaro kaj komence de marto 1918 li estis en Kiev kaj en Moskva, liaj amikoj rimarkis, ke li vane provis kaŝi sian eksciton kaj de tempo al tempo eĉ malĝojon. Unu el liaj amikoj notis tiun ĉi scenon: Okazis kunveno de anoj de la Filio (de la ĉeĥoslovaka konsilantaro) en Kiev ĝuste je la tago, kiam la germana kaj aŭstria armeoj ekmarŝis Rusujon. Oni do pritraktis tion, ke nia armeo estu kiel eble plej rapide preparita al forveturo Francujon trans Vladivostok. Profesoro Masaryk mem rekalkulis per krajono sur papero, kiom da vagonoj nia armeo bezonus, kiom da trajnoj, kiom da lokomotivoj. . . La nombrojn li trovis tiom grandaj, ke ili ŝajnis - dum tiu ĉi ĉiu-flanka konfuzo - por nia armeo neatingeblaj. Tiam profesoro Masaryk forturnis sin de la ĉeestantoj kaj post kiam li returniĝis, liaj okuloj estis ankoraŭ plenaj da larmoj. - -

La ĉefaj anoj de la armeo kaj de la Filio devigadis do profesoron Masaryk, ke li forveturu. Li obeis. La 6an de marto li adiaŭis per proklamo rusajn Ĉeĥojn kaj Slovakojn. Li eldonis al la armeo tiun ĉi proklamon: "Fratoj soldatoj kaj militkaptitoj! Mi forveturas el via rondo, verdire mi estas via furiero en Francujo, tie ni revidos nin. . ." En tiu ĉi ordono lastafoje li akcentis la admonon - ne enmiksi sin en la rusan situacion dum la internaj bataloj de la partioj kaj batali, se estos necese, nur kontraŭ malamikojn de la ĉeĥa nacio. Ankoraŭ en la trajno li aprobis aron da aktoj per siaj subskriboj kaj aldoninte al la lasta el ili la sigelon li diris:

- Mi finis!

*

La gvidanto de la revolucio finis sian laboron en Rusujo, sed ankoraŭ multe da nova laboro atendis lin.

W. Wilson, la prezidanto de la Unuiĝintaj Statoj, publikigis en januaro 1918 dekkvar artikolojn pri la senco de la milito kaj kiel li imagas la rekonstruon de Eŭropo post la milito. En ĉi tiuj artikoloj li esprimis sian opinion pri la rajtoj de aŭstrio-hungaraj nacioj en tiu senco, ke al ili estas garantiota aŭtonomia evoluo. Ĉi tiu okazo kaŭzis al ni seniluziiĝon.

Kiel ni povus kontentiĝi je aŭtonomio en la habsburga monarĥio! Estis necese, ke profesoro Masaryk konvinku Wilsonon, ke ni deziras sendependan ĉeĥoslovakan ŝtaton, ke ni ne konfidas al Aŭstrio.

Tial profesoro Masaryk rapidegis Amerikon. Pli ol iri semajnojn li sidis en trajno de la siberia fervojo kun sia fidela servisto Hůza. Li dormadis sur la matraco, kiun la soldatoj aĉetis lastmomente por li en Moskva. Dum la tago li skribis, kiom nur permesis la penplena veturado, malsekureco kaj manko de manĝaĵoj. Li laboris pri la verko "Nova Evropa" (Nova Eŭropo) en angla lingvo. En la ĉeĥa lingvo li verkis ĝin jam en Petrograd kaj postlasis ĝin al Československý denník (Ĉeĥoslovaka ĵurnalo), kiun por si la soldatoj komencis eldonadi. Alveturinte Vladivostokon li eksciis, ke la ĉeĥoslovaka armeo batalvenkis Germanojn apud Bachmaĉ.[39)]

La 8an de aprilo estis profesoro Masaryk jam en Tokio. En Japanujo li malrapidigis sian vojaĝon kaj restis tie ĝis la 20a aprilo. La amerika ambasadoro en Tokio petis profesoron Masaryk, ke li verku memuaron por la prezidanto Wilson pri la rusa situacio kaj precipe pri la bolŝevismo. Masaryk skribis al Wilson jam en januaro 1918 el Rusujo ne konsentante plene liajn dekkvar artikolojn. Li skribis nun la l0an de aprilo tre detalan memorandumon, en kiu li konsilis, ke la Kvaralianco ne ĉesigu siajn interrilatojn kun la bolŝevika Rusujo, ĉar

aliokaze ĝi perdos influon je ordigo de la interna rusa situacio. Li deklaris, ke ĉiuj malgrandaj nacioj en orienta Eŭropo - Finnoj, Estonoj, Latvoj, Litovoj, Poloj, Ĉeĥoj kun Slovakoj, Rumanoj - bezonas fortan Rusujon, aliokaze ili estos elmetitaj al la favoro kaj malfavoro de Germanoj kaj Aŭstrio. La Kvaralianco povus ankaŭ decidigi Ukrainanojn, ke ili kontentiĝu je aŭtonomia respubliko, ĉar Ukraino, se ĝi fariĝos memstara ŝtato, submetiĝos al Germanujo aŭ Aŭstrio.

Post tiu ĉi memorandumo povis profesoro Masaryk dediĉi sin al Japanujo. Ankaŭ kun Japanujo estis necese intertrakti. Li prezentis al la japana registaro memorandumon pri la ĉeĥoslovaka armeo, pri "sia armeo", kiel li plenrajte diris. Nia armeo bezonis certe ŝipojn por esti transportata Francujon kaj pri ĉi tiuj ŝipoj li intertraktis kun la registaro petante ankaŭ la anglan kaj amerikan ambasadorojn, ke ili protektu nin ĉe la japana registaro.

En Japanujo travivis profesoro Masaryk belan japanan printempon kaj, kiom li plene ne refortiĝis tie, plensanigis lin agrabla ŝipveturo trans Pacifiko. Li skribis en siaj memuaroj: "Bela vetero kaj trankvila ŝipveturo rezultigis agrablan ripozon al mi. Al la maro, la ondoj, la fluoj, la vetero, la koloro de la akvo kaj al la firmamento mi dediĉis sufiĉe da atento, kiel kutime; tio ĝuste estas parto de ripozo." Kaj tuj ni trovas konfirmon de tio. Sur la amerika marbordo en la kanada urbo Vancouver atendis profesoron Masaryk sendito de la ĉeĥoslovaka centro, advokato Karel Pergler,40) al kiu Masaryk diris dum promeno: "Ni ne povis esti por Aŭstrio, resti pasivaj ni ankaŭ ne povis, la unusola morala vidpunkto estis publike agi. Ni supozu, ke ni malsukcesus. Ni gvidantoj ne povus reveni hejmen, sed la soldatoj revenus, ĉar Aŭstrio ne kuraĝus tian amasan persekuton. Imagu, ke tiuj knaboj revenos. En ĉiu urbo kaj en ĉiu vilaĝo estos poste homo, kiu ne nur parolis, sed ankaŭ batalis kontraŭ Aŭstrio. Masaryk

levis ambaŭ manojn kaj pugniginte ilin ekminacis kaj kvazaŭ elspiris: "Kaj tion mi ĉiam deziris: ke ni fariĝu nacio, kiu ne timas."

Usono ne estis fremdlando por profesoro Masaryk. Li alvenis en la patrujon de sia edzino, li havis tie aron da siaj parencoj, li havis tie personan amikon la industriiston Ch. Crane kaj li havis ankaŭ multe da aliaj konatoj de la tempo, kiam en la jaro 1902 li prelegis en la universitato en Chicago kaj kiam en la jaro 1901 li partoprenis la religian kongreson en Boston kaj poste paroladis en kelkaj urboj al siaj samnacianoj.

La unuan vojaĝon entreprenis Masaryk al Chicago, kie loĝas multaj Ĉeĥoj. Oni bonvenigis lin la 5an de majo tiom triumfe, ke similajn solenojn Chicago ne vidis. Same bonvenigis lin ankaŭ eminentaj Amerikanoj, post kiam la 9an de majo li venis en la sidejon de la registaro, en Washington. Krom la ĉeĥa kaj slovaka loĝantaro venis en la stacidomon 27 deputitoj kaj senatanoj kaj memkompreneble ankaŭ Ch. Crane. Okazis eĉ kortuŝa afero: alvenis bonvenigi Masarykon ankaŭ Paŭlo Šlik, posteulo de tiu familio, kies ano suferis la sangan ekzekuton sur Staroměstské náměstí (Malnovurba placo) en Praha en la jaro 1621.41)

Profesoro Masaryk prezentis sin al la tuta Ameriko per aparta maniero, ĉe kiu ne estis necese paroli. Akompanata de siaj amikoj, de la ministro por la agrikulturo kaj de angla majoro li ekveturis al Gettysburg, kie situas la glora tombejo de la batalantoj, kiuj estis mortigitaj en la batalo por la liberigo de sklavoj 1863. La tiama prezidanto Lincoln inaŭguris ĝin per parolo, kiun scias ĉiu Amerikano: "Tiu ĉi nacio amanta la liberecon kaj sindona al la egaleco volas konservi sur la tero la regadon de la nacio, per la nacio kaj por la nacio." La amerika publiko bone atentis ĉi tiun viziton de Masaryk kaj bone komprenis, ke Masaryk estas samideano de Lincoln.

Poste Masaryk laŭ sia kutimo ekagitis por gajni la publikan opinion al sia nacio. Li verkadis gazetartikolojn, lasis sin intervjui de ĵurnalistoj kaj ekveturis por paroladi en la tuta lando. Komence li ekinteresis Amerikanojn pli multe per tio, ke li povis klarigi kio okazas en Rusujo kaj kion li opinias pri la konfuzo de la rusa nacio. Sed iom post iom li komencis disvolvi antaŭ Amerikanoj la ĉeĥan kaj aŭstrian problemojn. Nekalkulebla estas la nombro de liaj deklaroj.
Dum siaj paroladoj (30an de majo 1918) li venis en la urbon Pittsburg, kie amase loĝas plej granda nombro da Slovakoj; la urbo estas tiel dire ilia ĉefurbo. La slovakaj organizaĵoj prezentis al li skizon de deklaro, pri kiu Slovakoj kaj Ĉeĥoj interkonsentis por la okazo, se ili ekposedos sendependan ŝtaton. En ĉi tiu deklaro, kiun oni nomas Pittsburga kontrakto, estas dirite, ke Slovakoj kaj Ĉeĥoj havas en programo unuiĝi en sendependa ŝtato, kiu estos respubliko. Slovakujo posedos propran administrativon, sian parlamenton, sian juĝistaron. La slovaka lingvo estos ofica lingvo en la lernejoj, en la oficejoj kaj entute en la publika vivo. Profesoro Masaryk aprobis kaj subskribis ĉi tiun kontrakton, ĉar la fina frazo tekstis jene: "Detalajn difinojn pri la fondo de ĉeĥoslovaka ŝtato oni lasas al la liberigitaj Ĉehoj kaj Slovakoj kaj al aliaj laŭleĝaj reprezentantoj."

Pri la Pittsburga kontrakto oni disputas kun Slovakoj, kiuj deklaras ĝin leĝo. Sed leĝo por nia ŝtato fariĝis la konstitucio akceptita la 29an de februaro 1920 de la Nacia kunveno, por kiu voĉdonis ĉiuj Slovakoj malgraŭ la Pittsburga deklaracio.

Praktikante sian metodon ĉe agitado profesoro Masaryk ne iris al la prezidanto Wilson pli frue, ol ĝis kiam Wilson mem invitis lin por la 19a junio. La interparolo de ambaŭ viroj koncernis la militon, Aŭstrion kaj Germanujon. Profesoro Masaryk malfermis la okulojn al la prezidanto koncerne la habsburgan dinastion. Ne nur Wilson, sed ankaŭ aliaj

politikistoj rigardis malĝuste ĉi tiun dinastion. Kiel oni ŝatis profesoron Masaryk, atestas la cirkonstanco, ke la prezidanto Wilson adiaŭante invitis lin komunikadi al li ĉiam siajn opiniojn pri la aferoj, kiuj estos ĝuste aktualaj. Ĉi tiun inviton uzis profesoro Masaryk sendante al Wilson memuarojn per lia ŝtata sekretario R. Lansing. Masaryk kaj Wilson similis unu la alian en tio, ke ili ambaŭ rigardis la militon de sur alia morala vidpunkto kaj ambaŭ ili havis la saman opinion, ke la venka milito devas rezultigi novajn fundamentojn al la ŝtatoj kaj nacioj, fundamenton de la demokratio kontraŭ la absolutismo, la liberigon de malgrandaj nacioj.

Dume la ĉeĥoslovaka armeo en Siberio faris ion, kio miregigis la tutan mondon. Ĉiuj registaroj de la Kvaralianco devis mediti pri la ĉeĥa problemo.

Ĉefoj de la bolŝevika registaro en Rusujo estis du viroj: Lenin kaj Trockij. Lenin deziris al la ĉeĥoslovaka armeo, ke ĝi trankvile formarŝu trans Vladivostok Francujon. Sed la ministro por la militaferoj Trockij elserĉis al si bagatelan pretekston, ke nia armeo formarŝu el Rusujo sen siaj armiloj. La armeo obeis. Sed post kiam bandoj de bolŝevikoj gvidataj de aŭstriaj kaj germanaj militkaptitoj komencis ataki ĝin en kelkaj lokoj, ĝi ekkomprenis, ke la ordono de Trockij estas verdire verdikto al morto. Sed Trockij ne konis la spiriton de la ĉeĥoslovaka armeo. Tricent jarojn ni ne posedis militistaron, kiu estus gvidata sub ĉeĥa standardo. Sed subite plenumiĝis, kion revis la fakulo de la ĉeĥa historio E. Denis: "La disĉiploj de Komenský kapablos, se estos necese, fariĝi denove batalantoj de Žižka.[33]) En tiu ĉi plej malfacila batalo simpatios kun ili ĉiuj, kiuj ne volos klini sin antaŭ la brutala forto kaj klopodos akiri por la nacioj rajton decidi pri si mem. Por ĉi tiu homa libereco Hus estis bruligita sur ŝtiparo, la frataro de Jednota (Unuiĝo) suferis ĉagrenon de ekzilo, Dobrovský, Jungmann kaj Palacký laboris, luktadis kaj

suferis. Por konservi la gloran heredaĵon, kiun postlasis al ili iliaj herooj kaj martiroj, Ĉeĥoj estas pretaj al plej grandaj oferoj, ĝis kiam venos la fatala momento. La venkintoj aŭ la venkitoj postlasos al la mondo noblan ekzemplon, ke ili estos kreditoroj de la homaro." Pri kio revis Denis finante la duan parton de la verko "Čechy po Bílé Hoře" (Bohemujo post la Blanka Monto), tio plenumiĝis en la lima regiono inter Rusujo kaj Siberio. La ĉeĥoslovaka armeo en Rusujo ne havis antaŭ la okuloj alian modelon ol Husanojn. Siajn regimentojn oni nomis laŭ la husanaj herooj, la soldatan ĵuron oni akceptis laŭ ilia batala kanto: "Kiuj vi estas batalantoj de Dio" kaj enkondukis severan kaj demokracian disciplinon. Ili estis unu korpo kaj unu animo, nacia kaj fratara armeo. Flugante kvazaŭ ventego kaj bruante kvazaŭ tondro flugis la regimentoj de la legioj tra la rusa mondo. En urbo Ĉeljabinsk respondis la armeo al Trockij: ni antaŭenmarŝos *laŭ nia propra ordo*. - Parto de la armeo rapidege venis al Vladivostok, sed ĝi estis forŝirita de la kerno de sia armeo. Sed urbo post urbo, stacio post stacio estis venkakiritaj de la ĉeĥoslovakaj taĉmentoj. La okcidenta parto de la armeo okupis urbojn Penza, Samara kaj Ufa, la orienta parto restis sur la siberia fervojo ampleksanta linion da 1700 verstoj de Ĉeljabinsk ĝis Marijinsk, kun la urboj Ĉeljabinsk, Omsk kaj Nikolajevsk kaj la 11an de julio ĝi staris jam antaŭ Irkutsk. Fine de aŭgusto la tuta ĉefa siberia linio longa 8000 kilometrojn eĉ kun Vladivostok obeis la ĉeĥan komandon kaj Siberio estis izolita de Rusujo.

La ĉeĥoslovaka armeo sukcesis renovigi la fronton kontraŭ Germanujo kaj Aŭstrio en Siberio. Nia armeo baris la vojon al miloj de germanaj kaj madjaraj militkaptitoj, kiujn atendis Germanoj kaj Aŭstrio post la paco en Brest-Litevsk. En Siberio haltis nia armeo ĝis kiam la Kvaralianco decidos pri ĝi. Kaj ĉi tiu armeo estis disciplinita, la ĉirkaŭvolga Rusujo kaj Siberio bonvenigis ĝin kvazaŭ savanton. Ĉi tiu armeo faris

ordon, organizis al si ne nur la provizadon, sed ankaŭ poŝton, bankon. Ĉi tiu armeo ne forgesis la bezonojn de la animo kaj spirito, ĝi legis kaj ludis teatraĵojn, havis ekspoziciojn de artaĵoj, bonegan muzikon, eldonis "Československý denník" (Ĉeĥoslovakan ĵurnalon) kaj serion da amuzaj kaj humoraĵaj gazetoj, ĝia sokola gimnastiko allogadis milojn da miregigita indiĝena loĝantaro. Tio estis en vero transportebla ĉeĥoslovaka ŝtato. Ĝi staris apud Volga kaj ĝi staris apud Pacifiko.

Multe da noktoj ne dormis profesoro Masaryk en julio, aŭgusto kaj septembro, kiam la siberiaj legioj vokis pri helpo kaj plano. Li atakis per memorandumoj Wilsonon kaj la registarojn de la ceteraj Aliancanoj. La 3an de aŭgusto decidiĝis la Aliancanoj, ke ili disponigos al niaj bravaj siberiaj soldatoj militistan kaj materialan helpon. La prezidanto Wilson mem konsentis krediton da 1 milionoj dolaroj el fond-uso, pri kiu li rajtis mem disponi. La prezidanto de angla registaro Lloyd George telegrafis la 11an de septembro al profesoro Masaryk en nomo de la tuta registaro bondeziron: "La hisiorio de la aventuroj kaj venkoj de ĉi tiu malgranda armeo estas vere unu el la plej grandaj eposoj de la historio. La kuraĝo, persistemo kaj memdisciplino de viaj samlandanoj miregigis nin ĉiujn kaj montras, kiel tiuj, kiuj havas en siaj koroj la spiriton de libereco, scias venki la tempon, interspacojn kaj mankon de bezonaĵoj. Via nacio faris netakseblan servon al Rusujo kaj al la Aliancanoj en ilia batalo por liberigi la mondon de la despotismo. Ni neniam forgesos tion."

Efektive forgesis nin nek Anglujo, nek Francujo kaj al ili aliĝis Usono.

Same kiel la okazaĵoj sur la franca batalkampo maturiĝis al sia fino kaj al la venko de la Aliancanoj, same ankaŭ maturiĝis la ĉeĥa problemo, kies gardanto estis dro. Beneš en

Paris. Dro. Beneš estis kvazaŭ administranto de la revolucia politiko en la okcidentaj landoj. Kaj denove Francujo la unua jesis nian rajton je sendependeco kaj la Ĉeĥoslovakan konsilantaron ĝi agnoskis la plej alta organo administranta ĉiujn interesojn de sia nacio. Sekvis deklaro de la angla registaro agnoskanta tri ĉeĥoslovakajn armeojn (en Siberio, Francujo kaj Italujo) unueca alianca armeo kaj same la Ĉeĥoslovakan nacian konsilantaron, aŭtoritato de naciaj interesoj. La 3an de septembro sekvis kontrakto de dro Beneš kun Anglujo, kiu aprobis la rajton de la Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro esti diplomate reprezentata, la rajton eldoni pasportojn, uzadi proprajn kurierojn, la rajton partopreni ĉiujn aliancajn konferencojn ktp. - do la atributojn, kiujn posedas sendependa ŝtato. La Washingtona registaro samtempe deklaris, ke ĝi agnoskas la militan staton inter la ĉeĥoslovaka armeo unuflanke kaj la germana kaj aŭstria armeoj aliflanke, sed el ĉiuj ŝtatoj ĝi esprimis plej precize, ke ĝi agnoskas la Ĉeĥoslovakan konsilantaron fakta registaro. Unu monaton poste la 3an de oktobro la itala ministroprezidanto deklaris en la itala parlamento la samon, kion deklaris Usono.

Rilate nian siberian armeon la Aliancanoj ne kondutis laŭ la unuaj promesoj, mankis inter ili akordo - kaj nia armeo suferis nemezureble - sed Germanujo en serio da bataloj estis devigita retiriĝi ĝis ĝi konfesis sian malvenkon. Kun ĝi estis venkitaj Bulgarujo, Turkujo kaj Aŭstrio. Por niaj revoluciuloj alproksimiĝis tre streĉa momento. Nome Aŭstrio volis flankvoje savi sin: ekstere ĉe la prezidanto Wilson preskaŭ per petoj pri provizora paco, kaj hejme per proklamo de la imperiestro Karolo l. al la nacioj, ke li donas al la aŭstriaj novan konstitucion je bazo de aŭtonomio de ĉiu nacio. Prof. Masaryk gardestaris en Washington, dro Beneš en Paris kaj dro Štefánik kiel franca generalo inspektis la siberian armeon. Masaryk kaj Beneš sukcesis atingi ĉe la Aliancanoj, ke la l5an

de oktobro 1918 ili aprobis la ĝisnunan Ĉeĥoslovakan konsilantaron nia provizora nacia registraro kaj profesoro Masaryk per Deklaro de Sendependeco efektivigis la konsekvencon el ĉi tiu aprobo la l8an de oktobro 1918.
Vendrede la l8an de oktobro matene estis suprentirita sur la domo, en kiu loĝis Masaryk, ruĝablanka flago, antaŭ la tagmezo estis transdonita la Deklaracio al Wilson kaj posttagmeze al la reprezentantoj de la preso. Prezidanto Wilson laŭ la impreso de la deklaracio skribis ankoraŭ la saman tagon respondon al Aŭstrio-Hungario kaj sendis leteron aI profesoro Masaryk. Al Aŭstrio-Hungario li respondis ke li havas nenion plu, kion li pritraktus kun ĝi, ke ĝi interkonsentu mem kun siaj nacioj, kiuj juĝu pri kiu ajn entrepreno de la aŭstria registaro. Kaj al Masaryk li skribis: "Ne necesas diri al vi, kun kia emocio mi legis la Deklaracion pri la Sendenpendeco, publikigitan de la Ĉeĥoslovaka nacia konsilantaro; mi opinias, ke laŭ mia lasta respondo al Aŭstrio vi havos plenan impreson de mia vidpunkto pri ĉi tiu afero. Vi povas esti certa, ke mia intereso estas profunde ekscitita."

Tie Masaryk - ĉi tie Wilson anoncis verdikton de morto al Aŭstrio-Hungario kaj la revivigon de la ĉeĥa ŝtato. Problemo estis nur, kiam tio okazos, la pereo de la habsburga imperio estis jam antaŭdestinita - kiam tio okazos? Tio okazis dum dek tagoj. Praha eksciis pri la Deklaracio de la Sendependeco la 2l-an de oktobro. La 28an de oktobro 1928 la granda ludo estis finita.

Post kiam ĝi estis finita, devis esti vokita ĝia aŭtoro, ĝia komponisto. Tio okazis la 14an de novembro en la Nacia kunveno, kie *Tomáš Garrigue Masaryk estis elektita prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko*.

# TOMÁŠ MASARYK PREZIDANTO

Neniu alia povis esti prezidanto. Masaryk estis tiu, kiu ĝisfunde pripensis la revolucian programon ankaŭ por la Kvaralianco. Seton-Watson diris tion al ni post la milito en la jaro 1919: "La programo, kiun profesoro Masaryk en oktobro 1914 donis al mi kvazaŭ taskon dum sekreta kunveno en rotterdama hotelo, estis efektivigita preskaŭ ĝis la lasta litero en oktobro 1918 post kvarjara penega batalo. Ne estas flato, sed plena vero, se mi diros, ke en Eŭropo ne ekzistas alia viro kun la sama respondeco, kiu tiel vaste kaj klare difinis ĝeneralan politikon ne nur ĉeĥan, sed ankaŭ eŭropan, aŭ kiu kapablis verki ĝin. Ĝis kiam venos la tempo, ke estos eble publikigi liajn privatajn memorandumojn, kiujn li verkis en marto 1915 kaj en januaro 1916 por informi la aliancajn politikistojn, tiam ankoraŭ plialtiĝos la estimo koncerne lin. "En la jaro 1920, kiam oni demandis la anglan ministroprezidanton Lloyd George, kiu estis dum la milito la plej granda politikisto, li respondis: Profesoro Masaryk."

Masaryk estis tiu, kiu en fremdlando influis per sia personeco. Li estis politikisto profunde klera, pensulo senpasia kaj prudenta ĉe ĉiu paŝo, sed li estis entuziasmigita per altaj ideoj de vero kaj justeco, kiujn li neniam moderigis. Li estis neprofitema karaktero, kiun oni povis suspekti nek hejme, nek eksterlande pri persona politika spekulaciemo; male, li riskis sian vivon en plej danĝeraj momentoj. Per sia persono li kovris dum la unuaj tri jaroj la hejman silentadon kaj vakuon. Masaryk - tio estis Ĉeĥoj en okuloj de la fremdlando.

Ni hejmaj, kvankam en la unuaj jaroj negranda rondo da homoj, kiuj ni ricevadis sciigojn pri la agado de Masaryk, estis konsciiĝantaj, ke ĝuste li estis antaŭdestinita por paroli anstataŭ la nacio eksterlande, ke li unusola povis esti firma punkto en tiu furioza ciklono de militaj kaj diplomataj

okazaĵoj, ĉar li estis "kozako hardita en bataloj", persistema, netimema, elprovinta siajn fortojn hejme en la batalo kelkfoje kun la tuta nacio. Ni elsendadis nur mallaŭtajn preĝojn por li al la ĉielo kaj ĉar ne estis eble elparoli lian nomon publike, ni paroladis pri alia ekzilito kaj revoluciulo, pri Jan Amos Komenský.18)

Nur de post la printempo 1917 komenciĝis laŭtiĝi revoluciemo ankaŭ hejme kvazaŭ eĥo al la eksterlandaj klopodoj de Masaryk, Beneš kaj Štefánik. Kiam la nova imperiestro Karolo I. komencis sekrete intertrakti kun la Kvaralianco pri aparta paco de Aŭstrio kaj kunvokis la regnan konsilantaron, kiu estis forpermesita de post la printempo 1914, la ĉeĥaj verkistoj publikigia la 17an de majo 1917 manifeston al la nacio kaj precipe al la deputitoj, ke ili estu kuraĝaj kaj memfidaj. La ĉeĥaj deputitoj efektive prezentis tuj post la malfermo de la parlamento deklaron de la 30a majo, en kiu ili parolis unuanime pri la ĉeĥa ŝtato kaj pri Slovakujo aligita al ĝi. La unueco de la nacio prezentiĝis per tio, ke ankaŭ la sociala demokratia partio ekstaris sur la programo de la historia ĉeĥa rajto. Impresita de la rusa revolucio kunvokis la registaro la regnan konsilantaron kaj publikigis amnestion al preskaŭ ĉiuj ĝisnunaj kulpuloj. Aro da ĉeĥaj politikistoj forlasis malliberejojn kaj revenis al la patrujo.

La jaro 1918 estis jam pordego al la venko. Post tricent jaroj de post 1618 ni havis nian propran ĝeneralan parlamenton. Ĉiuj deputitoj el Bohemujo, Moravio kaj Silezio kunvenis la 6an de januaro en Praha. Ilian decidon oni provizore konfiskis. En ĝi estis jam esprimita adiaŭo al Aŭstrio. Kiam la ministro por eksterlandaj aferoj Czernin malhonorigis profesoron Masaryk nominte lin "mizerulo kaj kanajlo" kaj provis partigi la ĉeĥan nacion je bona kaj malfidela, la representantoj de la nacio respondis al li la 13an

de aprilo per solena ĵuro, rememorigante la vortojn de Luther: Ni restos, kie ni haltis, ni ne povas alie, ol esti ŝtatperfiduloj!

Ĝojiga estis poste la soleno de la 1a majo en Praha. Ĝis la jaro 1918 estis la majaj solenoj nur partianaj, ili estis festoj de la sociala demokracio, dum la naciaj socialistoj solenis la laborfeston nur je la plej proksima dimanĉo post la 1-a majo. En 1a jaro 1918 solenis la unuan majon ambaŭ socialistaj partioj kune. Sed ankoraŭ pli. Nesocialistoj solenis ĝin kune kun ili, eĉ sen antaŭa interkonsento... Oni vidis en la 1-a majo konvenan tagon, por ke la tuta nacio manifesfu la unuanimecon en la sopiro je sendependa ŝtato. En rezolucioj akceptitaj en Praha sur la insuloj Žofín, Střelecký, sur la Malnovurba placo kaj sur la placo de Tyl oni diris: "Ni volas labori al la celo, ke nia batala klopodo pri la ĉeĥoslovaka ŝtato estu komprenata kaj subtenata de veraj socialistoj de ĉiuj ceteraj nacioj. Tial ĉe tiu ĉi okazo ni deklaras kun akcento, ke same kiel ni nepre persistos en la batalo pri nia justa postulo de la ŝtata sendependeco por nia nacio, same ni rifuzas ĉiun intencon fuŝi rajton je ĝisfunda ĝuo de la nacia individueco de kiu ajn alia nacio." La unuan majon solenis ankaŭ Slovakoj en Svatý Mikuláš; la iniciatinton dron. Šrobár oni sendis en madjaran malliberejon.

Sekvis t. n. teatraj festoj la l6an de majo, nome 50jara jubileo de la Nacia teatro. Sub tiu ĉi masko efektive kunsidis kongreso de aŭstrio-hungariaj premataj nacioj. La voĉo de la antaŭ nelonge okazinta roma kongreso de subpremataj nacioj laŭtiĝis en Praha la duan fojon. Do jam sur la teritorio de la krevanta monarĥio, kiu ne posedis sufiĉe da kuraĝo por uzi policon kaj armeon. Imagu, al Praha venis Slovakoj - la poeto Hviezdoslav[44] kun sekvantaro, venis 60 Poloj - senekzempla okazaĵo inter Ĉeĥoj kaj Poloj. Partopreno de Jugoslavoj estis kvazaŭ memkomprenebla - ili estis ja inter ni jam la l3an de aprilo, kiam ni reciproke promesis al ni "fidelecon por

fideleco". Kaj alveturis ankaŭ Rumanoj kaj 17 Italoj. La l6an de majo ili aŭskultis la festparoladon de dro. Kramář kaj Hviezdoslav en la muzea Panteono, kie ĝis nun paroladis dum kunvenoj de la Ĉeĥa akademio eminentuloj pure monarĥie orientitaj. Kaj la 17an de majo okazis en la urba domo gravaj konferencoj.

Aregoj da homoj trairadis la Venceslavan placon ovaciante per aklamoj Masarykon, Kramářon, Wilsonon kaj Clemenceauon. Komuna entuziasmo ekkaptis eĉ stoikajn politikistojn. La pola deputito Tetmajer (konata pentristo) diris en Panteono: "Ĉeĥoj kaj Poloj kunigitaj foje faros nevenkeblan muregon kontraŭ Germanoj." La itala deputito Conci diris: "Nenio alproksimigis, la eĉ fratiĝis Italojn kun Ĉeĥoj pli multe, ol la komuna malfeliĉa sorto, la sama persekuto. Vidante la nekredeblan firmecon, per kiu vi Ĉeĥoj rezistas tiun ĉi subpremadon, mi estas konvinkita, ke ĉi tiu matura kaj fiera nacio ne pereos, ĝia justa afero venkos."

Laŭ la viena ĵurnalo "Neue freie Presse" tio estis jam "teatraĵo kun Masaryk en la fono."

La teatraĵon kun Masaryk sur la antaŭscenejo oni finludis la 28an de oktobro 1918 per la renverso en Praha. Tiu nia hejma renverso estis la fina vorto de la Washingtona deklaracio kaj de la tuta kvarjara revolucia agado de niaj gvidantoj.

La signifo de la 28a oktobro estas la cirkostanco, ke la tuta ĉeĥoslovaka nacio konferis sian simpation al laboro de Masaryk kaj aprobis ĝin. Tial la 28a oktobro fariĝis kaj restos nia ŝtata festotago.

Dum entuziasma animstato kunsidis la Nacia kunveno invitita de la Nacia komitato la l4an de novembro 1918 en la malnovan parlamentan konstruaĵon sur Malá Strana (kvartalo de Praha). Ĉeestis sole Ĉeĥoj kaj Slovakoj, Germanoj ne estis invititaj kaj, eĉ se oni estus invitintaj ilin, ili ne estus venintaj

kredante, ke ilia "Deutschböhnem" (Germanlingva Bohemujo) fariĝos ankaŭ sendependa ŝtato. La sentojn komunajn al la tuta nacio esprimis dro. Karel Kramář. Li deklaris, ke la ĉeĥoslovaka ŝtato de post tiu tago fariĝis respubliko, ke la perlamento proklamas T. G. Masarykon prezidanto de la respubliko kaj ke de post tiu tago la habsburga-lotringa dinastio perdis ĉiujn rajtojn je la ĉeĥa trono.

La deklaron sekvis nekvietigebla aplaŭdo kaj ovaciaj aklamoj. Poste oni elektis registaron, en kiu dro. Kramář fariĝis ministroprezidanto.

Profesoro Masaryk estis preparita, ke oni eleklos lin prezidanto de la respubliko. Du kabelogramoj al Washington sciigis lin pri tio la 9an de novembro. Telegramo el Genčve subskribita de Kramář, Staněk, Klofáč, Habrman, Kalina, Preiss kaj Svoboda tekstis jene: "Post kvar jaroj da nepriskribebla sufero ni staras sur svisa tero kaj sendas al vi plej sinceran saluton kaj plej varmajn dankojn de la dankema nacio." Telegramo el Paris subskribita de dro. Beneš klarigis: "Post interparolo kun Kramář kaj kun liaj amikoj en Genčve ni faris jenan decidon: La reĝimo estos respublika, nia kabineto estos kompletigita tuj post la reveno Bohemujon. Vi kiel prezidanto de la respubliko devas reveni tuj; dume vi rajtigos dron. Kramář, ke li subskribu kiel ministroprezidanto anstataŭ vi. La publika kaj sociala situacio en Bohemujo estas tia, ke via ĉeesto estas nepre necesa. Via aŭtoritato estas senlima kaj oni atendas vin. Tuta nia agado aprobita kun komuna entuziasmo. Mi retenos la oficon de ministro por eksterlandaj aferoj kaj dume mi restos en Paris, dr. Milan Štefánik retenos la oficon de ministro por militaferoj."

Profesoro Masaryk respondis la duan tagon al Beneš: "Ricevis ambaŭ kabelogramojn el Svisujo. Mi estas profunde kortuŝita pro la unuanimeco de la reprezentantoj de ĉiuj

partioj. Dankema nacio estas afero tro grava. Mi sentas grandan respondecon. Mi venos, kiel eble plej baldaŭ."

Sciigon pri sia elekto ricevis profesoro Masaryk en New York. La tagon antaŭe li adiaŭis prezidanton Wilson kaj la amerikajn amikojn en Washington, en New York li preparis sin jam por forveturi al Eŭropo. Tie li subskribis la unuan prunteprenon de la ĉeĥoslovaka ŝtato por nutraĵoj en sumo da 10 milionoj dolaroj. La tagmezaj ĵurnaloj raportis la saman tagon pri la unua kunsido de "Národní shromáždění" (Nacia kunveno). Masaryk irante al la kunveno de la klubo de Newyorkaj Ĉeĥoj por adiaŭi ilin, aŭdis gazetkolportistojn vokanoncantajn lian nomon kaj lian prezidantecon. Lia persona sekretario Jaroslav Císař, kiu akompanis lin, priskribis, ke Masaryk iris senvorte enprofundiĝinta kaj neniel malkaŝante, kion li aŭdis. Nur kiam la klubestro bonvenigis lin kiel prezidanton, li malkaŝis, ke li ankaŭ jam scias pri tio. Estinte superŝutita per gratulacioj li respondis: "Ne nur hodiaŭ, sed jam kelkfoje oni demandis min: Kion vi sentas nun, kiam Germanujo kaj Aŭstrio estas venkitaj? Kion vi sentas konsciiĝante, ke vi estas kapo de nova ŝtato kaj de nova registaro? Sendube vi sentas vin bone, vi estas feliĉa. - Mi ne scias, ĉu mi estas feliĉa, kaj mi ne povus priskribi miajn sentojn. Mi havas la senton pri respondeco. Mi dirus, ke mi ne havas sufiĉe da tempo por ĝoji, sciante, ke mi staras antaŭ grandega problemo, kaj mi konscias *mian respondecon* ne nur antaŭ mia nacio, sed antaŭ ĉiuj nacioj, kun kiuj ni interrilatos kaj kunlaboros. Neniu el ni rajtos trompi esperojn. Tio estas, kion mi sentas."

La prezidanto forveturante el Ameriko sciis jam de Lansing, la ministro de Wilson, ke en Washington preskaŭ oni finis la preparojn por la paca konferenco. Lansing kunmetis la programon, kiu estis al la ĉeĥa vidpunkto entute proksima. La 20an de novembro forveturante de la amerikaj bordoj li havis

jam pretajn la preparojn por la paca konferenco. Nome je la sama tempo estis disvastigata en Ameriko kaj Eŭropo lia verko "Nová Evropa" (Nova Eŭropo), diskoniganta la slavan vidpunkton, en la angla kaj franca lingvoj. Ĝi estis presita kiel manuskripto por politikistoj de ĉiuj potencoj, kiuj militis. Ĝi estas datumita "Washington, en oktobro 1918". Ĝi estis projekto por la paca kongreso.

La prezidanto haltis en Anglujo kaj Francujo ĉe siaj amikoj, al kiuj li dankis por la helpo, li vizitis la ĉeĥajn soldatojn en Darney[48)] kaj trans Italujo kaj Aŭstrio li venis al Praha la 2lan de decembro 1918. Lia alveno Prahan estis reĝa.

Ni enkondukis lin ee la reĝan kastelon sur Hradčany.[49)] La ĉeĥa trono, sur kiu sidis de post la jaro 1526 dekdu romaj imperiestroj kaj kvar aŭstriaj imperiestroj, ĉiuj el la habsburga dinastio, estis vakanta. Eksidis sur ĝin ne reganto de dia graco, sed filo de laboristo pro volo de la nacio. Tiu okazaĵo rememorigis elekton de ta husana reĝo Jiří[33)] (Georgo) nobelo bohema el Poděbrady en la jaro 1458, kiam Ĉeĥoj ploris pro ĝojo, ke kara Dio liberigis ilin de potenco de la germanaj reĝoj, kiuj intencis persekuti la ĉeĥan popolon kaj precipe tiujn, kiuj sekvis la sanktan biblion. Sur trono de la reganto eksidis la l5an de decembro 1918 moderna kavaliro, viro batalanta per spirita glavo. Li venkis per tiaj principoj, kiujn li - estante juna viro - akceptis kiel ĉefajn regulojn de sia vivo: "la scio estas potenco," "per vero atingi rajton" kaj "nenion konsideri granda, kio ne estas vera."

La nacio estimas T. G. Masarykon kiel sian prezidanton kaj amas lin kiel "paĉjon" Masaryk. Fremdlandanoj gloras lin. Kiam li veturis al Praha la 2lan de decembro 1918 skribis la angla Times: "La prezidanto de la ĉeĥoslovaka respubliko estas supermezure simpla kaj korafabla viro. La tutan vivon 1i estis apostolo, sed neniam revulo. Telepatio en la senco de akra distingado kaj antaŭvido de estontaj aferoj estas lia

karakteriza eco: Ĉi tiu eco estas kompletigata per same potenca sento por tio, kio estas efektivigebla en la nuna tempo." La amerika verkisto Hudleston observis en la jato 1924 Eŭropon kaj pri nia prezidanio li skribis, ke li estas la plej kapabla homo de Eŭropo. Li estas viro de grandaj scioj kaj de profunda kulturo, viro de eksterordinara anima forto. . ." Al liaj profundaj scioj aliĝas pureco de lia karaktero, kia havigas al li estimon. Pri Iia sincereco oni ne povas dubi. Nenio difektis lian harmonian karakteron, lian amon al la justeco, lian senton por la ordo, lian postulon de honesta agado kaj lian pacan celadon. . . Ĉiuj interesoj, la tuta estonteco de Ĉeĥoslovakio bazas sur la konservo de la paco. Ĉi tiu vero validas por ĉiuj landoj, sed por neniu ĝi estas tiom memkomprenebla kaj sendispute prava, kiom por Ĉeĥoslovakio.

Posedante en frunto de nia sendependa respubliko T. G. Masarykon ni ĉiuj vivantaj Ĉeĥoj devus senti la feliĉon, ke ni vivas en la atmosfero de tia viro, ke ni rigardas lian vizaĝon, ke ni konas liajn principojn kaj povas obei liajn saĝajn vortojn.

*

Eksciu, kial mi donis al mia rakonto la titolon: "Malriĉa knabo, kiu gloriĝis." Amerika sinjorino S. K. Bolton verkis belan libron pri *Malriĉaj knaboj, kiuj gloriĝis*. La menciita sinjorino verkis biografiojn de 27 tiaj knaboj, kiujn ŝi konis. Sed en ŝia albumo mankas unu malriĉa knabo, ĉar verkante la libron, ŝi ne konis lin ankoraŭ: li estas *Tomáš G. Masaryk*, la unua prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko.

Dro. Jan Herben.

Martha L. Root:

## PREZIDANTO MASARYK KAJ ESPERANTO

En la Usona Bahaa revuo "Star of the West", en artikolo "President Thomas Masaryk", skribas la konata pionirino de esperanto kaj Bahaismo:

Ĉar la aŭtoro de tiu artikolo estas fervora esperantistino, ŝi demandis prezidanton Masaryk, kion li pensas pri esperanto kiel la universala helplingvo en la porpaca laboro. El liaj kelkaj, sekvantaj rimarkoj ŝi konjektas, ke li tute ne hontas pri la grava rolo, kiun ludas Ĉeĥoslovakio en la esperanto-movado: Li diris: "Ni havas tre multajn esperantistojn en Ĉeĥoslovakio, kaj ili havas siajn proprajn gazetojn. Vizitu ilin. Mi multe pripensis pri esperanto; mi dubis, ĉu nacio povas kulturi artefaritan lingvon. Ofte mi demandis min mem, ĉu la verkon Faust' de Goethe oni povus traduki en esperanton, ĉu Shakespeare kaj Byron povus esti skribintaj siajn ĉefverkojn en esperanto."

La aŭtorino respondis, ke profesoro Charles Baudouin, Geneve, poeto kaj bone konata literaturisto, foje diris al ŝi: "Mi trovas, ke mi povas verki miajn poemojn en esperanto same facile kiel france" (lia gepatra lingvo). - La prezidanto diris, ke li ĝojas aŭdi tion. Ŝi ankaŭ klarigis, ke multaj klasikaĵoj, la plej gravaj de la mondo, estas nun tradukataj en tiun ĉi universalan helplingvon, ke tio estas facila, ĉar tiu ĉi nova lingvo havas la spiriton de la nuna nova universala epoko.

Prezidanto Masaryk diris: "Persono, kiu bone scias ses aŭ sep lingvojn, povas verŝajne ellerni la esperantan gramatikon en ses aŭ sep horoj." La aŭtorino respondis al li, ke Tolstoj ellernis esperanton en tri horoj, tiel ke li povis legi kaj skribi en esperanto.

Fine la prezidanto esprimis tre afable, ke li volas akcepti esperanton, se ĝi povas helpi la venon de pli bona mond-kompreno.

Prezidanto Masaryk similas la Skotojn en tio, ke li ne parolas multe, sed agas. Li kaj Dro. Beneš aktive helpis la Internacian konferencon "Paco per lernejo", okazinta pasintan jaron en Praha. En tiu ĉi konferenco esperanto estis akceptita la oficiala lingvo traduka. Paroladoj en kiu ajn lingvo estis tradukataj nur en esperanton. Internaciaj kongresoj ĉi-jaraj adoptis tiun ĉi manieron. Al Praha apartenas la honoro de tiu ĉi rimarkinda sukcesa provo.

*Tradukis Vuk Echtner. Represo de "La Progreso".*

## R I M A R K O J

1. Hodonín, urbo en suda Moravio.

2. T. G. Masaryk estis elektita la 14an de novembro 1918 prezidanto de la respubliko.

3. En Aŭstrio-Hungario (dualisma regadformo) estis nuna Slovakio norda parto de la hungara reĝolando, dume la iamaj landoj de la Ĉeĥa krono (Bohemujo, Moravio kaj Silezio) apartenis al la aŭstria imperio. Pro tio oni nomis Slovakojn loĝantajn sur iama teritorio de la hungara reĝolando - hungarlandaj Slovakoj diferencante ilin de moraviaj Slovakoj - loĝantaj en sudorienta Moravio. Kiel literaturan lingvon uzis Slovakoj de ĉiam la ĉeĥan lingvon; ankaŭ ĉiuj preĝlibroj estis ĉeĥe verkitaj. Fine de la 18a jarcento kelkaj slovakaj pastroj kun Ant. Bernolák klopodante revenigi la luteranajn Slovakojn al romkatolika eklezio intencis krei el dialekto parolata en okcidenta Slovakio memstaran literaturan lingvon slovakan, por malhelpi al Slovakoj la legadon de ĉeĥaj "herezulaj" libroj.

Tiamaj slovakaj vekuloj kontraŭstaris ĉi tiun klopodon sciante, ke Slovakojn savos de la denaciigaj klopodoj de tiama reĝimo sole la literatura unueco kun Ĉeĥoj. Malgraŭ tio efektiviĝis en la jaro 1784 slovaka literatura lingvo, kiu estas tute bone komprenata de Ĉeĥoj, same kiel la ĉeĥa lingvo estas komprenata de Slovakoj; ambaŭ lingvoj diferenciĝas plejparte nur en la prononcmaniero - kutima ĉe dialektoj.

4. K o p č a n y, civito en okcidenta Slovakio.

5. Urboj kaj urbetoj en suda Moravio.

6. H a n á, unu el la plej fruktodonaj partoj de Ĉeĥo-slovaka respubliko en centro de Moravio; K r o m ě ř í ž urbo en suda Haná.

7. B a c h Alexander (1848-1893), viena advokato, aŭstria ministro de 1848 -1859, kies eraon oni nomis Bacha absotutismo. La registaro de Bach subpremis ĉiuokaze la ĉeĥan nacion, praktikis centraligon, forigis asizajn tribunalojn, presan kaj societan liberecojn, ĉeĥan lingvon el la lernejoj kaj oficoj, persekutis la ĉeĥajn naciajn gvidantojn. Fine kaŭzis la absolutismo indignon inter la popoloj, ke la imperiestro mem decidiĝis forigi la absolutisman registaron de Bach.

8. Makaronioj estas tubetformaj vermiĉeloj el farunpasto, kiujn pro ilia formo Slovakoj nomas lumbrikoj.

9. M o r a v i e - "moravia lingvo"; simile kiel Slovakojn (vidu rim. 3) klopodis Habsburgoj forlogi ankaŭ Moravianojn de la ĉeĥa nacio celante malfortigi ĝin; tial oni ŝatis, se estis parolate pri "moravia lingvo" kvankam temis pri ĉeĥa lingvo; similajn klopodojn disigi Slavojn oni povis konstanti ankaŭ ĉe aŭstrio-hungaraj Jugoslavoj.

10. Bílá Hora estas larĝdorsa daŭrigo de la Praha-a monteto Petřín okcidenten. Tie estis venkita la 8an de novembro 1620 la ĉeĥa reĝo Frideriko, per kio Habsburgoj rompis la ĉeĥan kontraŭstaron, parte ekzekutis, parte ekziligis ĉiujn, kiuj ne volis fariĝi katolikoj kaj seniginte tiel la nacion

de ĝiaj spiritaj gvidantoj subpremis ĝin helpe de la jezuita ordeno tiom, ke la spirita vivo de la tuta nacio iom post iom ĉesis. Oni parolas pri letargia dormo de la ĉeĥa nacio. El ĉi tiu spirita dormo vekis la nacion nur fine de la 18a kaj komence de la 19a jarcentoj verkistoj t. n. naciaj vekuloj.

11. Clementinum estas granda konstruaĵo, en kiu troviĝis la filozofia kaj teologia fakultatoj de la universitato.

12. S o k o l estas la fama gimnastika asocio fondita en jaro 1862 de niaj karaj Fügner kaj Tyrš. Ĝi potence disvastiĝinte inter Ĉeĥoj kaj inter ĉiuj aliaj slavaj nacioj zorgas, ke la homa korpo kaj animo harmonie evoluu. La korpan edukon kompletigas la eduko anima kaj morala, organizata en kleriga kaj progresema agado. Ĝiaj ĉiujn 5 jarojn okazantaj tutsokolaj kunflugoj (sokol = falko) estas vizitataj ankaŭ de eksterlandaj gimnastoj precipe el slavaj ŝtatoj, kie la organizo de Sokoloj okazis laŭ la ĉeĥa modelo. En la historio de la ĉeĥa nacio enskribiĝis Sokol honore per siaj nacie vekigaj kaj konsciigaj klopodoj dum tempoj de la nacia sklavigo; dum la milito ĝi partoprenis grandioze la revolucion, precipe la eksterlandan, por kiu ĝi liveris entuziasmigitajn batalantojn kaj ideojn en ĉeĥaj eksterlandaj legioj.

13. Dro. Fr. Lad. R i e g e r (1818-1903) estis gvidanto de la ĉeĥa politika reprezentantaro dum la unuaj jaroj de la konstitucia reĝimo en Aŭstrio. Lia politika partio estis nomita "maljunĉeĥa", post kiam aperis sur la politika scenejo liberala nova partio "la junĉeĥa",  kiu tre rapide forigis la maljunĉeĥan de sur la scenejo.

14. Jan Milíč z Kroměříže (? -1374), paroĥestro en Praha, kiu jam antaŭ Hus same kiel Konrad Waldhauser, invitita de la reĝo Karolo al Praha el Germanujo - predikis kontraŭ la tiama malmoraleco de la katolika pastraro. Prave konsiderata kiel antaŭulo de ĉeĥa reformacio.

15. Jan H u s havas por Ĉeĥoj similan signifon, kiel por Germanoj Martin Luther, kiu 100 jarojn post Hus sukcesis efektivigi reformacion de la kristana kredo. La reformatoro Hus, universitata majstro (profesoro) kaj de la popolo amata predikisto, sed malamegata de la marĉanda katolika pastrato, estis kulpigita pri herezo ĉe unu el la tiamaj papoj, da kiuj estis tiam tri samtempe, ĉar li klopodis starigi la kredon sur la sanktan biblion kaj forigi de ĝi ĉion mondan. La tiaman staton de la pastraro ilustras plejbone la cirkonstanco, ke la tiama praha-a ĉefepiskopo - kvankam li ne kapablis eĉ legi, estante efektiva analfabeto - ordonis forbruligi la "herezulajn" librojn de la angla Wicleff, tre ŝatata de Hus. Hus invitita al la koncilo en Konstanz por pravigi tie siajn doktrinojn ricevis de la imperiestro Siegmund - ĉeĥa reĝo - skriban promeson, laŭ kiu Siegmund garantiis al li sekuran revenon hejmen. Sed nelonge post sia alveno en Konstanz Hus estis malliberigita en Gottlieben kaj fine kondamnita al forbruligo sur ŝtiparo kvazaŭ herezulo. Li estis ekzekutita 6an de julio 1415. Ĉi tiu okazaĵo tre incitis la trompitan ĉeĥan nacion, kiu daŭrigante la klopodojn de Hus kunvenadis sur kamparo al komunaj diservoj kaj estante maltrankviligata de la katolikoj, armis sin per agrikultura ilaro (draŝiloj ktp.). Tiel ekestis la fama husana militistaro, kiu gvidata de Jan Žižka z Trocnova kaj post lia morto de Prokop Holý venkadis la katolikan militistaron sendatan de la papoj kontraŭ Ĉeĥoj en kelkaj t. n. krucanaj militiroj kontraŭ Ĉeĥoj. La reformaciaj klopodoj de Hus estis poste daŭrigataj de t. n. Fratara Unuiĝo,[18]) kies laborojn en ĉeĥaj landoj ĉesigis la habsburga kontraŭreformacio post la batalo sur Blanka Monto.

16. František P a l a c k ý (1798 -1876), historiografo de la ĉeĥa regno, estis unu el t. n. naciaj vekuloj. Li vekis la nacion per sia "Historio de la ĉeĥa nacio en Bohemio kaj Moravio" konigante al la nacio ĝian gloran estintecon. Palacký

opiniis, ke Aŭstrio havas sian historian mision ebligi al malgrandaj nacioj de la meza Eŭropo sanan kaj neniel malhelpatan evoluon kunigante ilin en potenca regno. Tial li diris: "Se ne ekzistus Aŭstrio, oni devus krei ĝin". Sed Habsburgoj ne komprenis ĉi tiun mision kaj ne obeis eĉ sian propran devizon skribitan sur la pordego de la imperiestra kastelo en Wien: "Justitia regnorum fundamentum". Tial ilia regno devis perei.

11. Karel H a v l í č e k Borovský (1821-1856), tre sentima progresema publicisto, kies energio estis tro malagrabla al la absolutismaj tendencoj de la aŭstriaj registaroj, dum la absolutisma persekuto de ĉeĥa nacio (vidu rimarko 7) defendis la ĉeĥan nacion kontraŭ la viena registaro en sia organo "Národní Noviny" (Nacia gazeto), en kiu li krome politike edukadis la nacion, instigante ĝin al kleriĝo, kultura kaj naciekonomia leviĝo. Pro lia agado dumnokte eskortis lin soldata taĉmento al Brixen, en suda Tirolio, kie li loĝis sub polica inspekto for de sia juna edzino kaj malgranda filino. Nur post kiam li grave malsaniĝis kaj lia edzino dume estis mortinta, estis permesite al li reveni hejmen, kie li baldaŭ mortis.

18. *Fratara Unuiĝo* fondita de filozofo Petr Chelčický en 15a jarcento laŭ la husanaj doktrinoj estis religia organizaĵo, kiu tre disvastiĝis tra la ĉeĥaj landoj; ĝiaj anoj devis forlasi la patrujon post la malvenko sur la Blanka Monto kaj ilian posteularon oni povas trovi eĉ nun en la germana provinco Silezio en Herrnhut. La lasta episkopo de la Fratara Unuiĝo estis Jan Amos Komenský (Comenius).

19. Jan Amos K o m e n s k ý (1592 -1670), fama pedagogo, fondinto de la novepoka instruado, kiu ne volante fariĝi katoliko estis ekziligita kune kun siaj anoj kaj vivis komence en Polujo. (Pli detale legu esper. broŝ.: Šupichová: J. A. Comenius). Pro siaj pedagogiaj kapablecoj li estis invitata

al diversaj eŭropaj landoj por organizi la lernejojn. Por ni esperantistoj estas grave, ke en sia verko "Via lucis" li rekomendas krei artefaritan lingvon por faciligi internaciajn studojn. Li mortis en la nederlanda urbo Naarden.

20. Boleslav *Jablonský* (1813-1881), ĉeĥa pastro kaj poeto, kiu finis sian vivon en Kraków. Lia poemo "Tri epokoj de la ĉeĥa lando" prikantas la gloran estintecon de la ĉeĥa nacio, poste ĝian malgajan dekadencon kaj fine ĝian reviviĝon.

21. Libuše, Záboj, Slavoj, Neklan, Jaroslav ze Šternberka, Tataroj en Moravio estas historiaj nomoj menciitaj en "manuskriptoj".

22. *Dvůr Králové*, industria urbo en nordorienta Bohemujo. *Zelená Hora*, en meza Bohemio apud Příbram.

23. *Josef Dobrovský* (1753-1829), lingvisto kaj filozofo, kiu verkis gravajn verkojn pri la slava lingvoscienco.

24. *Jan Gebauer* (1838-1907), eminenta ĉeĥa filologo, universitata profesoro en Praha.

25. *Maljunĉeĥoj*, iamaj politikaj reprezentantoj de la nacio dum la unua tempo de la konstitucia vivo en Aŭstrio. La partio nomata origine "nacia partio" estis fondita de Palacký kaj poste gvidata de lia bofilo dro Rieger. Ĉi tiu konservativa partio estis venkita de *junĉeĥoj* gvidataj de la fratoj Grégr, posedantoj de la ĵurnalo "Národní Listy". La posteuloj de junĉeĥoj estas la nunaj "naciaj demokratoj" gvidataj de dro. Kramář.

26. *Šumava* lima montaro inter Bohemio kaj Bavario.

27. La iama aŭstria-hungaria monarĥio konsistis - kiel evidentiĝas jam laŭ la nomo - el du ŝtatoj, el kiuj ĉiu posedis sian propran parlamenton. Komunaj al ambaŭ ŝtatoj estis nur la internaciaj aferoj, la militistaro, la okupitaj landoj Bosnio kaj Hercegovino kaj la koncernaj financaj aferoj. Por pritrakti ĉi tiujn komunajn aferojn kaj la koncernan budĝeton delegadis

ambaŭ parlamentoj po 60 parlamentanoj en t. n. "*delegaciojn*", kies tasko estis esplori kaj aprobi koncernajn proponojn de 1a komunaj ministerioj.

28. Simile kiel la politika realisto Masaryk renversadis malnovajn idolojn en la ĉeĥa politiko, same verkisto J. S. Machar procedis en la moderna ĉeĥa literaturo. Li estas unu el plej grandaj ĉeĥaj poetoj.

29. *Realistoj*, politika partio fondita de 1a disĉiploj de Masaryk, kiu klopodis eduki la ĉeĥan nacion en senco de la doktrinoj de Masaryk. Ilia politika ĵurnalo estis "Čas", fondita de la verkinto de ĉi tiu libreto; komence ĝi aperadis nur semajne, pli poste fariĝinte ĵurnalo ĝi ebligis al realistoj evoluon kaj organizon de la batalo kontraŭ la tiama fluo de la politikaj aferoj.

30. *Polná*, malgranda urbo en sudorienta Bohemio proksima al la moravia limo. *Kutná Hora*, urbo en la meza Bohemio, kie troviĝas fame konata gotika katedralo de sankta Barbara. *Písek*, urbo en la suda Bohemio.

31. *Moravia Valaĥio*, estas nomata montara regiono de Beskydoj, parto de Karpatoj.

32. *Ernest Denis* (1849-1921), franca universitata profesoro, kiu dum siaj studojaroj frekventis ankaŭ la Praha-an universitaton, ellernis perfekte la ĉeĥan lingvon por studi la slavan historion. El la ĉeĥa historio li verkis du gravajn verkojn: "La fino de la ĉeĥa sendependeco" kaj "Bohemio post la Blanka Monto". Dum la mondmilito li ege subtenis nian revolucion en sia patrujo.

33. *Jiří z Poděbrad* (1458-1471), ĉeĥa reĝo nomata "husana", ĉar li estis ano de la eklezio nomata "pod obojíó (sub la ambaŭ substancoj) laŭ la komunio: pano kaj vino. Ĉi tiu tre talenta kaj de la popolo tre amata reĝo klopodis jam dum sia regado efektivigi societon de eŭropaj ŝtatoj por sekurigi la pacon: bedaŭrinde li ne estis komprenata de siaj

samtempuloj. Simile okazas ja ankaŭ nun al la pacemuloj. *Jan Žižka z Trocnova a z Kalicha*, husana armeestro, kiu venkis en ĉiuj miitiroj kontraŭ katolikoj, eĉ estante tute blinda. Petr Chelčický,[18] Komenský.[19]

34. *Dro. Eduard Beneš*, juna profesoro, dum la milito plej oferema kaj plej grava helpanto de Masaryk. Post la milito li pruvis sian eksterordinaran kapablecon estante de post la ekesto de nia respubliko ĝis nun ministro por eksterlandaj aferoj. La dankema popolo ŝatas lin sciante, ke li havas krom Masaryk la plej grandajn meritojn pri nia sendependeco. Post foriro de Masaryk kaj Beneš el Svisujo gvidis tie la aferojn maffiano dro. L. Sychrava.

35. *Maffia* estas en Italujo nomata sekreta societo de krimuloj, sed la nomo estas poste uzata por sekretaj societoj celantaj danĝerajn entreprenojn. Tial ankaŭ la ĉeĥaj revoluciuloj laborintaj sekrete en Praha estis nomataj post la renverso "Maffianoj."

36. *Antonín Švehla*, gvidanto de la agrikultura politika partio, tre talenta kaj tre ŝatata politikisto, longtempa ministroprezidanto de la respubliko ĝis lia grava malsaniĝo. *Jan Dürich*, iama deputito de la sama partio, sendita de ĝi dum la milito Rusujon. *Dro. Karel Kramář*, politikisto, gvidanto de la junĉeĥa partio, dum la milito unu el la ĉefaj reprezentantoj de la enlada revolucia agado, pro kio li estis arestita. La unua ministroprezidanto de la ĉeĥoslovaka respubliko.

37. *Dr. Milan Štefánik* (1880-1919), juna scienculo konata eksterlande precipe kiel astronomo. Pro siaj konektoj kun la eksterlandaj scienculoj precipe en Francujo li efike faciligis la revoluciajn klopodojn de Masaryk, estante krome tio franca generalo. Li fariĝis nia unua ministro por militaferoj, sed revenante la unuan fojon el Italujo en la liberigitan patrujon li atingis ĝin nur morta pro akcidento okazinta al la aeroplano jam ne malproksime de sia hejmo.

38. *Zborów*, vilaĝo en la nuna Polujo, kie la ĉeĥa brigado la unuan fojon ekbatalis kiel aparta militista korpuso sur la rusa fronto kontraŭ la aŭstria kaj germana armeoj. Rompinte la malamikan fronton ĝi ne kapablis eluzi sian venkon pro tuta malmoraligo de la tiama rusa militistaro; sed almenaŭ ĝi sekurigis la retiriĝon de la rusaj armeoj persekutataj de Germanoj. *Tarnopol*, urbo en la orienta Galicio.

39. *Bachmač*, loko ĉe la fervoja linio de Kiev al Voroněj.

40. *Pergler*, amerika Ĉeĥo, advokato kaj poste ambasadoro de nia respubliko; nun deputito en la parlamento en Praha.

41. *Joachim Andreo Šlik*, bohema nobelulo, kiu fuĝinte post la batalo sur la Blanka Monto Saksujon estis kaptita kaj elliverita al Habsburg, por ke li povu efektivigi sian venĝon je li per la fama ekzekuto sur la malnovurba placo en Praha, kie la 21. de junio 1621 estis senkapigitaj 21 ĉeĥaj nobeluloj, inter ili ankaŭ Šlik. *Josef Jakub Jungmann* (1773 -1847) profesoro lingvisto, unu el t. n. naciaj vekuloj; eldonis la unuan ĉeĥan enciklopedian vortaron.

42. *Liptovský Svätý Mikuláš*, urbo en la norda Slovakujo.

43. *Dro. Vavro Šrobár*, slovaka politikisto, sentima revoluciulo, senatano, ĉeĥoslovaka eksministro.

44. *Hviezdoslav*, slovaka poeto.

43. *František Staněk*, politikisto de la agrikultura partio, ministro. *Václav Klofáč*, ĉefo de la ĉeĥoslovaka nacia socialista partio, dum la milito arestita; iama prezidanto de senato kaj ministro. *Antonín P. Kalina*, publicisto, politika verkisto, diplomato, ambasadoro en Beograd. *Dro. Jaroslav Preis*, ĉeĥa financisto, naciekonomia fakulo, direktoro de Živnostenská banka.

46. *Lobkowicz*, nobelula familio en Bohemujo, kies anoj dum la aŭstria reĝimo estis prezidantoj de la ĉeĥa landa parlamento.

41. *Václavské náměstí*, plej larĝa placo en Praha, kie okazis la proklamo de la respubliko la 28an de oktobro 1918.

48. *Darney*, militista tendaro en Francujo.

49. *Hradčany*, urba kvartalo en Praha nomata laŭ la kastelo (hrad). La vidaĵo al Hradčany estas fame konata Rezidenco de la prezidanto de Ĉeĥoslovaka respubliko.

*Tradukis T. Mrázková kaj B. Pittner.*
*Eldonis la 7-an de marto 1930 Moraviaj Esperanto Pioniroj.*
*Presis Hanácká knihtiskárna, Olomouc, Ĉeĥoslovakio.*
*Prezo 16 Kč aŭ 2.50 Frsv.*